

R. de Ladevère
DEMANDARO



Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel
G. m. b. H.

Berlin kaj Dresden

R. DE LADEVÈZE

DEMANDARO

pri la

Historio, Literaturo kaj
Organizaĵoj de Esperanto

por

Esperantaj Ekzamenoj

Reviziita kaj kompletigita de
Prof-ro Dro GÖHL



1923

ESPERANTO-VERLAG ELLERSIEK & BOREL G.M.B.H.
BERLIN kaj DRESDEN



ALLE RECHTE VORBEHALTEN
ĈIUJ RAJTOJ ESTAS REZERVITAJ
COPYRIGHT 1923 BY
ELLERSIEK & BOREL G.M.B.H., BERLIN



Antaŭparolo

En la ekzamenoj de la Germana Esperanto-Asocio — kiel verŝajne estonte ankaŭ de aliaj naciaj asocioj — la kandidatoj devas respondi demandojn pri la historio, la literaturo kaj la organizaĵoj de Esperanto. Sed ĝis nun almenaŭ la novaj adeptoj bezonis legi multajn librojn, hazarde, sen direkta fadeneto inter la granda amaso de ili, kaj ankaŭ pro la elspezoj trudataj de aĉeto al multaj verkoj, okaze se la loka grupo ne posedas sufiĉe enhavriĉan bibliotekon, ofte preskaŭ nenion scias pri tiuj gravaj punktoj.

Dum la germana kongreso de Gotha aperis germanlingva broŝuro: „Der Esperantismus“ de nia lerta Dresdena samideano s-ro Winkelmann, kiu bonege, tre klare kaj trafe prezentas nian tutan movadon. La legadon al tiu libro oni ne povas tro multe rekomendi. Specialan dankon mi mem ŝuldas al s-ro Winkelmann, kies verko estis al mi, pri diversaj punktoj, tre utila. Sed li celis precipe la neesperantistan publikon, li celis forigi la kutimajn antaŭjuĝojn de l' „eksteruloj“ kaj prepari atmosferon favoran al la disvastiĝo de Esperanto. Mia celo, kontraŭe, estis, prezenti al la samideanoj kaj speciale al la *kandidatoj por Esperantaj Ekzamenoj, en Esperanta lingvo* mallongan, laŭeble precizan kaj senpartian *resumon*, unuvorte la esencon de tio, kion ili devas nepre scii. Por igi la tekston pli klara kaj pro teknikaj motivoj, la respondoj mem estas laŭeble mallongaj kaj la oficialaj dokumentoj kiel ankaŭ

miaj personaj rimarkoj presitaj per pli malgrandaj literoj. Piednotoj montras la fontojn, kiujn oni bezonas konsulti por ĉerpi pli kompletajn informojn.

Verŝajne estas mankoj en mia laboro, kaj sekve mi estos danka al la samideanoj, kiuj bonvolos malkaŝe fari al mi siajn rimarkojn. Malgraŭ ĉio mi esperas, ke mi ne tute maltrafis mian celon kaj ke tiu verketo helpos al multaj.

Hamburg, Majo 1911.

R. de Ladevèze

Antaŭparolo al la 2a eldono

La Demandaro bone plenumis sian celon. Kaŭzo por ampleksaj ŝanĝoj ne ekzistas. Pro tio mi kontentiĝas, farinte kelkajn aliigojn kaj plivastigojn, daŭrigi la pri-skribon ĝis la nuna tempo.

Mi rimarkigas, ke, citante el oficialaj raportoj kaj regularoj, mi ordinare ne metis cithoketojn.

Neugersdorf, Marto 1923.

Dro Göhl



I. Historio de l' ideo pri internacia lingvo

A. Deveno

1. De kie devenas la ideo pri internacia lingvo?

Jam de tre malnova tempo kleraj personoj kaj scienculoj, konsciaj pri la neebleco, *majstri* ĉiujn, eĉ nur kelkajn vivantajn lingvojn kaj pri la neceso, ĉiam pli kaj pli interrilati kun alilingvanoj, sin okupis pri tiu problemo. Inter multaj aliaj mi citas nur Comenius, Descartes kaj Leibniz. En novaj tempoj la internaciaj interrilatoj sur la interkomunikiĝa, komerca, industria, financa, jura, scienca, morala, socialpolitika agadkampoj treege pliiĝis. Per tio kreskadis la bezono pri ĝenerale komprenebla lingvo, sen kiu nemalhelpitaj interrilatoj ne povas esti komencataj nek daŭrigataj. Komence oni nur celis krei filozofian, ne paroleblan, sed nur skribeblan interkompreniĝilon, sed iom post iom la praktikaj bezonoj venkis.

2. Kial oni ne elektis iun mortintan aŭ vivantan lingvon?

Mortinta lingvo (latina same kiel greka) absolute ne taŭgas¹⁾, ĉar eĉ scienculoj ofte ne kapablas parole uzi tian sufiĉe flue pro ĝia malsimpleco kaj ankaŭ ĉar tiuj lingvoj konvenis al la antikvaj ideoj kaj bezonoj, sed ne

¹⁾ Vidu: „Ĉu la lingvo internacia povas esti la latina?“ de L. de Beaufront.

al tiuj de la modernaj scienco, tekniko kaj praktika vivo, por kiuj esprimoj mankas.

Vivantan lingvon oni ne elektis pro jenaj kialoj:

1. Estas neeble, atingi interkonsenton inter la nacioj, ĉar iliaj lingvoj pretendas havi egalvaloran rajton, esti elektitaj kiel internacia; ankaŭ la nacio de la elektita lingvo tiom profitus rilate al politiko, politika ekonomio kaj ĝeneralaj kulturaj aferoj, ke la aliaj ne povus konsenti.
2. La plej konsiderindaj lingvoj ne taŭgas kiel internacia lingvo pro sia forta karaktero politika aŭ nacia; krom tio ĉiuj naciaj lingvoj, ankaŭ la malplej malfacilaj, — ili ja ne estas konstruitaj laŭ la leĝoj de la logiko — pro sia ortografio kaj elparolado, pro la abundeco de formoj kaj reguloj kun multegaj esceptoj kaj pro la komplikita sintakso estas tiel malfacile lerneblaj, ke la plimulto de alinacianoj ne kapablas akiri ilin sufiĉe perfekte.
3. La naciaj lingvoj ne estas sufiĉe flekseblaj, por povi aldoni al sia vortotrezoro en la internacie plej taŭga formo la internacie plej taŭgajn vortojn por la precipe de eltrov-istoj kaj esploristoj nove starigitaj ideoj.

3. Kion vi scias pri la diversaj projektoj de lingvo internacia?

Kiel patron de la ideo pri lingvo tutmonda oni ordinare konsideras la filozofon Leibniz¹⁾. La unuaj projektoj estas bazitaj sur komunaj skribaj signoj, sur matematikaj formuloj, ciferoj, sur muziko, sur arbitra mallongigo ktp. Sed iom post iom oni komprenis, ke per tio oni neniam atingos la celon, kaj ke sole fonetika vorta lingvo, imitanta la naturajn lingvojn, taŭge solvos la problemon. Oni pro tio konstruis artefaritajn lingvojn baziĝantajn sur la latina, franca, angla, germana lingvoj aŭ sur kelkaj el ili sam-

¹⁾ Sed komparu: Dro Dietterle, Leibniz kiel antaŭbatalinto por nia ideo de mondhelplingvo — eraro! (La Vendreda Klubo, F. Hirt & Sohn en Leipzig).

tempe. Mi citas nur: Latina lingvo alfarita al komerco, Latino sen flexione, Novilatin, Interlingvo, Lingvo Internazional, Nuove Roman, Langue bleue, Universal, Idiom neutral kaj Reform-Neutral, Occidental, Parlamento, Esperantido, Tutonisch, Wede. Entute oni registras pli ol 150 projektojn. Detalojn pri ili liveras la grava verko: „Historio de la lingvo universala“ de Prof-roj Couturat kaj Leau (en franca lingvo). Vidu ankaŭ: L. Einstein; Al la historio de la provoj de la lingvoj tutmondaj de Leibniz ĝis la nuna tempo (Dro Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, paĝo 5).

B. Volapük

4. Kio estas Volapük?

Volapük estas eltrovaĵo de l' germana pastro Johann Martin Schleyer, kiu publikigis sian lingvon en la fino de l' jaro 1880a.

Dro Zamenhof, en sia malferma parolado ĉe la Unua Kongreso de Esperanto en Bulonjo-apud-maro (Boulogne-sur-mer) diris: „Sed antaŭ ol mi parolos pri la batalantoj speciale esperantistaj, mi sentas la devon diri ĉi tie kelkajn vortojn pri unu homo, kiu havas tre grandajn meritojn en nia afero kaj al kiu bedaŭrinde la Esperantistoj ofte rilatas maljuste nur tial, ĉar li, multe farinte por la ideo de lingvo internacia ĝenerale, ne apartenas tamen al la amikoj de tiu speciala lingva formo, por kiu ni batalas. Mi parolas pri la tre estiminda s-ro *Johann Martin Schleyer*, la aŭtoro de Volapük. La lingva formo, por kiu laboris tiu respektata maljunulo, montriĝis ne praktika; la vojo, kiun li elektis, montriĝis ne bona, kaj la afero, por kiu li batalis, baldaŭ falis, kaj per sia falo ĝi alportis grandan malutilon al nia ideo entute kaj precipe al tiu speciala formo de la ideo, por kiu ni batalas. Sed ni devas esti justaj, ni devas taksi ĉiun homon ne laŭ lia venko aŭ malvenko, sed laŭ liaj laboroj. Kaj la laboroj kaj meritoj de s-ro *Schleyer* estis tre grandaj.

Kun granda fervoro li laboris por la ideo de lingvo internacia en la daŭro de multaj jaroj; dum multaj personoj donadis nur nudajn *projektojn*, li estis la unua, kiu havis sufiĉe da pacienco, por ellabori plenan lingvon de la komenco ĝis la fino (kvankam Esperanto tiam estis jam preta, ĝi ne estis ankoraŭ publikigita), kaj ĝi ne estas lia kulpo, se la lingvo montriĝis ne praktika. Li estis la unua, kiu per senlaca laborado vekis la intereson de la mondo por la ideo de lingvo neŭtrala, kaj ĝi ne estas lia kulpo, se lia falinta afero por longa tempo malvarmigis la mondon por ĉia arta lingvo. Li volis fari grandan bonon, kaj por la atingo de tiu bono li laboris tre multe kaj fervore, kaj ni devas lin taksi ne laŭ lia sukceso, sed laŭ lia volo kaj laboro. Se la ideo de lingvo internacia iam venkos la mondon — tute egale, ĉu ĝi estos sub la formo de Esperanto aŭ de alia lingvo — la nomo de *Schleyer* okupos ĉiam plej honoran lokon en la historio de nia ideo, kaj tiun ĉi nomon la mondo neniam forgesos. Mi esperas, ke mi esprimos la opinion de ĉiuj partoprenantoj en nia kongreso, se mi diros: „Ni esprimas nian koran dankon al s-ro *Schleyer*, la unua kaj plej energia pioniro de la ideo de neŭtrala lingvo internacia!“

5. Laŭ kiuj principoj Volapük estas konstruita?

Volapük estas konstruita laŭ la principo de laŭeble plej granda mallongeco. La gramatiko nepre estas simpla kaj facila. Prefiksoj kaj afiksoj estas uzitaj kiel elementoj de vortfarado. La vortoj estas elprenitaj el eŭropaj lingvoj (trione el la angla, kvarone el la latina kaj ties derivaĵoj, kvinone el la germana lingvoj), sed arbitre ŝanĝitaj ĝis nere konebleco. La vorto Volapük ekzemple venas el la du anglaj vortoj *world* kaj *speak*.

Krome ĝi senutile forĵetis la literon *r*, ĉar la Ĥinoj ne povas ĝin elparoli; sed aliflanke ĝi uzas la sonojn *ä, ö, ü*, kiuj ne estas internaciaj kaj por kelkaj popoloj neelparoleblaj. La nombro de la unusilabaj vortoj, nur diferencantaj per unu litero kaj tial malfacile diferencigeblaj per la orelo, estas supermezure granda, ekz. bad, fad, gad,

jad, kad, lad, nad, yad, zad. Tiel Volapük solvis la problemon pri gramatiko, sed ne la gravan demandon pri vortaro.


6. Ĉu Volapük sukcesis?

La bezono pri helpa lingvo estis tiom granda, ke multaj homoj lernis Volapük, malgraŭ ĝia nebonsoneco, arbitreco kaj malfacileco. Ĝiaj eĉ plej favoraj adeptoj, unue entuziasmoplenaj pri la efektivigo de la ĝis tiam nesolvita problemo, vane provis ĝin plisimpligi. La tri kongresoj de Volapük¹⁾ klare montris la neparoleblecon de la lingvo. „Kun ĉiu nova vorto aŭ formo la lingvo devis konstante dependi de la decidoj de unu persono aŭ de facile inter si malspacigonta personaro.“²⁾ „Absoluta manko de natura evolupovo“ montriĝis. Tiel la lingvo fine pereis.

La malsukceso de Volapük tre multe malutilis la ideon pri lingvo artefarita, kaj multaj, se ne la plejmulto, opiniis tion nediskutebla pruvo, ke la kreo de internacia lingvo estas neebla kaj utopio.

¹⁾ Friedrichshafen (1884), München (1887) kaj Paris (1889). Detalojn pri ili oni trovas en la franclingva „Historio de la universala lingvo“ de s-ro Couturat.

²⁾ Vidu: Parolado de Dro Zamenhof ĉe la malfermo de la Sepa Kongreso Esperantista en Antwerpen, la 21an de Aŭgusto 1911 (Dro Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, p. 96).



II. Historio de Esperanto¹⁾

Ia (Krea) Periodo (antaŭ 1887)

7. Kiu estas la aŭtoro de Esperanto?

La aŭtoro de Esperanto estas pola okulkuracisto, Dro Lazaro Ludoviko Zamenhof.

8. Kion vi scias pri la vivo de Dro Zamenhof?²⁾

Dro Zamenhof naskiĝis la 15an de Decembro 1859 en Bialystok (gubernio de Grodno, rusa Polujo). Lia patro havis lernejon kaj krom tio donadis privatajn lecionojn de germana kaj franca lingvoj; pli malfrue li ricevis la oficon de profesoro de la regna Varsovia reala lernejo. Zamenhof estis unue lernanto de la Bialystoka reala lernejo, poste de la Varsovia 2a gimnazio. Fininte la kurson gimnazian en Junio 1879, li studis medicinon en la universitatoj de Moskvo kaj de Varsovio. En Januaro 1885 li ricevis la diplomon de kuracisto. Ĉar li pro sia

¹⁾ A. Fiŝer, Historieto de Esperanto. Tiflis, Presejo Esperanto, 1911.
E. Privat, Historio de la lingvo Esperanto. Genève, Universala Esperantia Librejo, 1912.

A. Zakrzewski, Historio de Esperanto 1887—1912. Varsovio, Gebethner & Wolff, 1913.

Esperantista Dokumentaro pri la oficialaj, historiaj, bibliografiaj kaj statistikaj aferoj (Centra Oficejo Esperantista, Paris).

²⁾ Dro Leono Zamenhof, El la biografio de Dro L. L. Zamenhof (Dro Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, p. 15).

Edmond Privat, Dro Zamenhof, lia vivo kaj lia verko.

tro impresebla karaktero tro multe suferis morale en sia rolo de „kuracisto por ĉio“, li studis en Varsovio kaj en Wien en specialaj kursoj por okulistoj. De post aŭtuno de la jaro 1886a li praktikadis kiel okulisto en Varsovio, Brest-Litovsk, Ĥerson (en suda Rusujo), en Varsovio, en Grodno kaj de post Novembro 1897 denove en Varsovio. Tie li mortis la 14an de Aprilo 1917.

9. Kio donis al li la ideon pri internacia lingvo?

La loĝantaro de lia naskiĝa urbo konsistis el rusoj, poloj, germanoj kaj hebreoj, parolantaj kvar malsamajn lingvojn, kiuj, pro neebleco interkompreni sin reciproke, tre ofte interbatalis kaj konsideris unu alian kiel malamikon. Komprenante, ke „la diverseco de lingvoj estas la sola aŭ almenaŭ la ĉefa kaŭzo, kiu disigas la homan familion, kaj dividas ĝin en malamikajn partojn“, Dro Zamenhof ekpensis pri la plej bona rimedo, aliigi tiun staton kaj *pro homamo* ekklopodis realigi sian revon. Li mem rakontas en sia „Letero pri la deveno de Esperanto“¹⁾: „Oni edukadis min kiel idealiston, oni min instruis, ke ĉiuj homoj estas fratoj, kaj dume sur la strato kaj sur la korto, ĉio ĉe ĉiu paŝo igis min senti, ke *homoj* ne ekzistas; ekzistas nur rusoj, poloj, germanoj, hebreoj, k. c.“ „Doloro pri la mondo“ turmentas lian infanan animon, revantan pri forigo al tiu malbono.

10. Kion vi scias pri liaj unuaj laboroj? Ilia rezultato?

Forĵetinte la unuajn infanajn utopiojn pri la rimedo uzota por alkonduki pacon kaj fratecon inter la homoj, Dro Zamenhof konsciiĝis, ke neniu vivanta lingvo, kiel ankaŭ neniu mortinta idiomo, kiel la greka aŭ latina,

¹⁾ Gazeto „Lingvo Internacia“, 1897, n-oj 6 kaj 7. — Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, p. 22.

povas plenumi la rolon de internacia interkomprenilo, kaj klopodis al nova artefarita lingvo. La germanan kaj francan lingvojn li estis ellerninta dum la infaneco, kaj li opiniis komplikajn deklinaciojn kaj konjugaciojn necesaj por sia nova lingvo; sed ĉe la studo de la angla, la simpleco de ĝia gramatiko frapis lian atenton. „Mi rimarkis tiam,“ li diras, „ke la riĉeco de gramatikaj formoj estas nur blinda historia okazo, sed ne estas necesa por la lingvo. Sub tia influo, mi komencis serĉi en la lingvo kaj forĵetadi la senbezonaĵojn formojn, kaj mi rimarkis, ke la gramatiko ĉiam pli kaj pli degelas en miaj manoj, kaj baldaŭ mi venis al la gramatiko plej malgranda, kiu okupis sen malutilo por la lingvo ne pli ol kelkajn paĝojn. Tiam mi komencis pli serioze fordoniĝadi al mia revo. Sed la grandegulaj vortaroj ne lasadis min trankvila.“

Decida momento en lia serĉado estis, kiam, ankoraŭ lernanto en la 6a aŭ 7a klaso de la gimnazio, li rimarkis la surskribojn *Ŝvejcarskaja* (Drinkejo) kaj poste la elpendaĵon *Konditorskaja* (sukeraĵejo). „Tiu ĉi skaja ekinteresis min,“ li skribis, „kaj montris al mi, ke la sufiksoj donas la eblon, el unu vorto fari aliajn vortojn, kiujn oni ne bezonas aparte ellernadi. Tiu ĉi penso ekposedis min tute, kaj mi subite eksentis la teron sub la piedoj. Sur la terurajn grandegajn vortarojn falis radio de lumo, kaj ili komencis rapide malgrandiĝi antaŭ miaj okuloj. „La problemo estas solvita!“ — diris mi tiam. Mi kaptis la ideojn pri sufiksoj kaj komencis multe labori en tiu ĉi direkto. Mi komprenis, kian grandan signifon povas havi por la lingvo konscie kreata la plena uzado de tia forto, kiu en lingvoj naturaj efikis nur parte, blinde, neregule kaj neplene. Mi komencis komparadi vortojn, serĉadi inter ili konstantajn, difinitajn rilatojn, kaj ĉiutage mi forĵetadis el la vortaro novan grandegan serion da vortoj, anstataŭante tiun ĉi grandegon per unu sufikso,

kiu signifis certan rilaton. Mi rimarkis tiam, ke tre granda amaso da vortoj pure *radikaj* (ekz. „patrino“, „mallarĝa“, „tranĉilo“ k. t. p.) povus esti facile transformitaj en vortojn *formitajn* kaj malaperi el la vortaro. La meĥaniko de la lingvo estis antaŭ mi kvazaŭ sur la manplato, kaj mi nun komencis jam laboradi regule, kun amo kaj espero. Baldaŭ post tio mi jam havis skribita la tutan gramatikon kaj malgrandan vortaron.“

Dezirante akiri laŭeble grandan mallongecon, li provis esprimi ideojn per elpensitaj unu- aŭ duliteraj vortoj, sed tre baldaŭ li forlasis tiun tute netaŭgan metodon kaj konvinkiĝis, ke la materialo por la vortaro devas esti romana-germana, ŝanĝita nur tiom, kiom postulas la reguleco kaj aliaj gravaj kondiĉoj de la lingvo. „Estante jam sur tiu ĉi tero“, skribas la majstro, „mi baldaŭ rimarkis, ke la nunaj lingvoj posedas grandegan provizon da pretaj vortoj jam internaciaj, kiuj estas konataj al ĉiuj popoloj kaj formas trezoron por estonta lingvo internacia — kaj mi kompreneble utiligis tiun ĉi trezoron.“

„En la jaro 1878a la lingvo estis jam pli-malpli preta, kvankam inter la tiama „lingwe uniwersale“ kaj la nuna Esperanto estis ankoraŭ granda diferenco.“

Liaj kamaradoj de la 8a klaso plejmulte estis allogataj de la ideo kaj de la grandega facileco de l' lingvo kaj eklernis ĝin. La 5an de Decembro 1878 ili solene festis la ekvivon de la lingvo. Krom gramatiko kaj vortaro, kelkaj tradukoj estis pretaj.

Dro Zamenhof, tro juna tiam por eliri publike kun sia laboro, decidis atendi. Elirinte baldaŭ poste el la gimnazio, li denove estis tute sola. Dum 5 1/2 jaroj li studis en la universitato, kaŝante siajn pensojn kaj planojn, sen inklino al distro, sen amuzo. Dum ĉi tiuj kaj kelkaj pliaj jaroj li laboris, perfektigante kaj provante la lingvon kaj formante tiun „nekapteblan ion“, donantan al la lingvo

vivon kaj difinitan, tute formitan „*spiriton*“, kies nescio estas lakaŭzo de multpeza, malbona, kvankam korekta stilo.

P. S. Dro Zamenhof, kreante sian lingvon, nenion sciis pri Volapük, kiun li ekkonis nur, kiam Esperanto estis jam tute preta.

IIa (Kelk- kaj multenacia) Periodo (de 1887 bis 1905)

11. Kiam Dro Zamenhof publikigis sian sistemon?

Fininte sian universitatan lerntempon kaj komencinte sian medicinan praktikon, li pretigis la manuskripton de sia unua broŝuro (Esperanto. Lingvo Internacia. Antaŭparolo kaj plena lernolibro). Vane serĉinte eldonanton dum du jaroj, li fine eldonis mem sian broŝuron en Julio 1887 en rusa lingvo, sed en la sama jaro ankaŭ en pola, franca kaj germana lingvoj¹⁾.

12. Donu kelkajn detalojn pri la unuaj jaroj.

La unuaj esperantistoj estis precipe rusoj, svedoj kaj nemultaj germanoj. En la jaro 1889a elvenis en Nürnberg la unua esperantista gazeto²⁾ kun la titolo „La Esperantisto“, eldonata de L. Einstein, redaktata de Dro Zamenhof, helpanta la studon pri la lingvo per publikado de bonaj tekstoj, formanta ligilon inter la diverslandaj esperantistoj. Ĝi estis savata en kriza momento per monhelpo de la fervora germana pioniro Trompeter. En la jaro 1895a la rusa cenzuro malpermesis ĝian eniron en la landon, ĉar ĝi publikigis tradukon de artikoloj de la fama rusa verkisto Tolstoj. Sekve de tio ĝi perdis tri kvaronojn

¹⁾ Por pliaj detaloj oni legu la „Zamenhofan numeron“ de „Universo“ (Heckners Verlag, Wolfenbüttel).

²⁾ A. Zakrzewski, La unua gazeto Esperantista (Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, p. 39).

de siaj abonantoj kaj ne plu povis aperi. Ĝin anstataŭis la nova gazeto: „Lingvo Internacia“, aperanta en Svedujo el presejo de Upsala kaj transloĝiganta en 1902 Paris-on, kie ĝi estis eldonata sub gvidado de P. Fruictier kaj poste de Prof-ro Cart ĝis 1914. Ĝi subtenis la malfacilan progresadon de la lingvo, kiu ĝis la jaro 1900a restis preskaŭ tute nekonata en multaj landoj eŭropaj. Tiam kelkaj universitataj profesoroj kaj aliaj aĝemaj personoj kaj la potenca franca „Touring-Club“ komencis energie propagandi la lingvon en tuta Francujo; baldaŭ fondiĝis multaj grupoj esperantistaj en ĉiuj iom grandaj urboj. Tiu movado atingis baldaŭ ankaŭ aliajn landojn; malnovaj amikoj en Rusujo, Svedujo, Germanujo, Aŭstrio-Hungarujo, Italujo vekiĝis, kaj la movado ekdisvastiĝis.

13. Sur kio Esperanto estas bazita? (Principo de internacieco.)

Esperanto estas verdire ne pure „*eltrovita*“ lingvo, sed pli bone genia elserĉado kaj kunmetado el la *internaciaj elementoj* troviĝantaj en la vivantaj lingvoj; tiujn lastajn Dro Zamenhof uzis por formi la kernon de sia nova lingvo; la aliajn vortojn li elektis laŭ la *principo de internacieco*, t. e. elektata estas, por traduki ideon, radiko trovebla en laŭeble multaj lingvoj aŭ, pli bone dirite, komprenebla sen antaŭa studo por la plej multaj homoj. La radiko *lern* ekzemple estas konata sen studo de la angloj: *learn*, kaj de la germanoj: *lernen*, do laŭeble plej internacia; aliaj ekzemploj: *ranca*, *honest*, *pura*, *fingro*, *sendi* k. c. Por helpi facilan kompreneblon, Dro Zamenhof laŭeble klopodis ne ŝanĝi la skribmanieron de la vorto aŭ ŝanĝi tiun almenaŭ plej malmulte; tion li atingis starigante la principon: *unu litero, unu sono*. Ekzemplo: A. garden, G. Garten, F. jardin, H. jardin, I. giardino, E. ĝardeno. Aliaj ekzemploj: A. muscle, heaven, G. Mus-

kel, Himmel, F. muscle, ciel, H. musculo, cielo, I. muscolo, cielo, E. muskolo, ĉielo¹⁾).

La *principo de internacieco* povas esti sekvata pli severe ol en Esperanto, sed la ekvilibro inter la nacioj estus per tio rompata, kaj la lingvo iĝus tro romana, t. e. ne same facila kaj neŭtrala por ĉiuj diverslingvanoj. La plejmulto de l' radikoj estas romana (proksimume nur 30⁰/_o germanaj kaj 10⁰/_o slavaj); sed la akuzativo kaj esencaj elementoj de la vortfarado, precipe la tre grava eblo de ampleksa kunmetado, estas germanaj, aliaj gravaj gramatikaj elementoj estas slavaj. Tial romanoj, germanoj kaj slavoĵ lernas la lingvon same rapide kaj facile. La gramatiko enhavas nur 16 regulojn sen esceptoj; por la verboj estas nur 12 finaĵoj; ĉiu vorto havas sian propran kaj ununuran signifon. Dro Zamenhof instinkte, genie trafis la ĝustan, praktike plej logikan solvon de tiu problemo, kiu ĝis la apero de Esperanto restis nesolvita. Esperanto realigas la principojn: „La lingvo internacia devas havi gramatikon plej simplan kaj naturan, ortografion tute fonetikan, belsonecon agrablan al la oreloj kaj vortaron konsistantan el la plej komunaj radikformoj inter la ĉefaj eŭropaj lingvoj de l' aria fonto“. Malgraŭ sia simpla konstruo ĝi estas kapabla, senĉese pliriĉiĝi kaj plinuanciĝi, kiel ja montras la jam tre granda literaturo, originala kaj tradukita, aperinta de l' jaro 1887a.

14. Kio estas la Fundamento? Laŭ kiuj principoj devas evolui Esperanto?²⁾

La *Fundamento de Esperanto* konsistas el la tri verkoj de Dro Zamenhof: 16-regula Gramatiko, Universala Vortaro kaj Ekzercaro, elektitaj laŭ la propono de nia

¹⁾ Vidu „Naŭlingva Etimologia Leksikono“ de Bastien (Paris, Presa Esperantista Societo).

²⁾ E. Privat, Historio de la lingvo Esperanto, p. 23—27.

Majstro dum la la Universala Kongreso de Esperanto kiel *netuŝebla bazo* de la lingvo.

Tio tute ne signifas, ke ili estas „tabu“, t. e. sanktaj fetiŝoj por ni, kiujn ni devas blinde adori malgraŭ iliaj videblaj mankoj, sed ke, laŭ nia opinio, internacia lingvo devas, se ĝi ne volas baldaŭ fali en dialektojn kaj anarĥion, havi fundamentajn, direktajn principojn. Eraroj estas en la Fundamento¹⁾, certe, sed per la tempo aliaj vortoj kaj esprimoj anstataŭos la erarajn, kiuj iĝos arĥaismoj, t. e. sen skuo, sen rompo, laŭ la evolua metodo de vivantaj lingvoj, dank' al kiu tekstoj skribitaj antaŭ pli ol 20 jaroj restas ĉiam plene kompreneblaj por ĉiuj, evidente sub la *kontrolo* kaj laŭokaza *reguligo* de la Lingva Komitato (L. K.)


En la intereso de l' granda afero, por kiu ni laboras kaj de l' grandaj celoj atingotaj, konsciante pri la graveco de internacia lingvo por la homaro kaj samtempe pri la grandega danĝero de malbone komprenita progreseco, ni volonte akceptis tiun fundamentan bazon, kies principoj havas sufiĉe vastan elastecon por neniel bari la evoluon de Esperanto kaj aliflanke doni al tiu evoluado altŝatindan karakteron de konstanteco, de kontinueco. La prudentoplena antaŭparolo al la „Fundamento“, de Dro Zamenhof, estas bedaŭrinde nekonata de tre multaj.

En tiu antaŭparolo²⁾ nia Majstro esprimas sin jenmaniere:

„Mi diris, ke la fundamento de nia lingvo devas esti absolute netuŝebla, se eĉ ŝajnus al ni, ke tiu aŭ alia punkto estas sendube erara. Tio ĉi povus naski la penson, ke nia lingvo restos ĉiam rigida kaj neniam disvolviĝos . . . Ho, ne! Malgraŭ la severa netuŝebleco de la fundamento, nia lingvo havos la plenan eblon, ne sole konstante riĉiĝadi, sed eĉ konstante *pliboniĝadi* kaj *perfektiĝadi*; la netuŝebleco de la fundamento nur garantios al ni konstante, ke tiu perfektiĝado fariĝos ne per arbitra, interbatala kaj ruiniga *rompado* kaj ŝanĝado, ne per nuligado aŭ sentaŭgigado de nia ĝisnuna literaturo, sed per vojo natura, senkonfuza kaj sendanĝera“.

¹⁾ Kompreneble neniu havas la devon, imiti precize la evidentajn malbonaĵojn de la Fundamento.

²⁾ Antaŭparolo al la „Fundamento de Esperanto“ (Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, p. 170).



Kaj nia Majstro daŭrigas, montrante al ni tiun perfektigadon per vojo de novaj vortoj kaj de neologismoj. Kaj li insiste konsilas al ni, procedi *sen rompo*. Antaŭ kelka tempo aperis en la gazetoj la vorto *kontinueco*, sinonimo de *senrompado*, kaj kiu ŝajnas al mi tre bona, ĉar ĝi enhavas la ideon de evolucio kaj progresado, sed reguligitaj de konstanta leĝo. Do ĉiujn novaĵojn, kiujn oni povas enkonduki en Esperanton, ne malformante, sed kontraŭe plenigante kaj pliperfektigante ĝin, la Lingva Komitato povas kaj devas esplori: ĝi devas kontraŭe formeti pli-malpli definitive ĉiujn proponojn, kiuj ne havas alian celon, ol kontentigi pure teoriajn postulojn kaj farus la lingvon pli malfacile uzebla aŭ eĉ nerekoncible sen ia praktika utileco. Antaŭ ĉio ni devas eviti, ke la Internacia Lingvo simulu tiujn Oceanajn idiomojn, pri kiuj parolas Max Müller, kiuj entute ŝanĝiĝas dum la daŭro de unu jaro tiamaniere, ke la militistoj foririntaj por militiro, kiam ili revenas al la maljunuloj, virinoj kaj infanoj lasitaj hejme, ne plu komprenas ilin, nek estas komprenataj de ili. Tiel farante, ni obeos la vere sciencan spiriton multe pli efektive ol tiuj personoj, kiuj en la nomo de idealo, de abstrakta kaj simple logika perfekteco, volas en unu tago ŝanĝi nian lingvon, same kiel oni ŝanĝas vestojn ĉiufoje, kiam aperas nova modo. (Raporto de s-ro E. Boirac dum la IVa Universala Kongreso. Vidu: Oficiala Gazeto, 1a jaro, p. 90/91a).

15. Ĉu estas ĉefuloj en Esperantismo?

Vidu la Bulonjan Deklaracion, 3 kaj 4 (en 17a Dem.).

16. Kie Esperanto estis unue diskonigata? Pere de kiu? ¹⁾

En la periodo 1887—1905 de la historio de Esperanto oni povas distingi tri subperiodojn¹⁾: 1. la *rusa* (ĝis 1896),

¹⁾ Dro K. Bein, Parolado dum la I-a Kongreso de Esperanto en Bulonjo-apud-maro (1905).

K. Steier, La unua tempo de Esperanto en Germanlingvujo (Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, p. 32).

Dro Zamenhof, Leopold Einstein (Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, p. 37).

ĉar la plej multaj unuaj adeptoj, propagandantoj kaj verkantoj estis rusoj: Kofmann, Gernet, Zinovjev, Poŝnikov, Ostrowski kaj multaj aliaj. Dum tiu periodo laboris la neforgesindaj homoj: Waŝniewski kaj Grabowski († 1921) en Polujo, Einstein († 1890) kaj Trompeter († 1901) en Germanujo, L. de Beaufront en Francujo, Nylén kaj Langlet en Svedujo. La rusa periodo estas la tempo de la malfacila batalado de la unuaj pioniroj kontraŭ la homaj indiferenteco kaj skeptikeco. Dum ĉi tiu periodo la disvastiĝo de Esperanto estis malhelpata per vigla agitado por diversaj reformproponoj; aliflanke per bonegaj tradukoj kaj originalaĵoj la lingvo fariĝis pli fleksebla kaj pli vivanta kaj alprenis pli kaj pli „propran spiriton“ (v. 10a Dem.); 2. la *franca*, dank' al la tre granda laborado precipe de L. de Beaufront, kiu en la jaro 1898a fondis la „Francan Societon por propagando de Esperanto“ kaj la gazeton „l'Esperantiste“. L. de Beaufront verkis tre gravajn verkojn pri la gramatiko, sintakso kaj vortaro de Esperanto. Krom li en Francujo laboradis aliaj tre agemaj personoj, kiel generalo Sebert, Prof-ro Cart, Prof-ro Boirac († 1917), Prof-ro Bourlet († 1913), Gaston Moch, P. Fruictier, Gabriel Chavet k. a. La grava librejo Hachette & K^{io} ¹⁾ en Paris eldonis lernolibrojn kaj vortarojn; 3. la *multenacia* estas la tempo de l' rapida disvastiĝo en multaj diversaj landoj, de l' naskiĝo de Esperantujo. Dum la jaroj 1902—1904a gazetoj kaj propagandaj societoj fondiĝis en Belgujo, Bohemujo, Britujo, Bulgario, Ĉilio, Germanujo, Hispanujo, Hungarujo, Kanado, Meksikio, Nederlando, Peruo. En Germanujo ekestis la grava Esperanto-Eldonejo Möller & Borel, Berlin. Eminentaj propagandistoj estis en Britujo: J. Rhodes, H. Bolingbroke Mudie († 1916), Ĉefeĉ (= H. F. Höveler,

¹⁾ Firma Hachette kaj Esperanto (Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, p. 45)

1417
† 1918), kolonelo John Pollen, A. Wackrill k. a.; en Germanujo: J. Borel, Dro Mybs, Prof-ro Christaller, Dro A. Schmidt k. a. Dum tiu periodo „ĉiu idiomo donacas al Esperanto ion el sia trezorejo, pliriĉigante ĝian frazeologion“, igante ĝin kapabla, ĉion nuancoplene esprimi, sed ankaŭ bedaŭrinde enmetas en ĝin idiotismojn, naciajn esprimojn, kiujn la vere internacia periodo devas malaperigi. Dum tiu lasta oni pensas kaj skribas ne nur Esperante, sed ankaŭ internacie, egale kompreneble al ĉiuj nacioj, ĉar „la principo de l' internacieco devas ĉiam superi ĉiujn aliajn“.

IIIa (Internacia) Periodo (1905 ĝis nun)

Tiu periodo estas karakterizita per intensa propagando en la tuta mondo. Esperanto estas konata en ĉiuj landoj. Oni ankaŭ energie klopodas utiligi Esperanton al la praktika vivo.

La progreson de la Esperanta movado multe helpas la Universalaj Kongresoj.

X 17. Kion vi scias pri la Ia Universala Kongreso de Esperanto?¹⁾

Ĝi okazis en la jaro 1905a (5a—13a de Aŭgusto) en *Boulogne-sur-mer* (Francujo)¹⁾. Partoprenis ĉirkaŭ 800 personoj. Prezidis A. Michau kaj Prof-ro Boirac. La unuan fojon kunestis samcelantoj el la tuta mondo, lernintaj Esperanton hejme, kaj dank' al tiu lingvo, mirige simpla kaj facila, genie konstruita, ili komprenis sin reci-

¹⁾ La Unua Kongreso Universala de Esperanto (Esperantista Dokumentaro) kaj Detala Raporto pri la Kongreso de Boulogne s. M. de pastro Schneeberger. Parolado de Dro L. L. Zamenhof ĉe la malfermo de la Unua Kongreso Esperantista en Boulogne s. M., la 5an de Aŭgusto 1905, (Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, p. 53).

proke. La elparolado tre rapide tute egaliĝis, kaj de tiām la diversaj lernolibroj montris ĝin laŭ tute egala maniero. Dum tiu kongreso, *Lingva Komitato* sub la prezido de Dro Zamenhof estis provizore elektata kun la tasko, konsiliĝi kun la Majstro pri ĉiuj demandoj rilatantaj al la lingvo (vidu 33an Demandon.)

„Ĝi decidis mem pri sia organizado kaj funkciado, ĉu elektante oficistaron, ĉu dividiĝante en grupojn“. La sidejo estas ĉe la Esperantista Centra Oficejo en Paris (vidu 35an Dem.). Laŭ deziro de Dro Zamenhof, Prof-ro Boirac efektivigis la direktadon de la L. K.

La de ĉiu esperantisto nepre koninda, se ne jam konata *Deklaracio pri Esperantismo*, entenanta la difinojn de l' vortoj Esperantismo kaj Esperantisto, estis akceptata de l' kongresanaro kaj poste de l' tuta tiama esperantistaro.

Deklaracio pri Esperantismo

(Oficiala teksto de la Bulonja Kongreso)

Ĉar pri la esenco de la Esperantismo multaj havas tre malveran ideon, tial ni subskribintoj, reprezentantoj de la Esperantismo en diversaj landoj de la mondo, kunvenintaj al la internacia Kongreso Esperantista en Bulonjo-apud-maro, trovis necesa laŭ la propono de la aŭtoro de la lingvo Esperanto doni la sekvantan klarigon:

Kio estas Esperantismo?

1. La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu „ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn“, donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povas esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj. Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia esperantisto ligas kun la Espe-

rantismo, estos lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas.

Kial Esperanto?

2. Ĉar en la nuna tempo neniu esploranto en la tuta mondo jam dubas pri tio, ke lingvo internacia povas esti nur lingvo arta, kaj ĉar el ĉiuj multegaj provoj faritaj en la daŭro de la lastaj du centjaroj, ĉiuj prezentas nur teroriajn projektojn, kaj lingvo efektive finita, ĉiuflanke elprovita, perfekte vivipova kaj en ĉiuj rilatoj plej taŭga montriĝis nur unu sola lingvo, Esperanto, tial la amikoj de la ideo de lingvo internacia, konsciante ke teoria disputado kondukos al nenio kaj ke la celo povas esti atingita nur per laborado praktika, jam de longe ĉiuj grupiĝis ĉirkaŭ la sola lingvo Esperanto kaj laboras por ĝia disvastigado kaj riĉigado de ĝia literaturo.

Kiu estas mastro de la lingvo?

3. Ĉar la aŭtoro de la lingvo Esperanto tuj en la komenco rifuzis unu fojon por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn kaj privilegiojn rilate tiun lingvon, tial Esperanto estas „nenies propraĵo“, nek en rilato materiala, nek en rilato morala.

Materiala mastro de tiu ĉi lingvo estas la tuta mondo, kaj ĉiu deziranto povas eldonadi en aŭ pri tiu ĉi lingvo ĉiajn verkojn, kiajn li deziras, kaj uzadi la lingvon por ĉiaj eblaj celoj; kiel spiritaĵoj mastroj de tiu lingvo estos ĉiam rigardataj tiuj personoj, kiuj de la mondo esperantista estos konfesataj kiel la plej bonaj kaj plej talentaj verkistoj en tiu ĉi lingvo.

Kio estas la Fundamento?

4. Esperanto havas neniun personan leĝdonanton kaj dependas de neniu aparta homo. Ĉiuj opinioj kaj verkoj de la kreinto de Esperanto havas, simile al la opinioj kaj verkoj de ĉiu alia esperantisto, karakteron absolute privatan kaj por neniu devigan. La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo „Fundamento de Esperanto“, en kiu neniu havas la rajton fari ŝanĝon. Se iu dekliniĝas de la reguloj kaj modeloj donitaj en la dirita verko, li neniam povas pravigi sin per la vortoj „tiel deziras aŭ

konsilas la aŭtoro de Esperanto“. Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimita per tiu materialo, kiu troviĝas en la „Fundamento de Esperanto“, ĉiu esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo. Sed pro plena unueco de la lingvo al ĉiuj esperantistoj estas rekomendate, imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton.

Kio estas Esperantisto?

5. Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al ia aktiva societo esperantista por ĉiu esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga.

Dum la la Kongreso ankaŭ estis elektata *Organiza Komitato* (el kiu stariĝis dum la Ila Kongreso en 1906 la *Konstanta Komitato* de la Kongresoj; vidu 36an Dem.), por organizi la venontan kongreson kaj esplori interkongresajn demandojn.

Kelkan tempon poste fondiĝis en Paris, en 51 rue de Clichy, la *Esperantista Centra Oficejo* (vidu 36an Dem.) laŭ iniciato de generalo Sebert. Ĝi estis *privata* fondaĵo, organizita de kelkaj amikoj de Esperanto kaj finance subtenata de ili. La Esperanta flago estis akceptata. Dum la kongreso okazis ekspozicio, literaturaj konkursoj, internacia balo, koncerto. Oni prezentis la teatraĵojn: *Edziĝo kontraŭvola* (Molière), *Mensogo pro amo*. Dro Zamenhof estis distingata per la kruco de la Honora Legio.

La kongreso estis sekvata de ekskurso al Anglujo (Folkstone, Dover), kie Dro Zamenhof estis *oficiale* kaj plej gastame akceptata en diversaj urboj de la suda marbordo.

Jam en la jaro 1904 okazis en marbordaj urboj de Anglujo kaj Francujo kunestoj de ambaŭnaciaj samideanoj, kiel ankaŭ en Barcelono.

18. Kion vi scias pri la IIa Universala Kongreso de Esperanto?¹⁾

Ĝi okazis en 1906 (27a de Aŭgusto — 5a de Septembro) en *Genève* (Svisujo) sub la prezidado de pastro Schneeberger. Partoprenis ĉirkaŭ 1200 personoj. La kongreso esprimis la deziron, ke dum ĉiuj kongresaj kunsidoj nur Esperanto estu parolata. Tio efektive ĉiam okazis, ĉar tute nature estas por la esperantistoj, klopodante diskonigi sian lingvon kaj prezenti ĝin kiel facilan kaj simplan solvon de l' problemo pri lingvo internacia, doni mem la plej grandan pruvon pri ĝia taŭgo kaj uzi ĝin en siaj interrilatoj, en siaj diskutoj, ĉu pri ordinaraj, ĉu pri teknikaj temoj. La kongreso esprimis ankaŭ la deziron, ke la *Lingva Komitato* restu definitiva kaj publikigu aldonon al la Universala Vortaro; ĝi dankis al la Lingva Komitato pro ĝia ĝistiam agado. (Raporto pri ekzameno kaj traduko de kelkaj vortradikoj en la „komuna vortaro“ estis diskutata, kaj komisiono formiĝis por daŭrigi la laboron kaj ankaŭ ekzameni la proponojn de l' diversaj esperantistoj).

Estis kreata *Konstanta Komitato de la Kongresoj* (vidu 17an kaj 36an Dem.).

La kongreso akceptis la *Deklaracion pri neŭtraleco de la kongresoj de Esperanto*.²⁾

La *Centra Oficejo* aranĝis inter la I kaj IIa Kongresoj kursojn kaj metis siajn ĉambrojn al la dispoŝo de kunsidoj kaj unuiĝoj; ĝi formis Esperantan bibliotekon kaj arĥivon.

Rilate la propagandon, la kongreso akceptis kelkajn proponojn, i. a., ke la grupoj elmetu adresojn en la staci-

¹⁾ Dua Kongreso Universala de Esperanto (Esperantista Dokumentaro). Parolado de Dro Zamenhof (Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, p. 62).

²⁾ Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, p. 68.

domojn de siaj urboj. Rekomendinde estas ankaŭ akcenti, ke Esperanto faciligas la studon al fremdlingvaj gramatikoj; esperantistoj devus instrui alilandanojn pri naciaj lingvoj per Esperanto. La *Ruĝa Kruco* havos tre grandan utilon per internacia lingvo, kiu ebligas al ĝi helpi dum milito — kiun bedaŭrinde dum ankoraŭ kelka tempo oni eble malfacile povos eviti — iun ajn soldaton. La kongreso proponis diskonigi Esperanton en la unuiĝoj de l' Ruĝa Kruco kaj proponis ĝin al la internacia konferenco de l' Ruĝa Kruco en London (1907).

Krom la ĝeneralaj kunsidoj de l' kongreso okazis 23 apartaj kunestoj de fakanaroj. Okazis protestanta diservo (pastro Schneeberger). Oni prezentis la teatraĵojn: La floro de l' pasinto (E. de Amicis), Agrabla surprizo (W. Ferking). Sekvis la kongreson ekskursoj al Vevey, Chamounix, Anecy, Aix-les-Bains, Berner Oberland.

Same kiel la I Kongreso donis grandan antaŭenpuŝon en Francujo, la Ĝeneva multe akcelis la progresojn de nia afero en Svisujo kaj Eŭropo ĝenerale. Aperis „La Revuo“ direktata de Prof-ro Bourlet, kun konstanta kunlaborado de Dro Zamenhof.

19. Kion vi scias pri la IIIa Universala Kongreso de Esperanto?¹⁾

Ĝi okazis en 1907 (12a—17a de Aŭgusto) en *Cambridge* (Anglujo). Prezidis kolonelo John Pollen. Partoprenis 1324 personoj. Je la unua fojo ŝtata registaro (Belgujo) estis reprezentata dum la kongreso. El la diversaj proponoj kaj deziresprimoj de l' kongreso ni citu jenajn: La fondiĝo de Esperantista Marista Ligo estas prikonsentata, kaj ĉiuj esperantistoj havantaj rilatojn kun transoceana trafiko, estas petataj, efike sub-

¹⁾ Tria Kongreso Universala de Esperanto (Esperantista Dokumentaro). Parolado de Dro Zamenhof (Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, p. 69).

teni tiun unuiĝon. La esperantistoj devas uzi kaj utiligi al si la Esperantajn Oficejojn, kies aranĝon rekomendis jam la Bulonja kaj Ĝeneva kongresoj. La esperantistoj akceptu prove la helpan decimalan sistemon por monrilatoj. S-ro R. de Saussure prezentis tiam en kunsido de la ĵus fondita Internacia Scienca Asocio la spesmilan sistemon. (1 spesmilo [Sm] = 100 spesdekoj [Sd] = 1000 spesoj [S]. 10 Sm egalvaloras ormoneron de 8 gramoj laŭ proporcio 11/12. Ekz. 1 germana Marko = 0,487 Sm, 1 Sm = 2,046 M; 1 Sm = 2,003 ŝilingoj, 1,21 guldenoj [nederl.] ktp.) Tiu sistemo iom post iom uziĝis, kaj baldaŭ s-ro H. F. Höveler (Ĉefeĉ), konata pro siaj bonegaj multlingvaj „ŝlosiloj“, fondis en London Ĉekbankon Esperantistan, kies kontohavantoj rilatis inter si kaj kun nekontohavantoj pere de transpagiloj aŭ internaciaj ĉekoj, kiuj evitis poŝtelspezojn, perdojn pro kurzaj ŝanĝoj, malfacilaĵojn ĉiuspecajn. La banko havis jam kelkajn centojn da kontuloj. Ĝi samtempe utilis al la enkonduko de universala decimala sistemo. Dum la milito ĝi ĉesis funkcii; pro gravaj kaŭzoj ĝi post la milito ne plu estis funkciigata.

La Tria Kongreso aprobis *Kongresan Regularon*¹⁾ (Konsisto de la kongresoj. Celo de la kongresoj. Konstanta Kongresa Komitato. Estraro. Specialaj sekcioj. Kongresaj konsiliĝoj). La sekvintaj kongresoj ĝin ŝanĝis en kelkaj punktoj; la VIIa Kongreso 1911 en Antwerpen aprobis Aldonon. Vidu 31an Demandon.

La agado de la *Lingva Komitato* inter la IIa kaj IIIa Kongresoj konsistis el laboroj pri dubaj tradukoj en la komuna vortaro, preskaŭ pretigitaj, raporto pri propraj nomoj, ekzameno de novaj gramatikaj formoj (amantas, amintas, k. c.), kiujn oni forĵetis kiel senutilan kaj ne-

¹⁾ Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, p. 117.

klaran pliriĉigon aŭ pli bone multpezigon de l' lingvo. Fine kelkaj Lingvaj Komitatanoj estis komisiataj, kolekt la Zamenhof-ajn vortojn netroveblajn en la Universala Vortaro¹⁾. La *Centra Oficejo* estis presiginta la protokolojn de la du unuaj kongresoj kaj forsendinta ilin al la esperantistoj. Krom sia helpo al la movado ĉe festoj kaj paroladaj vesperoj, ĝi akiris jam 100 broŝurojn kaj volumojn kaj daŭrigis la pliriĉigon de sia biblioteko.

Krom la ĝeneralaj kunsidoj okazis 29 fakaj kunestoj. Okazis diservoj protestantaj (pastroj Edmonds kaj Schneeberger) kaj katolika (abato Richardson). Oni prezentis: Boks und Koks (Morton), Bardell kontraŭ Pickwick. Estis aranĝataj ekskursoj al Letchworth, Ely, London, Kimrujo, Skotlando.

Post la sukcesplena kongreso, Dro Zamenhof estis plej gastame kaj oficiale akceptata en London kaj faris en la „Guildhall“ sian trafan paroladon pri „Esperanto kaj patriotismo“²⁾:

„... La dua kulpigo, kiun ni ofte devas aŭdi, estas tio, ke ni esperantistoj estas malbonaj patriotoj. Ĉar tiuj esperantistoj, kiuj traktas la Esperantismon kiel ideon, predikas reciprokecon kaj fratecon inter la popoloj kaj ĉar laŭ la opinio de la gentaj ŝovinistoj patriotismo konsistas en malamo kontraŭ ĉio, kio ne estas nia, tial ni laŭ ilia opinio estas malbonaj patriotoj, kaj ili diras, ke la esperantistoj ne amas sian patrujon. Kontraŭ tiu ĉi mensoga, malnobla kaj kalumnia kulpigo ni protestas plej energie, ni protestas per ĉiuj fibroj de nia koro. Dum la pseŭdopatriotismo, t. e. la genta ŝovinismo, estas parto de tiu komuna malamo, kiu ĉion en la mondo detruas, la vera patriotismo estas parto de tiu granda tutmonda amo, kiu ĉion konstruas, konservas kaj feliĉigas. La Esperantismo, kiu predikas amon, kaj la patriotismo, kiu ankaŭ predikas amon, ne-

¹⁾ „Zamenhof-aj vortoj“ (Esperantista Dokumentaro).

²⁾ Parolado de Dro L. L. Zamenhof en la Guildhall (City of London), la 21an de Aŭgusto 1907 (Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, p. 77).

niam povas esti malamikaj inter si. Ĉiu povas paroli al ni pri ĉiuspeca amo, kaj ni kun danko lin aŭskultos; sed kiam pri amo al la patrujo parolas al ni la ŝovinistoj, tiuj reprezentantoj de abomeninda malamo, tiuj mallumaj demonoj, kiuj ne sole inter la landoj, sed ankaŭ en sia propra patrujo konstante instigas homon kontraŭ homo — tiam ni kun la plej granda indigno nin deturnas. Vi, nigraj semantoj de malpaco, parolu nur pri malamo al ĉio, kio ne estas via, parolu pri egoismo, sed neniam uzu la vorton „amo“, ĉar en via buŝo la sankta vorto „amo“ malpuriĝas.

Vi staras nun antaŭ miaj okuloj, mia kara Litovujo, mia malfeliĉa patrujo, kiun mi neniam povas forgesi, kvankam mi forlasis vin kiel juna knabo. Vi, kiun mi ofte vidas en miaj sonĝoj, vi, kiun nenia alia parto de la tero iam povas anstataŭi en mia koro, vi atestu, kiu vin pli multe, pli kore kaj pli sincere amas: ĉu mi, idea esperantisto, kiu revis pri frateco inter ĉiuj viaj loĝantoj, kvankam mi devis bedaŭrinde forlasi vin, simile al multaj centoj da miloj da aliaj viaj filoj — aŭ ĉu tiuj personoj, kiuj deziras, ke vi apartenu nur al ili, kaj ĉiuj aliaj viaj filoj estu rigardataj kiel fremduloj aŭ sklavoj. Ho patriotismo, patriotismo, kiam fine la homoj lernos kompreni ĝustevian sencon! Kiam via sankta nomo ĉesos esti armilo en la manoj de diversaj malhonestuloj! Kiam fine ĉiu homo ricevos la rajton kaj la eblon, algluiĝi per sia tuta koro al tiu peco da tero, kiu lin naskis!

Longe daŭros ankoraŭ malluma nokto sur la tero, sed ne eterne ĝi daŭros. Venos iam la tempo, kiam la homoj ĉesos esti lupoj unuj kontraŭ aliaj. Anstataŭ konstante batali inter si, elŝiri la patrujon unuj al la aliaj, perforte altrudi al si reciproke siajn lingvojn kaj morojn, ili vivos inter si pace kaj frate, en plena interkonsento ili laboros sur la tero, sur kiu ili vivas, kaj kontraŭ tiuj krudaj fortoj de la naturo, kiuj ilin ĉiujn egale atakas. Kaj kune kaj interkonsente ili celados ĉiuj al unu vero, al unu feliĉo. Kaj se iam venos tiu feliĉa tempo, ĝi estos la frukto de konstanta kaj senlaca laborado de tiuj homoj, kiujn ni vidas nun en ĉi tiu ĉambrego kaj kies nomo, ankoraŭ tre malmulte konata kaj tre malmulte ŝatata, estas „Esperantistoj“.

De post tiu tre bela kaj tre sukcesplena kongreso, Esperanto faris tre grandajn progresojn en anglolingvaj landoj.

20. Kion vi scias pri la IVa Universala Kongreso de Esperanto? ¹⁾

La IVa Kongreso okazis en 1908 (17a—22a de Aŭgusto) en *Dresden* (Germanujo). Partoprenis ĉirkaŭ 1500 personoj. Prezidis Dro Mybs. Estis oficiale reprezentataj la saksa ministrejo de kulto kaj publika instruado, la ministrejo de Japanujo kaj la registaro de Usono.

Kiel gravegaj okazintaĵoj inter la IIIa kaj IVa Kongresoj estu citataj: 1. La apero de *Ido* (vidu 55an Dem.), per kiu estis kaŭzata krizo. 2. La fondiĝo de la Universala Esperanto-Asocio (U.E.A), kiu al la nura propagando aldonis la utiligadon de Esperanto en la praktika vivo (vidu 39an Dem.).

Dum siaj agadaj kunsidoj la IVa Kongreso manifestis sian plenan konfidon al la Lingva Komitato kiel al la nur antaŭ kelkaj monatoj elektita Akademio, ke ili gardos la fundamentajn principojn de la lingvo kaj kontrolos ĝian evoluon; ĝi ankaŭ deziras, ke ĉiuj asocioj kaj grupoj esprimu tian saman konfidon.

Poste venas la interrilatoj kun la *Delegitaro*, pri kies rolo kaj rezultatoj ni parolos pli malsupre (vidu 31an Dem.).

Pro tio, ke la L.K.-anoj estas tre multnombraj, loĝas malproksime unu de alia kaj estas malfacile, rapide ekzameni demandon, la Lingva Komitato fondis konstantan superan komisionon aŭ *Akademion*, konsistontan nur el 18 anoj (vidu 33an Dem.). La kongreso aprobis tiun fondon.

La kongreso regulis la elekton de la anoj de la *Konstanta Komitato* de la Kongresoj. Ĝi ankaŭ aprobis la fondon de *Kongresa Kaso* kaj tiun de la *Oficiala Gazeto*

¹⁾ Kvara Kongreso Universala de Esperanto (Esperantista Dokumentaro). Parolado de Dro Zamenhof (Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, p. 80).

Esperantista, organo de la Lingva Komitato, de la Konstanta Komitato de la Kongresoj kaj de la Centra Oficejo, administrata de la Centra Oficejo kaj redaktata sub la kontrolo de la ĝenerala sekretario de l' K.K.K. kaj de la sekretario de l' C.O.

Krom la ĝeneralaj kunsidoj okazis 31 fakaj kunestoj.

La Dresden-a Kongreso, protektita de l' reĝo de Saksujo kaj bonvole salutata de l' germana imperiestro, signas rimarkindan epokon de la Esperanta movado, la epokon de la oficialaj aproboj. Krom la belaj festoj, simile kiel en la aliaj kongresoj, profesiaj aktoroj prezentis en la reĝa operdomo de Dresden la de nia Majstro rimarkinde kaj belverse tradukitan „Ifigenio en Taŭrido“ de Goethe. Tiu mirige bela reprezento, kiu komprenebligis la belajn esprimatajn sentojn al reprezentantoj de pli ol 30 malsamaj lingvoj, aŭskultantaj tiujn perfekte elparolatajn, harmoniajn kaj enhavoplenajn versojn, kvazaŭ ili estus verkitaj en ilia gepatra lingvo; la tuto faris sur ĉiun ĉeestanton neforgeseblan impreson. La mondliteraturo revita de Goethe efektiviĝis jam de longe per Esperanto, nun efektiviĝis la mondoteatro.

En Meißen oni prezentis: La malfeliĉuloj (Kotzebue), Tie ĉi oni parolas Esperante (Williams). Okazis diservoj protestanta (pastro Dro Kühn) kaj katolikaj (abato Richardson kaj Pichot). Ekskursoj estis aranĝataj al Meißen, Saksa Svisujo, Berlin.

21. Kion vi scias pri la Va Universala Kongreso de Esperanto?¹⁾

Ĝi okazis en 1909 (5a—11a de Septembro) en *Barcelona* (Hispanujo) sub la oficiala protekto de l' reĝo. La nombro de la partoprenantoj estis ĉirkaŭ 1300.

¹⁾ Kvina Kongreso Universala de Esperanto (Esperantista Dokumentaro). Parolado de Dro Zamenhof (Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, p. 87).

Prezidis Pujulà y Vallès. 4 ŝtatoj (Belgujo, Norvegujo, Meksikio, Usono) estis oficiale reprezentataj.

Inter la IVa kaj Va Kongresoj la Akademio, sekve de oftaj demandoj kaj proponoj pri ĉiuj punktoj de la lingvo kaj dezirante definitive solvi la demandon, decidis interkonsente kun Dro Zamenhof, remeti la tutan lingvon sur la tablon por esplori, kio estas aŭ ne konforma al ĝiaj principoj. Ĉiuj proponoj pri reformoj aŭ ŝanĝoj estis rifuzataj, sed la Akademio unuanime aprobis la proponojn pri konsiloj por elekto de novaj vortoj kaj pri starigo de principoj de derivado. Cetere la Akademio decidis, laŭ propono de s-ro Prof-ro Th. Cart, fondi premiojn por la plej bonaj verkoj en Esperanto.

La Va Kongreso de Esperanto esprimis la deziron, ke la diverslandaj societoj por la propagando de Esperanto kreu per proporcia balotado *Internacian Konsilantaron* (vidu 22an Dem.), por zorgi pri la financaj rimedoj de niaj oficialaj institucioj (Lingva Komitato kaj Konstanta Komitato de la Kongresoj).

Same kiel la germanoj dum la antaŭa kongreso prezentis al siaj alilandaj samideanoj unu el siaj plej valoraj naciaj teatraĵoj, ankaŭ Hispanujo prezentis profundsentan teatraĵon „Mistero de Doloro“ de l' fama kataluna poeto Gall. La agado, kun forta nacia koloro kaj tamen homsentoj ĉieaj, forte impresis la ĉeestantojn.

Oni aranĝis „Florajn Ludojn“ kaj entreprenis ekskursojn al monto Tibidabo, Montserrat, Valencia.

22. Kion vi scias pri la VIa Universala Kongreso de Esperanto?¹⁾

Ĝi okazis en 1910 (14a—20a de Aŭgusto) en *Washington* (Usono). Partoprenis 357 personoj. Prezidis J. J. Bar-

¹⁾ Sesa Kongreso Universala de Esperanto (Esperantista Dokumentaro). Parolado de Dro Zamenhof (Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, p. 89).

rett. 16 registaroj (krom tio la registaroj de 4 ŝtatoj de Usono) sendis delegitojn.

Lingva Komitato. S-roj Bein, Moch kaj Schröder, subkomitato pri la *propraj* (geografiaj, personaj kaj historiaj) nomoj, definitive starigis liston, kiu estas represita en Oficiala Gazeto kaj en aparta broŝuro. Tiu listo ne estas deviga; oni nur celis, per tiu publikigo gvidi la publikon, al kiu apartenas „se ĝi deziras, ekprovi tiujn novajn formojn, ilin eksperimenti kaj konstante uzi, se ĝi trovos ilin praktikaj“.

S-ro de Saussure klarigas la de li sekvatan metodon koncerne la teknikan vortaron kaj siajn intencojn. Kiel bazon de laboro li prenis la iom malnovan, sed solan multlingvan vortaron teknikan de s-roj Verax, Fruictier kaj Mann, uzante ankaŭ la antaŭ nelonge aperintan Teknikan Vortaron de s-ro Verax. Plie la Scienca Asocio starigis dum la Va Kongreso specialan sciencan kaj teknikan komitaton por verki konsilaron pri la verkado de la novaj sciencaj kaj teknikaj vortoj kaj de vortaro de puraj sciencoj. Raporto pri la unua parto de ĝia laboro publikiĝis en Scienca Revuo (fino de 1910). Propono de s-ino Hankel, ke la Lingva Komitato petu la kunlaboradon de Dro Zamenhof por verki gramatikon pri Esperanto, iom pli detalan ol la „Fundamento“, estis juĝata tro frua paŝo, ĉar *deviga* plena gramatiko estus nur malutila.¹⁾ Saussure (Akademiano kaj direktoro de la

¹⁾ Dro Zamenhof opinias (Kunsidoj de la Lingva Komitato dum la Washington-a kongreso), ke ni ne tro frue enkatenigu nian lingvon, ke afero, kiu hodiaŭ ŝajnas al ni bona, povas morgaŭ ŝajni nebona, kaj ke sekve pli bone estas, ke ni restu sur la fundamento de niaj dek ses reguloj kaj lasu ian elastecon al la lingvo pri ĉiuj ceteraj punktoj. . . . Dro Zamenhof konsilas, ke la verkistoj de gramatikoj antaŭ ĉio reprenu la dek ses regulojn kaj diru, ke tio estas la gramatiko. Poste ili presu sub la titolo „Komentario“ diversajn komentariojn pli-malpli detalajn, sed la oficiala parto estu nur la dek ses reguloj (vidu Oficiala Gazeto, n-o 26a p. 112 kaj 114).

sekcio por teknika vortaro) prezentis al la Akademio proponon pri la derivado en Esperanto.¹⁾

La sekcio pri komuna vortaro publikigis la „Unuan Oficialan Aldonon al Universala Vortaro“.

Oficiala Gazeto. „La Sesa Kongreso memorigas al ĉiuj societoj kaj grupoj, ke la abono al la Oficiala Gazeto estas unu el la plej bonaj rimedoj por helpi finance la oficialajn instituciojn de Esperanto, kaj por esti regule informata pri iliaj laboroj“ (vidu Oficiala Gazeto, n-o 26, paĝo 140).

Internacia Konsilantaro, destinita por zorgi pri la financaj rimedoj de niaj oficialaj institucioj (Lingva Komitato kaj Konstanta Komitato de la Kongresoj) estis *definitive* starigata. La diversaj landoj elektis post la kongreso siajn reprezentantojn (po unu por mil anoj de la propagandaj asocioj).

Volapük. La Vla Kongreso decidis, 1. ke, ĉar s-ro Schleyer ĉiam havis la estimon de la esperantistoj, ne estas sufiĉa preteksto por ĝin esprimi denove speciale; 2. ke ne konvenas nomi la Sesan Kongreson la Naŭa Internacia (pro la tri okazintaj Volapük-aj kongresoj) (vidu 6an Dem.).

Krom la ĝeneralaj kunvenoj okazis 11 fakaj kunsidoj. Oni prezentis: Kiel plaĉas al vi (Shakespeare). Diservoj estis aranĝataj. Okazis pilkludo „Baseball“ kaj vespera

¹⁾ Oficiala Gazeto, n-o 11, 25 de Majo 1913: La Akademio rekomendas al la esperantistaj aŭtoroj, ke ili sekvu la du jenajn principojn, kiuj kontraŭstaras unu la alian kaj estas la logika bazo de vortfarado en Esperanto:

a) *Principo de neceso*: En konstruon de vorto oni devas enkonduki ĉiujn vortradikojn, afiksojn kaj finaĵon necesajn por esprimi klare kaj plene la ideon reprezentotan de tiu vorto.

b) *Principo de sufiĉo*: Se la ideo tiamaniere esprimita estas jam bone kaj ne konfuzeble komprenata el la kunteksto sen iu el la sufiksoj uzitaj, tiu ĉi sufikso povas esti elĵetata kiel neutila kaj nenecesa.

Vidu ankaŭ: R. de Saussure, La vortteorio en Esperanto (Genève, 1914).

akceptado en la Palaco de l' Paco. Oni entreprenis ekskursojn sur Potomak, al Mt. Vernon.

23. Kion vi scias pri la VIIa Universala Kongreso de Esperanto? ¹⁾

Ĝi okazis en 1911 (21a—27a de Aŭgusto) en *Antwerpen* (Anvers, Belgujo). Partoprenis 2107 personoj. Prezidis Van der Biest. 14 ŝtatoj estis oficiale reprezentataj (inter ili Usono je la 4a fojo).

Lingva Komitato. En la 3a jarkolekto de Oficiala Gazeto estas publikigitaj „Lingvaj Respondoj de Dro Zamenhof“.

Estis starigata komisiono por studi la demandon pri *Internacia organizado de Esperanto* (1. Ĝenerala organizaĵo, por doni firman bazon al la Oficialaj jam ekzistantaj Institucioj, nome la Konstanta Komitato de la Kongresoj, la Lingva Komitato kaj ĝia Akademio kaj la Esperantista Centra Oficejo kaj ĝiaj oficialaj organoj, kaj por ilin *subteni kaj interligi*, 2. Unuiĝo de la naciaj esperantistaj societoj, 3. Amikaj kaj efikaj interrilatoj inter la propagandaj kaj specialaj, fakaj kaj aplikaj societoj kiel ekz. la Universala Esperanto-Asocio.

La kongreso aprobis *Aldonon al la Regularo de la Kongresoj* (vidu 31an Dem.) kaj specialan *Regularon de la Esperantista Centra Oficejo*, per kiu la celoj de tiu institucio estas formale montritaj (vidu 35an Dem.). Ĝi akceptis *Regularon pri Rajtigitaj Delegitoj* (vidu 31an Dem.). Dum la Antverpena Kongreso estis kreata la *Societo de Amikoj de Esperanto*, kies ĉefa celo estas, helpadi la materian funkciadon de la Centra Oficejo (vidu 28an kaj 35an Dem.); la milito malhelpis ĝian regulan starigon.

Krom la ĝeneralaj okazis 14 fakaj kunsidoj. Dro Zamenhof ricevis la ordenon de Isabella la Katolika

¹⁾ Sepa Kongreso Universala de Esperanto (Esperantista Dokumentaro). Parolado de Dro Zamenhof (Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, p. 96)

Okazis diservoj protestantaj (Griethuysen, A. Rust, Soham) kaj katolikaj (Abato Richardson, Parker). La teatraĵoj de la VIIa Kongreso estis: Kaatje (Spaak), Devo de Reĝo (De Tière), Por kvietaj personoj (Van Driesche), Revuo de la Sepa (Jan). Ekskursoj okazis sur Schelde, al Charleroi, Dinant, Liège, Spaa, Ostende, Brügge, Gent, Bruxelles.

24. Kion vi scias pri la VIIIa Universala Kongreso de Esperanto? ¹⁾

La VIIIa Kongreso (Jubilea Kongreso de Esperanto) okazis en 1912 (11a—18a de Aŭgusto) en *Kraków*, (Aŭstria Galicio). Ĝi estis frata manifestado okaze de la 25a jubileo de Esperanto. Partoprenis ĉirkaŭ 1000 personoj. Prezidis Dro Mikolajski. Estis oficiale reprezentataj du aŭstria-hungaraj ministerioj kaj ministerio de komerco kaj industrio de Hungarujo, la bulgara ministerio de popola instruado, la rumanaj ministerioj de terkulturo kaj de bienoj, la rusa ministerio de komerco kaj industrio.

Lingva Komitato. Ankaŭ en la 4a jarkolekto de Oficiala Gazeto estas publikigitaj „Lingvaj Respondoj de Dro Zamenhof“. En Majo 1912 nova Regularo de la L. K. estis aprokata de la anoj de la Komitato.

La kongreso akceptis *Regularon pri la kunsidoj de la kongresoj*. Ĝi diskutis pri la demando pri *Internacia organizado de Esperanto* kaj decidis, ke la demando estu prokrastata. Koncerne la demandon pri unuiĝo de naciaj societoj ĝi rekomendis, ke la koncernataj societoj faru ĉion eblan, por interkonsiliĝi kaj tiel pli bone antaŭenpuŝi nian propagandon tra la tuta mondo. Ĝi plue decidis, ke la komisiono, elektita en Antwerpen por studi la demandon pri ĝenerala organizaĵo, daŭru funkcii.

¹⁾ Oka Kongreso Universala de Esperanto (Esperantista Dokumentaro). Parolado de Dro Zamenhof (Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, p. 100).

Generalo Sebert, portinte ĝis tiam la tutan financon respondecon por la *Centra Oficejo* kaj ĝiaj havo kaj ŝuldoj, transdonis ĝin sen ŝuldoj al la esperantistaro. La kongreso dankis lin kaj esprimis la deziron, ke la *oficialaj* servoj de la C. O. estu plene *apartigataj* de aliaj servoj kaj *submetataj* al la *regado* de la *Administra Komitato* (vidu 35an Dem.). De post ĉi tiu kongreso la C. O. estas dividita en du sekciojn: sekcio A, kiu rilatas Lingvan Komitaton, Konstantan Komitaton, Oficialan Gazeton kaj Administran Komitaton; sekcio B, kiu sin okupas pri ĝenerala propagando, bibliografio kaj statistiko.

Krom la ĝeneralaj okazis 16 fakaj kunsidoj. Estis aranĝataj diservoj protestanta (Michejda), katolika (Szurek), hebrea (Saphra). Oni prezentis: Mazepa (Slovacki), Urso (Ĉeĥov), operon Halka (Moniuszko). Ekskursoj estis entreprenataj al la salminejoj de Wieliczka, al Zakopane.

En sia parolado ĉe la malfermo de la kongreso Dro Zamenhof diris: „Konsciante, ke ĝis sia plena fortikiĝo nia afero bezonas ian enkorpigitan standardon, mi — laŭ via deziro — dum dudek kvin jaroj plenumadis tiun rolon, kiel mi povis, kaj mi permesadis, kvankam tre nevolonte, ke vi vidu en mi *ĉefon* kaj *majstron* . . . Sed nun permesu al mi, ke mi fine formetu de mi mian rolon. La nuna kongreso estas la lasta, en kiu vi vidas min *antaŭ* vi; poste, se mi povos veni al vi, vi ĉiam vidos min nur *inter* vi.“ Tiu parolado estis la lasta oficiala kongresa parolado de la Majstro.

25. Kion vi scias pri la IXa Universala Kongreso de Esperanto? ¹⁾

Ĝi okazis en 1913 (24a—31a de Aŭgusto en Bern (Svisujo). Prezidis J. Schmid. Partoprenis ĉirkaŭ 1200 personoj. 6 ŝtatoj estis oficiale reprezentataj.

¹⁾ Naŭa Kongreso Universala de Esperanto (Esperantista Dokumentaro).

Lingva Komitato. En diversaj numeroj de la 5a kaj 6a jarkolektoj de Oficiala Gazeto estas publikigitaj raportoj pri dubaj tradukoj en la Universala Vortaro.

La kongreso decidis, ke la *Rajtigitaj Delegitoj* havu la rajton kunveni, kaj havu la okazon, voĉdoni preparajn proponojn poste antaŭmetotajn al la voĉdonado de la ĝenerala kunveno.

Koncerne la *ĝeneralan organizaĵon* la kongreso aprobis la *kunordigon* de la nun ekzistantaj Esperantistaj Institucioj. Ĝi ankaŭ denove rekomendis al la naciaj societoj, ke ili esploru la demandon pri bonvola organizo de kunlaboro de la esperantistaj societoj kaj grupoj, kaj konsiderante, ke jam kelkaj societoj kaj grupoj akceptis aliĝi al tiu projekto de kunlaboro, la kongreso invitis la Centran Oficejon, ke ĝi organizu de nun la komencon de la efektivigo de komuna agado; la kongreso konstatis, ke la komisiono por ĝenerala organizaĵo finis sian taskon, kaj ĝi dankis la komisionon pro ĝia valora laboro.

Estis akceptata regularo de la *Internacia Unuiĝo de Esperantistaj Societoj* (I. U. E. S.) ¹⁾ Tiu asocio estis kreata, por *interligi* la esperantistajn societojn, kiuj deziras starigi interrilatojn por la plej rapida sukceso de siaj klopodoj; ĝia celo estas, plifaciligi la propagandon de la lingvo internacia Esperanto kaj plirapidigi ĝian enkondukon en la tutan mondon. La societoj, kiuj aliĝas al la Unuiĝo, pagas *kotizon*, kiu donas al ili la rajton, ricevi la servojn de la Centra Oficejo kun ĝiaj oficialaj publikigaĵoj. Nur tiuj societoj povas partopreni la elekton de Rajtigitaj Delegitoj al la kongresoj kaj de la Administra Komitato de la Centra Oficejo, kiuj pagas la jaran fiksitajn kotizon. La estraro ne rajtas mem alpreni decidojn. Ĝi povas nur formuli dezirojn aŭ esprimi konsilojn. La estraro estas

¹⁾ Esperantista Dokumentaro XXVI, p. 89—92.

speciale komisiita por internacie reprezenti la esperantistaron apud la registaroj.

La regularo celas, kiel sekvo de la regularo pri la Rajtigita Delegitoj, doni al la internacia organizo de nia movado *firman bazon* kaj reprezenti la tutan esperantistaron apud la Internaciaj Organizaĵoj. Ĝi ankaŭ materie helpadas ilin. La sidejo de la Unuiĝo estas ĉe la Centra Oficejo.

Pro la malhelpo de la milito ĝi ne povis aktive ekfunkcii, kvankam jam antaŭ la milito aliĝis 15 naciaj asocioj.

Krom la ĝeneralaj okazis 11 fakaj kunsidoj. Oni aranĝis diservojn protestantan (Rust), katolikan (Rajczi), hebrean (Saphra). Estis prezentataj: Ginevra (Privat), La Patreco (Wolf). Oni okazigis ankaŭ oratoran konkurson kaj ekskurson al Interlaken.

26. Kion vi scias pri la Xa Universala Kongreso de Esperanto? ¹⁾

La Xa Kongreso estis projektita por 1914 (2a ĝis 10a de Aŭgusto) en *Paris* (Francujo). Pli ol 4000 partoprenantoj estis sin anoncintaj. Ĝi estis tre bone preparita kaj certe estus fariĝinta la plej grandioza el ĉiuj ĝisnunaj kongresoj, se la eksplodo de la milito ne estus detruinta ĉiujn laborojn. Okazis nur afera kunsido, kiu decidis pri ĝia neokazigo.

Antaŭ la Xa Kongreso la prezidanto de la *Lingva Komitato* ricevis oficialajn proponojn de la Germana Esperanto-Asocio kaj de la Nederlanda Federacio „La Estonto estas nia“ pri ŝanĝoj en la regularo. Per regula voĉdonado la Akademio decidis, ke ne estas urĝe kaj necese, fari iun ŝanĝon en la nuna regularo de la L.K.

¹⁾ Dek-a Kongreso Universala de Esperanto (Esperantista Dokumentaro).

27. Kion vi scias pri la dum milito vivado de Esperanto?

La XIa Kongreso, kiu laŭ antaŭaj decidoj estis aranĝota en Edinburgh (Skotlando), okazis en 1915 (22a—28a de Aŭgusto) en *San Francisko* (Usono)¹⁾ okaze de la Panama Pacifika Ekspozicio. Ĝi anstataŭis la tie okazontan amerikan kongreson de Esperanto kaj estis vizitata preskaŭ nur de amerikanoj. Decidojn devigajn por la tuta esperantistaro ĝi ne povis akcepti, sed nur interŝanĝi ideojn pri diskutotaj demandoj.

La mondmilito ne povis pereigi nian movadon, sed kompreneble treege malakcelis ĝian progresadon, ĉesigante la funkciadon de multaj societoj, malaperigante gazetojn, malhelpante fervorajn samideanojn, labori por Esperanto. Estas grave, ke la Centra Oficejo de U. E. A. povis resti konstante malfermita. Ĝi sukcesis, ne ĉesante aperigi la gazeton „*Esperanto*“, konservi la *internacian* vivon de la movado; per Esperanto ĝi ankaŭ servis multajn militviktimojn, perante sciigojn pri civilkaptitoj, vunditoj, mortintoj, netrovitoj de ĉiuj landoj.

Bedaŭrinde tro frua morto, je la 14a de Aprilo 1917, rabis al la esperantistaro ĝian majstron Dro Zamenhof.

28. Kion vi scias pri la XIIa Universala Kongreso de Esperanto? ²⁾

En Septembro 1919 la prezidanto de la Kongresa Komitato, generalo Sebert, kunvokis *Specialan Konferencon* en Paris, por esplori la nunan staton de la Oficialaj Institucioj kaj por studi la reorganizadon de la Universalaj Kongresoj. La konferenco opiniis, ke oni provu kiel eble plej baldaŭ la preparadon de universala kongreso. Oni

¹⁾ Dek-unua Kongreso Universala de Esperanto (Esperantista Dokumentaro).

²⁾ Dek-dua Kongreso Universala de Esperanto (Esperantista Dokumentaro).

opiniis necesa, elekti neŭtralan landon, kaj oni proponis Nederlandon. La Hagaj Esperantistaj Societoj akceptis tiun proponon.

Je la fino de la jaro 1919a la *Societo de Amikoj de Esperanto* (vidu 23an kaj 35an Dem.) estis *definitive* kreata. La societa sidejo estas en Paris, ĉe la sidejo de la Centra Oficejo.

La januara numero de la Oficiala Gazeto de 1920 enhavas la *Duan Oficialan Aldonon al Universala Vortaro*.

La XIIa Universala Kongreso de Esperanto okazis en 1920 (9a—15a de Aŭgusto) en 's-Gravenhage (Nederland). La nombro de la partoprenantoj estis ĉirkaŭ 400 el 23 nacioj. Prezidis J. R. G. Isbrücker. Oficialajn delegitojn sendis la nederlanda ministerio por instruado, sciencoj kaj artoj kaj la ministerio por kanaloj kaj riveroj, la hispana ministerio por milito, la itala ministerio por mar-aferoj, la bulgara ministerio de la publika instruado, la pola registaro, la ĉeĥoslovaka ministerio por komerco. Pro la malfavoraj cirkonstancoj la Konstanta Komitato opiniis, ke estas neeble, apliki ĉi tiun jaron la regularon pri Rajtigita Delegitoj. Pro tio la kongreso ne povis alpreni devigajn decidojn. La ĉefa celo de la kongreso estis, montri al la mondo, ke Esperanto „restas vivanta lingvo kaj povas helpi la renovigon de la mondopaco kaj de la progreso de la homa vivo“.

La kongreso diskutis pri la proponoj de la Nederlanda Societo Esperantista koncerne plenan *reformadon de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio*. Ĝi esprimis la deziron, ke la tre interesa propono de la Nederlanda Societo pri la elekto de la Lingvo-Komitatoj estu sendata al la prezidanto de la L. K. kun la peto, ĝin ekzameni kaj prezenti al la XIIIa Kongreso plenan regularon pri elekto kaj labormetodo de la L. K. konformaj al jenaj principoj: 1. Rajtu partopreni en la elekto la *naciaj so-*

cietoj kaj gravaj *aplikaj* societoj; 2. Estu kiel eble plej baldaŭ entreprenota la eldono de teknikaj vortaroj.

La kongreso akceptis jenan rezolucion: La Kongreso opinias necesa, ke *ĝenerala organizaĵo internacia de l' individuaj esperantistoj* estu baldaŭ starigata, por subteni la necesajn centrajn instituciojn. Ĝi petas la Esperantistan Centran Oficejon en Paris kaj la Komitaton de U. E. A., formi komisionon por prepari planon kaj publike raporti antaŭ la printempo. Sed dumtempe la Kongreso petas, ke la esperantistoj subtenu materiale la jam ekzistantajn organizojn . . . La komisiono estis elektata.

La propono de la Pola Esperantista Societo, ke, por certigi al Esperanto *devigan instruadon* en la lernejoj de ĉiu ŝtato, la kongreso sin turnu al la Ligo de Nacioj kun la propono, fari enketon inter apartenantaj al ĝi ŝtatoj pri akceptebleco de Esperanto en la programon de la ŝtataj lernejoj, kaj, se la Ligo de Nacioj rifuzus okupiĝi pri la afero, komisiono sin turnu al la ministerioj de instruado de apartaj ŝtatoj senpere, estis malakceptata kiel tro frua.

Koncerne la proponon de Dro Leono Zamenhof, krei *Centran Esperantistan Hejmon* en Eŭropo, kaj tiun de Mahn kaj Applebaum, fondi *libertempejon por junaj esperantistoj*, la kongreso decidis, ke oni devas lasi ilian efektivigon al la iniciato de privataj personoj kaj al la bonvolo de la esperantistaro.

Krom la ĝeneralaj okazis fakaj kunsidoj (Fervojistoj, Framasonoj, Katolikoj, Kristanoj, Kuracistoj, Pacifistoj, Policianoj, Vegetaranoj). Oni aranĝis internacian balon kaj prezentis: Juĝa kunsido en 1813, Muzikvespero en 1813. Okazis ekskurso tre instrua al Leyden kaj ŝipekskurso trans la famajn „Polders“.

29. Kion vi scias pri la XIIIa Universala Kongreso de Esperanto?¹⁾

La XIIIa Kongreso okazis en 1921 (31a de Julio — 6a de Aŭgusto) en *Praha* (Ĉeĥoslovakujo). Sin anoncis pli ol 2500 personoj el 35 landoj. Prezidis Prof-ro Dro Kamaryt. Estis oficiale reprezentataj 8 registaroj, ministerioj aŭ ministroj, la Ukrajna Misio en Praha, la Saksa Esperanto-Instituto, la Ligo de Nacioj, la Internacia Labora Oficejo, la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco.

Lingva Komitato. En Decembro 1920 estis publikigata *Deklaracio de la Akademio*.²⁾ En tiu deklaro la Akademio almontras, ke nelonge antaŭ la milito ĝi publikigis la Duan Oficialan Aldonon al la Universala Vortaro, kaj klarigas, kial dum la milito ĝia laboro kompreneble haltis kaj ne povis ne halti, kaj ke ĝi nun preparas la baldaŭan starigon de la Tria Aldono kaj priesploras ankaŭ kelke da aliaj urgaj demandoj kaj speciale la preparon de teknikaj vortaroj. Ĝi ekzamenas la problemon pri eventuala reorganizo de la L. K. kaj modifoj en ĝia regularo; plie ĝi konigas de nun la evolucio de siaj laboroj per komunikoj sendotaj al la Esperanta gazetaro. De ĉiu esperantisto ĝi postulas, ke, konsiderante, ke la severa unueco estas nepre kondiĉo de internacia interkompreno kaj per tio de la ekzistado de internacia lingvo, li estu tre singarda pri ĉia perfektigado kaj riĉigado de la lingvo kaj serĉu novajn vortojn kaj esprimmanierojn nur en okazo de absoluta neceseco. Ĝi plie akcentas, ke la L. K. kaj la Akademio ne havas la rajton, iniciati iun ŝanĝon, korekton aŭ aldonon, nek krei novajn vortojn, ke ili nur devas konstati, kontroli, elekti, konsili, rekoni aŭ malrekoni, kaj ili estas nur ordigiloj, moderigiloj kaj reguligiloj. Ilia rolo

¹⁾ Dek-tria Kongreso Universala de Esperanto (Esperantista Dokumentaro).

²⁾ Deklaracio de la Akademio. Ĉirkulero, Decembro 1920. (Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, p. 112).

estas, „zorgi pri la konservado de la fundamentaj principoj de la lingvo kaj kontroli ĝian evolucio“ (Regularo). Tiu kontrolo, ne forprenante la liberecon de ĉiu esperantisto, nek barante la normalan naturan kaj laŭnaturan internacian evoluadon kaj pliriĉigadon de la lingvo, tamen konservas ĝian severan unuecon kaj gardas la esperantistojn de blinda kaj senkritika alproprigo de eraroj, de malkorektaĵoj, de novaj nenecesaj, neutilaj kaj nesufiĉe internaciaj radikoj aŭ de naciaj apartaĵoj kaj idiotismoj, kiuj ne estas internacie aŭ almenaŭ sufiĉe ĝenerale kompreneblaj.

La kongreso diskutis pri la propono de la Pola Esperantista Societo pri *enkonduko de Esperanto en la lernejojn* kaj fine akceptis la proponojn, ke oni sendu telegramon al la Ligo de Nacioj, petante, ke ĝi rekomendu la enkondukon de Esperanto en la lernejojn de siaj anoj, ke oni petu la ĉeĥoslovakon registaron, ke ĝi subtenu tiun proponon ĉe la Ligo kaj ke la kongreso interrilatu kun la Naciaj Societoj, por ke ili elektu komisionojn, kiuj sin turnu al la ministerioj pri instruado de siaj landoj.

Post diskutado de la raporto de la Komisiono elektita de la Haga Kongreso por esplori la demandojn pri *ĝenerala organizaĵo de Esperanto*, la kongreso aprobis la jenan rezolucion: La Kongreso aprobas la starigon de *Universala Ligo Esperantista* laŭ la ĝenerala plano de la raporto kaj petas la komisionon, verki statuton kaj financon planon de tiu Ligo presigotajn en Oficiala Gazeto kaj en la gazeto „*Esperanto*“ kaj komunikotajn al la esperantista gazetaro, celi la konsenton de la Centra Oficejo kaj de la Universala Esperanto-Asocio, kiuj dumtempe daŭrigu sian laboron, samtempe klopodante por enkorpiĝi sin en la Ligo kaj por efektiviĝi ĝian sukceson kaj prezenti raporton al la XIVa Kongreso. Ĝi petas la Lingvan Komitaton, tuj revizii sian regularon por respondi al la nova situacio kreota de la Ligo.

Propono pri *starigo de monumento* sur la tombo de Dro Zamenhof en Warszawa estis akceptata.

Oni elektis komisionon, kiu organizu monakiradon por la internacia organo de blindaj esperantistoj „*Esperanta Ligilo*“ kaj por eldonotaj libroj en Braille-skribo.

Estis akceptata jena rezolucio: La XIIIa Kongreso de Esperanto konstatas, ke la *multeco de Esperantaj gazetoj* ne nepre estas signo de saneco en nia movado, kaj ĝi rekomendas al la fondontoj de novaj gazetoj, zorge esplori, ĉu la intencata eldonado respondas al bezono.

Krom la ĝeneralaj kunsidoj okazis fakaj kunestoj de Fervojistoj, Framasonoj, Instruistoj, Ĵurnalistoj, Katolikoj, Kuracistoj, Komercistoj, Liberpensuloj, Poŝtistoj, Psikistoj, Teozofoj, Sciencistoj, Studentoj k. a. Estis aranĝataj internacia kostumbalo, koncerto de la Akademio de la ĉeĥa kant- kaj muzikarto, korpa eduko kaj naciaj dancoj, koncerto de blindaj virtuozaĵoj, teatraĵo: Nokto en Karlův Týn (Karlstein). Okazis diservoj katolika kaj protestanta. Oni aranĝis ekskursojn al kastelo Karlstein kaj al la grotoj de Moravia Kras. Antaŭiris la kongreson Antaŭkongreso en Dresden, sekvis ĝin rondvojaĝo tra la nordbohemiaj mondbanlokoj kaj vojaĝoj al Wien, Budapeŝto k. a.

30. Kion vi scias pri la XIVa Universala Kongreso de Esperanto? ¹⁾

La XIVa Kongreso okazis en 1922 (9a—15a de Aŭgusto) en *Helsinki* (Finnlando). Partoprenis ĉirkaŭ 1200 personoj el 27 landoj. Prezidis la finna vic-konsulo el Dresden, K. von Frenckell. Estis oficiale reprezentataj: la registaro de Urugvajo, la ministroj de publika instruado de Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Estonio, Hispanio, Litovio, Nederlando, la ministro de internaj aferoj de Germanio,

¹⁾ Dek-kvara Kongreso Universala de Esperanto (Esperantista Dokumentaro).

Ĉefa Inspekcio Fervoja de Rusujo, urbo Milano, Internacia Labora Oficejo (Genève), Int. Komitato de la Ruĝa Kruco (Genève), Unuiĝo de Internaciaj Asocioj (Bruxelles).

La kongreso estis malfermata de la ministro de instruado de Finnlando. Ĝi akceptis la interkonsenton de la komisiono pri ĝenerala organizo (vidu 29an Dem.) pri *Oficiala Esperantista Organizo*, aldonante al ĝi, por funkciigi la aferon, tri rezoluciojn (vidu 41an Dem.). Aŭdinte raporton de la komitato por starigo de Zamenhof-a Monumento en Warszawa, ĝi voĉdonis jenan rezolucion: „La Kongreso esprimas la deziron, ke ĉiuj esperantistaj societoj instigu la ĝeneralan daŭrigon de la donacado por la monumento de Dro Zamenhof.“ Dro Privat raportis pri la Konferenco pri Instruado de Esperanto en lernejoj, okazinta je Pasko 1922 en Genève (vidu 51an Dem.). Unuafoje la kunsidoj de U.E.A. kunfandiĝis kun la ĝeneralaj kunvenoj. Laŭ decido de la kongreso, la XVa Universala Kongreso de Esperanto okazos 1923 en Nürnberg.

Okazis fakaj kunsidoj de Komercistoj (Int. Federacio por komuna komerca lingvo), Filatelistoj, Sciencistoj (Int. Scienca Asocio), Pacifistoj, Poŝtoficistoj; okazis ankaŭ konferenco de foiroj. La Prezidanto de l' Respubliko Finnlando invitis en sian palacon la estraron de l' kongreso kun la ĉefaj reprezentantoj el ĉiuj nacioj. Per pririgardoj kaj ekskursoj, per koncertoj kaj unuakta teatraĵo („La Fianĉiĝo“ de Kivi), eĉ per kinematografo la kongresanoj ekkonis finnajn naturon, arton, muzikon, literaturon kaj popolajn kutimojn.

31. Kio estas kongreso?

Kongreso estas kunesto de diverslandaj samcelantoj, ĝojantaj sin revidi aŭ ekkoni reciproke, dezirantaj partopreni en tiuj grandaj festoj de l' homaro, de l' vera homamo ne-

apartigita de lingvaj bariloj, gvidataj de l' samaj sentoj kaj kunigantaj siajn fortojn por la akiro de alta idealo, antaŭe utopio kaj jam fakto, sur kiu estas eble, bazi plej grandajn esperojn. Kongreso estas do vere festo de l' interna ideo de Esperantismo, kiun ni denove pli malsupre priparolos (vidu 56an Dem.). Kongreso fine celas ankaŭ havigi okazon al la anoj de la diversaj internaciaj unuiĝoj aŭ komitatoj, interparoli pri siaj aferoj, kaj precipe ĝi celas doni objektivan lecionon al la neesperantista publiko.

Jen kelkaj detaloj pri la organizado de la kongresoj laŭ la *Kongresa Regularo*¹⁾, aprobita de la IIIa Universala Kongreso (1907, Cambridge) kaj ŝanĝita per diversaj decidoj de sekvintaj kongresoj, kaj laŭ la *Aldono al la Regularo*²⁾, aprobita de la VIIa Kongreso (1911, Antwerpen): En la Universala Kongreso de Esperanto povas partopreni ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiuj celoj li ĝin uzas.

La celo de la kongreso estas la esploro de ĉiuj demandoj komuninteresaj por ĉiuj esperantistoj, kun escepto de la religiaj, politikaj kaj socialaj demandoj³⁾, kiuj ne devas esti tuŝataj en kongresa kunsido, kaj de la lingvaj demandoj, kies esploro kaj solvo estas rezervitaj al la Lingva Komitato.

La kongresoj estas organizataj de la *Konstanta Komitato de la Kongresoj* (Detalojn pri la K. K. K. vidu en 36a Dem.).

La *Kongresa Estraro* konsistas, krom la honoraj prezidantoj kaj membroj, el: 1. la Kondukanta Estraro (por la

¹⁾ Kongresa Regularo (Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, p. 117).

²⁾ Aldono al la Regularo de la Kongresoj (Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, p. 121).

³⁾ Deklaracio pri neŭtraleco de la Kongresoj de Esperanto (Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, p. 68).

laboraj kunsidoj), 2. la Naciaj Delegitoj (por la solenaj kunsidoj kaj festoj), elektitaj antaŭ la unua kongresa kunsido de la kongresanoj, kiujn ili reprezentas (oni ne konfuzu ilin kun la Rajtigataj Delegitoj).

La Kondukanta Estraro konsistas el: 1. unu prezidanto kaj minimume unu vicprezidanto el la lando, kie sidas la kongreso, 2. kelkaj aliaj vicprezidantoj, laŭprincipe el la nacioj plej grandnombre reprezentataj en la kongreso, 3. la Ĝenerala Sekretario kaj la sekretarioj de la Ĝenerala Sekretariejo kaj de la Loka Komitato. La prezidanto kaj la vicprezidantoj estas elektataj de la kongreso.

Por la esploro de ĉiuj specialaj aŭ teknikaj temoj aŭ eĉ de la temoj rezervitaj pro la kongresa neŭtraleco oni povas formi *specialistajn studajn Sekciojn*.


La kongreso *pridiskutas*¹⁾ 1. la temojn senpere metitajn de la Internacia Organiza Komitato en la tagordon, 2. la dezirojn kaj konkludojn de la Sekcioj, prezentitajn de la Kondukanta Estraro.

Ĉiu *decido* de Internacia Esperantista Kongreso estas deviga nur por la Oficialaj Esperantistaj Institucioj, t. e. institucioj kreitaj kaj subtenataj laŭ deziroj de Internaciaj Esperantistaj Kongresoj, aŭ decidoj de la Rajtigataj Delegitoj. Por la esperantistoj privataj ĝi havas valoron nur moralan, montrante al ili la deziron aŭ opinion de la plimulto. Partopreni en la kongreso kaj en ĝiaj diskutoj havas la rajton ĉiu, kiu pagis la kotizon kaj submetiĝis al la Kongresa Regularo, sed *rajton de voĉdonado* havas nur la *regule elektitaj delegitoj* (Rajtigataj Delegitoj)²⁾ de esperantistaj grupoj aŭ societoj. Kiel delegito estas rigardata ĉiu persono, kiu prezentas al la kongresa komi-

¹⁾ Regularo por la kunsidoj de la Kongresoj (Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, p. 122).

²⁾ Antaŭ la starigo de Rajtigataj Delegitoj la Kongresoj nur povis esprimi dezirojn kaj konsilojn, sed neniel alpreni decidojn devigajn.

tato rajtigan leteron, kiun en la nomo de la grupo aŭ societo subskribis ĝia prezidanto, konigante samtempe la nombron de la membroj de tiu grupo aŭ societo. Ĉiu loka, regiona aŭ landa grupo aŭ societo de propagando povas elekti po unu delegito por ĉiuj 25 membroj. En ĉiu grupo aŭ societo estas konsiderata kiel elektanta membro ĉiu ano de la grupo aŭ societo, kiu pagis jaran kotizon al la Centra Oficejo, fiksitan de la Administra Komitato de la Centra Oficejo (vidu 35an Dem.).



III. Organizaĵoj de Esperanto

A. Antaŭaj Oficialaj Organizaĵoj de Esperanto

32. Kiujn Oficialajn Instituciojn Esperanto havis ĝis la XIVa Universala Kongreso 1922? ¹⁾

Esperanto havis tri Oficialajn Instituciojn, kreitajn kaj subtenatajn laŭ deziroj de Int. Esperantistaj Kongresoj: I. la Lingva Komitato kaj ĝia Akademio, II. la Centra Oficejo, III. la Konstanta Komitato de la Kongresoj.

I. LA LINGVA KOMITATO KAJ ĜIA AKADEMIO (ekzistas ankoraŭ nuntempe)

33. Kio estas la Lingva Komitato kaj ĝia Akademio? Iliaj roloj?

Pri la historio de la L. K. vidu 17an, 18an, 20an, 23an, 24an, 26an, 28an, 29an Dem.

Jen kelkaj detaloj pri la L. K. laŭ la *Regularo de la Lingva Komitato* ²⁾, aprobita la 25an de Majo 1912:

Celo. La Esperantista Lingva Komitato estas komisiita por zorgi pri la konservado de la fundamentaj principoj de la lingvo Esperanto kaj kontroli ĝian evolucion. Ĝi do esploras ĉiujn lingvajn demandojn kaj solvas ilin laŭ la supre diritaj principoj. Neniul la Fundamento, nek la Lingva

¹⁾ Fundamentaj Dokumentoj pri la Oficialaj Institucioj de Esperanto (eldonitaj en 1914 de la Centra Oficejo).

²⁾ Regularo de la Lingva Komitato (Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, p.107).

Komitato povos esti baroj por la normala evolucio de la lingvo, kiun ili kontraŭe certigas.

La L.K. *konsistas* el lingvaj kompetentuloj, kies nombro ne estas limigita, kaj kiuj konservas sian oficon dum 9 jaroj. La proponoj pri anoj venas, ĉu de la propagandaj, ĉu de la aplikaj kaj specialaj Esperantistaj societoj kaj grupoj, ĉu de Lingvo-komitatanoj kaj de anoj de aliaj altaj esperantistaj institucioj. La Akademio starigas liston el la proponitaj novaj anoj kaj el la anoj, kies naŭjara periodo de aneco finiĝis. Ĝi komunikas la kandidatliston al la koncernataj naciaj asocioj, petante ilian opinion. La elekton efektivigas la L.K. mem. La rolo de la Komitatanoj estas: voĉdoni pri elektoj de novaj anoj kaj por elekto de la Akademio, subskribi la proponojn devige esplorotajn de la Akademio, aprobi aŭ malaprobi la decidojn de la Akademio kaj partopreni, se ili estas petataj pri tio, en la laboroj de la diversaj komisionoj kaj subkomitatoj. La oficiala organo de la L.K. estas Oficiala Gazeto.

Estas starigita en la L.K. supera komisiono aŭ Esperantista Akademio. La Akademianoj, kies nombro ne povas superi 18, estas elektataj (por 9 jaroj) de la L.K. laŭ proponlistoj enhavantaj nombron da kandidatoj proksimume duoblan de la nombro de elektotaj. Tiuj kandidatoj estas elektitaj de la estraro inter la membroj montritaj *per speciala lingva kompetenteco*, kaj kiu havas la eblon, doni efikan partoprenon en la laboroj de la komitato.

La L.K. kaj Akademio havas la saman *estraron*, kiu konsistas el unu prezidanto, unu aŭ du vicprezidantoj, unu ĝenerala sekretario, se necese, kaj la direktoroj de la laboraj Sekcioj (1. pri gramatiko, 2. pri komuna vortaro, 3. pri teknika vortaro, 4. pri internaj kaj ĉiuj aliaj aferoj); ĝi estas elektata (por tri jaroj) de la Akademio.

La Akademio esploras 1. la demandojn, kiujn ĝi elektis per propra iniciato, 2. la demandojn senditajn al ĝi de la

diversaj subkomitatoj, sekcioj kaj komisionoj, 3. ĉiujn demandojn prezentitajn al ĝi per favora raporto subskribita de almenaŭ 5 anoj de la L.K.

En ĉiu lando la anoj de la L.K. starigas naciajn *subkomitatojn*, kies tasko estas 1. helpi la propagandajn societojn, se ili tion petas, por la organizo de la ekzamenoj kaj diplomoj, 2. esplori la Esperantajn verkojn aperintajn en la lando kaj raporti pri ili.

Speciala internacia komisiono raportos al la Akademio pri verkoj rekompencindaj laŭ la stila rilato.

Por esplori specialajn demandojn, la Akademio povas starigi *specialajn konsiliĝajn kaj laborajn komisionojn*.

La *decidoj* de la Akademio, kiuj koncernas oficialigon de lingvaj novaĵoj, estas konigataj al la anoj de la L.K. por konsulto. Pri ili ĉiu ano de la Komitato devas voĉdoni. Se ili ne estas malaprobitaj de pli ol unu triono de la Komitato, ili fariĝas oficialaj. Se pli ol unu triono de la Komitato malaprobas la decidon, ĝi estas denove pri diskutata de la Akademio.

Ĉiu esperantisto, kaj speciale ĉiu esperantista grupo aŭ asocio, povas proponi ŝanĝojn en la Regularo. La L.K. mem decidas pri tiuj proponoj post raporto de la Akademio.

Rimarkigo: La regularo, kiel oni vidas, ne entenas provizon por *financa subteno* al la L.K., kaj ĝis nun la elspezojn devis prizorgi privataj personoj.

La juĝo de Ladevèze, en la unua eldono de tiu ĉi libro, valoras ankoraŭ hodiaŭ: „Certe tiuj institucioj estas ne perfektaj kaj bezonas internan reformon, sed ni provu ilin reformi, ne kun malamika intenco detrui, sed kun la favora sento, anstataŭigi malplibonon per plibono sen skuo, rompo.“

Jen la *nomaro* de la anoj de la Akademio: Prezidanto: Prof-ro Th. Cart; Vicprezidantoj: Dro Mybs, J.M. Warden; Direktoroj de Sekcioj: A. Grabowski (Gramatiko, †1921), E. Grosjean-Maupin (Komuna Vortaro), Corret (Scienca

kaj Teknika Vortaro), Dro E. Privat (Konkursoj kaj Premioj); Membroj: P. Christaller, E. Evstifejeff, V. Inglada, E. Kühnl, P. Lengyel, P. Nylén, A. E. Wackrill. La nunaj Lingvo-Komitatoj apartenas al la angla, bulgara, flandra, franca, germana, hispana, holanda, hungara, itala, kataluna, pola, portugala, rumana, rusa, sveda lingvoj.

34. Kiamaniere egala internacia parol- kaj esprimmaniero estas celata kaj atingata?

Plej gravan rolon ĉitiurilate ludas la *Lingva Komitato* kaj la *Akademio* (vidu 33an Dem.). Multe utilas la *internaciaj kongresoj* per la reciproka interparolado, kiel ankaŭ la *literaturo* kaj ĉiuj bone redaktataj *Esperanto-gazetoj*. Grava por Esperanta stilo vere internacia kaj samtempe fidela al la Fundamento estas la *Esperantista Literatura Asocio* (antaŭe: Internacia Unuiĝo de Esperantistaj Verkistoj), kiu estis fondita dum la Antwerpen-a Kongreso. Per internacia kontrolo ĝi zorgas pri tio, ke gramatiko kaj stilo de la publikigaĵoj de ĝiaj membroj estu neriproĉindaj. Komitato de 5 diverslingvaj membroj ilin revizias. Ĝiaj komunikoj publikigis unue en Oficiala Gazeto, poste en la gazeto „Esperanto“.

Atentindaj ankaŭ estas la *Lingvaj Respondoj*, kiujn Dro Zamenhof donis al diversaj al li faritaj lingvaj demandoj. Ili estas kolektitaj en 1. Lingvaj Respondoj aperintaj en „La Revuo“ (1906—1908; Hachette et Cie, Paris 1910); 2. Lingvaj Respondoj, enhavantaj la en „Esperantisto“ (1889—1893) kaj en „Oficiala Gazeto“ (1911—1912) publikigitajn respondojn (Esperantista Dokumentaro, kajero 12a, Paris 1913).

Por starigi difinitan normon inter la esperantistoj kaj precipe konsiderante la baldaŭan neceson, liveri al regnaj lernejoj instruantojn de Esperanto, kaj ankaŭ por eviti

eblan fuŝadon en la afero, multaj naciaj asocioj starigis ekzamenojn. Germanujo unue ne volis, sed fine, vidinte ilian neceson kaj grandan utilon laŭ diversaj vidpunktoj, Germana Esperanto-Asocio komisiis Ekzamenan Komitaton, kiu ellaboris regularon kun tri ekzamenoj: elementa, supera kaj speciala, por akiro de atesto pri lernado, *lingva* kapableco kaj *instrua* kapableco, uzante por tio la francan kaj anglan regularojn. Ĝi proponis ĝin al la esperantistaro por interkonsento inter la naciaj asocioj, por ke la normo estu laŭeble same alta ĉie.

Dum sia kongreso en 1921 en Essen Germana Esperanto-Asocio revokeble transdonis siajn rajtojn pri aranĝo de ekzamenoj al la Saksa Esperanto-Instituto.¹⁾ Tiu instituto (nova ekzamena regularo de la 2a de Marto 1920, aprobita de la saksa ministerio pri ŝtata ekonomio)²⁾, krom la ekzamenoj pri *kapableco* kaj pri *scienca-pedagogia* kapableco aranĝis ekzamenojn pri *scienca* kapableco por tiuj, kiuj intencas pruvi, ke ili detale pritraktis Esperanton laŭ scienca vidpunkto, ne insistante pri speciala pruvo de sia kapableco kiel instruistoj de Esperanto. La ekzamenoj okazas en la sidejo de la instituto (Leipzig), sed ankaŭ en multaj aliaj lokoj sub gvidado de speciale destinitaj kaj oficiale aprobitaj komisaroj. Ankaŭ la eksterlando multe ŝatas tiujn ŝtate regulitajn ekzamenojn.

¹⁾ Tiu instituto, fondita en 1908, substaras la saksan ministerion por ŝtata ekonomio, sed estas subtenata precipe per privataj monrimedoj. Ĝi aranĝas en sia sidejo, kaj de vintro 1914 ankaŭ en siaj Esperantaj lernejoj en aliaj urboj, Esperantajn kursojn por komencantoj, progresintoj kaj instruistoj kaj okazigas ekzamenojn. Ĝi administras la saksan Esperanto-bibliotekon, akcelas industrion kaj komercon kaj internaciajn ekspoziciojn, faras propagandajn paroladojn kaj ĉiumaniere helpas la Esperantan movadon; ĝi antaŭ ĉio ankaŭ science reprezentas Esperanton. Malgraŭ sia titolo „Saksa Esperanto-Instituto“ ĝi estis laŭefike envere *germana* instituto. En Februaro 1922 ĝi estis, kun konsento de la regna ministerio por internaj aferoj, transformata al *Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko*. — Ankaŭ en Finnlando kaj de ne longe en aliaj landoj ekzistas Esperanto-Institutoj.

²⁾ Novaj regularoj estas publikigitaj.

II. LA ESPERANTISTA CENTRA OFICEJO

35. Kion vi scias pri la antaŭa Centra Oficejo?

Pri la historio de la Centra Oficejo vidu 18an, 23an, 24an, 28an Dem.

Jen kelkaj detaloj pri la C.O. laŭ la Regularo,¹⁾ aprobita de la 7a Universala Kongreso, 1911 en Antwerpen, kiu formale montras ĝiajn celojn: La Esperantista Centra Oficejo estas *oficiale* komisiita por funkciigi la servojn de *sekretariejo* de la Oficialaj Esperantistaj Institucioj, tio estas de la institucioj, kies kreadon regule deziresprimis la Universalaj Kongresoj de Esperanto aŭ la Rajtigataj Delegitoj de la esperantistaj societoj, kaj *kies subtenadon devas regule provizi tiuj societoj*.

Ĝi estas ankaŭ komisiita, sed *ne oficiale* kaj nur bonvole kaj laŭ siaj agadaj rimedoj, por kunhelpi kaj kunapogi la entreprenon de Ĝenerala Propagando, por kiuj la Esperantistaj Societoj povas peti ĝian helpon; fine ĝi povas ankaŭ same helpi la entreprenon de starigo de statistikoj, de kolekto kaj konservado de arĥivoj kaj de bibliografiaj dokumentaroj.

La Oficialaj Institucioj, al kiuj la C.O. *devige* helpas, estas: Konstanta Komitato de la Kongresoj; Lingva Komitato kaj Akademio; Oficiala Gazeto kaj Esperantista Dokumentaro, organoj de tiuj Institucioj.

La aliaj entreprenoj, kiujn la C.O. laŭ peto povas eble utile helpi laŭ siaj agadaj rimedoj, estas i. a.: la ĝeneralaj verkoj pri Statistiko de Esperanta Movado; Informa Bul-teno por ĝenerala propagando de Esperanto; la bibliografiaj verkoj pri Esperanta literaturo.

La Centra Oficejo estas kondukata de *Ĝenerala Sekretario, direktoro* de siaj servoj, kiun helpas la necesa nombro

¹⁾ Esperantista Centra Oficejo (Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, p.125).

da sekretarioj kaj oficistoj. Li estas *submetita al kontrolo de Administra Komitato* (anstataŭanta, de 1911, la dum la Va Kongreso, 1909 en Barcelona, provizore kreitan Internacian Financan Konsilantaron; vidu 21an Dem.), formita el delegitoj regule elektitaj de la partoprenantoj al la subtenado de la C.O. La anojn de la Administra Komitato elektas la esperantistaj naciaj societoj, ĝenerale po unu delegito por ĉiuj mil anoj aliĝintaj.

La proksimuma sumo necesa por la funkciado de la C.O. dum la venonta jaro estas fiksota ĉiujare per decido de la Administra Komitato, laŭ propono de la kondukanta estraro de la Oficejo. La dispartigo de tiu sumo inter la diversaj landoj estas farita proporcie laŭ la disvastiĝo jam atingita de la esperantista movado en ĉiu lando. Ĉiu societo, kiu partoprenas la subtenadon de la Oficejo, devas zorgi pri la kolekto kaj ĝustatempa sendado de la mono. Oni alkonfidas al *Societo de Amikoj de Esperanto* (vidu 23an, 28an Dem.) la organizadon de konstanta internacia monofarado, kiu celos starigi la garantian kapitalon difinitan por provizi la mankojn eventuale rezultantajn el la supre diritaj agmanieroj.

La anoj de la Administra Komitato verkas sian internan regularon. Ili elektas *prezidanton* (unua prezidanto: ĝeneralo Sebert) kaj *vicprezidanton*. Ili kunvenas ĉiujare, almenaŭ unufoje, dum la Universala Kongreso. La sidejo de la Centra Oficejo estas provizore fiksita en Paris, 51, rue de Clichy.

Dro Zamenhof donis pri la Centra Oficejo jenan klarigon: „El leteroj kaj gazetaj artikoloj mi vidas, ke kelkaj esperantistoj ne ĝuste komprenas la esencon de la Centra Oficejo, kaj ili pensas, ke mi propravele fondis ian novan leĝdonantan komitaton. Tial mi devas iom klarigi la aferon.

La Centra Oficejo ne estas ia leĝdonanta komitato, ĝi estas simple *oficejo*, ĝi estas simple *loko*, en kiu koncentriĝas la

laboroj de la du komitatoj, kreitaj de la Bulonja Kongreso. La kongreso kreis provizoran Lingvan Komitaton kaj provizoran Organizan Komitaton, sed ĝi donis neniajn monajn rimedojn, por ebligi al la ambaŭ komitatoj sukcesan laboradon; tiam troviĝis sindonaj kaj malavaraj esperantistoj, kiuj el sia propra poŝto donis (almenaŭ por la unua tempo) la necesan monon, luis apartan loĝejon, en kiu povis koncentriĝi la laboroj de la ambaŭ komitatoj, ĉiuj dokumentoj, ĉiuj leteroj, irantaj al la diritaj komitatoj kaj de la komitatoj, ili ankaŭ difinis kelkan salajron por aparta sekretario, kiu — kun konsento de la prezidantoj de ambaŭ komitatoj — devas plenumi la necesajn korespondadon, registradon k. t. p. Sekve la Centra Oficejo estas ne ia memstara leĝdonanta institucio, sed nur simple helpa oficejo por la ambaŭ komitatoj kreitaj de la kongreso.

Mi devas diri ankoraŭ kelkajn vortojn pri mia persona rilato al la ambaŭ komitatoj. Pro la nunaj cirkonstancoj en mia patrujo, kiu iaforte por longa tempo detranĉas min de la tuta mondo esperantista, kaj parte ankaŭ pro la stato de mia sano, kiu nun am ne permesas al mi tiel multe labori eksterprofesie, kiel antaŭe, mi ne povas nun aktive partoprenadi en la laboroj de la ambaŭ komitatoj elektitaj de la kongreso, kaj tial mi petas, ke kun ĉio koncernanta la agadon de la komitatoj, oni sin turnu ne al mi, sed al la prezidantoj de la diritaj komitatoj, nome:

- a) por la Lingva Komitato al s-ro Rektoro Boirac;
- b) por la Organiza Komitato al s-ro Generalo Sebert.

(17. Febr. 1906.)

En *cirkulero* (6an de Novembro 1905) estas dirite: „La Esperantista Centra Oficejo restis ĝis nun *privata fondaĵo*, organizita per la iniciato de kelkaj amikoj de Esperanto, kaj finance subtenata de ili, sed ĝiaj fondintoj intencas, por certe daŭrigi ĝian ekzistadon, fondi, se estas necese, specialan Societon de Amikoj aŭ Protektantoj de Esperanto, kiu sin okupas pri la direktado de tiu Oficejo“.

III. LA KONSTANTA KOMITATO DE LA KONGRESOJ

36. Kion vi scias pri la antaŭa Konstanta Komitato de la Kongresoj?

Pri la historio de la Konstanta Komitato vidu 17an ĝis 20an Dem. Laŭ la Kongresa Regularo (vidu 31an Dem.) la K. K. K. konsistas el Internacia Organiza Komitato, Loka Komitato kaj Konstanta Ĝenerala Sekretariejo de la Kongresoj, kiu sidas ĉe la Esperantista Centra Oficejo.

La *Internacia Organiza Komitato*, elektita de ĉiu kongreso laŭ propono de la estraro por prepari la sekvontan kongreson, estas komisiita, decidi la ĝeneralajn preparojn rilatajn al la kongreso, nome fiksi la pagotan kotizon, prepari la provizoran tagordon, fari la oficialajn internaciajn klopodojn. Ĝi enhavas kiel membrojn: *du anojn* de la Komitato de la antaŭa kongreso, *du anojn* de la K. de la nuna kongreso, *du anojn* elektitajn por ĉiu kongreso decidita por la venonta jaro, unu *prezidanton* (kaj se necese unu vicprezidanton) senpere elektitajn de la kongreso mem, unu *ĝeneralan sekretarion*, same elektitan de la kongreso, kun la nombro necesa de sekretarioj-adjunktoj, almenaŭ unu por Eŭropo kaj unu por ĉiu kontinento, kie okazas la kongreso, (kuratorojn de la Kongresa Kaso).

La *Loka Komitato*, starigita kiel delegacio de la Internacia Organiza Komitato, estas komisiita pri ĉiuj detaloj de la loka organizo.

La ofico de la *Ĝenerala Sekretario* estas, konservi la arĥivojn de la kongresoj, prepari la laborojn de la Internacia Organiza Komitato kaj plenumi ĝiajn decidojn..., publikigi la protokolaron kaj oficialajn dokumentojn de la kongreso, por kies presado la Kongresa Kaso posedas la necesan monon, plenumi la kongresajn decidojn.

La antaŭa K. K. K. estis anstataŭigata de la *Konstanta Kongresa Komisiono*, komisiita de la Centra Esperanto-Komitato (vidu 41an Dem.).

B. Neoficialaj Organizaĵoj de Esperanto

I. LOKAJ KAJ NACIAJ ORGANIZAĴOJ

37. Kion vi scias pri lokaj organizaĵoj?

En preskaŭ ĉiu loko, kie ekzistas kelkaj samideanoj, fondiĝis grupo, klubo aŭ societo, kiu celas *propagandi la lingvon* per publikaj paroladoj, kunvenoj, festoj, ekspozicioj, kaj *faciligi ĝian instruadon* per kursoj, kunvenoj, bibliotekoj ktp. La organizo de tiuj lokaj grupoj varias laŭ la enlandaj kondiĉoj kaj la nombro de la esperantistoj; en multaj urboj ekzistas pluraj grupoj, sendependaj aŭ kunfederitaj. En kelkaj lokoj estas aranĝita Esperanto-Oficejo, kie estas alcentrigita ĉio, kio rilatas la Esperantan vivadon, librejo, biblioteko, kunvenejo ktp. Dum la milito multaj grupoj ĉesis funkcii (laŭ Oficiala Jarlibro 1920 de Universala Esperanto-Asocio, p. 55). — Nuntempe la nombro de la grupoj el rondoj ĝeneralaj kaj specialaj (ekz. komercistaj, poŝtistaj, fervojistaj, laboristaj, studentaj ktp.) surprize plimultiĝas.

38. Kion vi scias pri naciaj (vidu 41an Dem.) organizaĵoj?

Ĉar la esperantistoj de sama lando havas komunajn interesojn, fondiĝis en multaj landoj *naciaj societoj*, kies estraro administras helpe de konsilantaro la nacian movadon. Ili konsistas jen el grupoj, jen el individuoj, jen el ambaŭ kategorioj. En kelkaj landoj ekzistas ankaŭ *regionaj* asocioj (ekz. en Germanujo: Franka Esperanto-

Ligo, Nordalbinga Ligo, Nordokcidentgermana Ligo, Rejnlanda-Vestfalia Ligo, Marka-Pomera Ligo, Saksa Ligo, Silezia Ligo). La naciaj asocioj plene disvolviĝintaj okazigas ĝenerale ĉiujare naciajn kunvenojn aŭ kongresojn, eldonas oficialajn gazetojn kaj propagandilojn, aranĝas ekzamenojn kun diplomoj. En la naciaj kongresoj la grupoj estas reprezentataj de delegitoj, koresponde al la nombro de siaj anoj. Nuntempe ekzistas: *Aŭstruja Esperanto-Delegitaro*, *Belga Ligo Esperantista*, *Brita Esperantista Asocio*, *Bulgara Esperantista Societo*, *Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista*, *Ligo de Germanaj Esperanto-Grupoj de Ĉeĥoslovakujo*, *Centra Dana Esperantista Ligo*, *Estonia Esperantista Unuiĝo „Espero“*, *Esperanto-Asocio de Finnlando*, *Franca Societo por propagando de Esperanto*, *Germana Esperanto-Asocio* (1906); en *Hispanujo*: *Federacio „Zamenhof“*, *Kataluna Esperantista Federacio*; *Hungarlanda Esperanto-Societo*; *Itala Esperantista Federacio*, *Litova Esperanto-Asocio*, *Nederlanda Societo Esperantista „La estonto estas nia“*, *Norvega Esperantista Ligo*, *Federacio de Esperantistaj Societoj en Pollando*, *Rumanlanda Esperanto-Societo*, *Sovjetlanda Esperantista Unuiĝo*, *Sveda Esperanto-Federacio*, *Svisa Esperanta Societo*, *Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko*, *Argentina Esperanto-Asocio*, *Brazila Ligo Esperantista*, *Japana Esperanto-Instituto*, *Aŭstralazia Esperanto-Asocio*. Kelkaj antaŭ la milito ekzistantaj naciaj organizaĵoj estas reorganizotaj.

Ekzistas aŭ estas reorganizotaj multaj naciaj *fakaj* societoj: *Literaturaj*, ekz. Brita Literatura kaj Debata Societo; *religiaj*, ekz. Germana Ligo de Katolikaj Esperantistoj, Aŭstria Katolika Ligo Esperantista, Unuiĝo de Italaj Katolikaj Esperantistoj; *socialistaj*: ekz. Germanlingvuja Laborista Esperantista Asocio, Nederlanda Federacio de Laboristaj Esperantistoj, Brita Ligo de Esperantistaj So-

cialistoj, Hungara E-ista Soc. Laborista; *profesiaj*: ekz. Esperanto-Unuiĝo de Germanaj (Saksaj) Instruistoj, Esperanto-Unuiĝo de Germanaj Fervojistoj, Itala Fervojista Esperanta Asocio, Esperanta Asocio de Poŝto, Telegrafo kaj Telefono de Francujo kaj kolonioj, Polica Esperantista Societo (Dresden), Portugala Polica Societo, Tramvojjista Unuiĝo E-ista (Wien), Germana Scienca Esperanto-Asocio k. a.

39. Kion vi scias pri la Universala Esperanto-Asocio?¹⁾

La Universala Esperanto-Asocio (U.E.A.) estis fondata en 1908, laŭ la iniciato de H. Hodler el Genève († 1920) kaj de Th. Rousseau el Dijon († 1916), kiuj, konvinkiĝintaj, ke nura propagando, kiel oni ĝin ekskluzive faris en la tiama epoko, tute ne sufiĉas por daŭre enradikigi Esperanton, opiniis necesa „organizaĵon, por kunigi en unu fortika fasko ĉiujn aktivajn Esperantistojn kaj starigi *praktikan servaron*, dank' al kiu Esperanto prezentos tujan utilecon al la personoj ĝin lernintaj“. U.E.A., kreinte „la servaron per la delegitoj, kies solidara sindonemo helpas homojn servi unuj la aliajn kaj konatiĝi per amikaj rilatoj“, ankaŭ utilas al la realigo de la „interna ideo“ de Esperantismo (vidu 57an Dem.). Ĝi estas tute internacie organizita; naciajn sekciojn ĝi ne havas. La provizora regularo de U.E.A. estis akceptata en Aprilo 1908; en 1910 estis voĉdonata la unua, en 1920 nova statuto. Oficiala organo de la asocio estas la gazeto „*Esperanto*“ (fondita en 1903). U.E.A. rapide progresis.

Ĝi okazigis sian unuan kongreson en 1910 en Augsburg; de tiam la kongresoj okazis samtempe kun la Universalaj Kongresoj de Esperanto. La 1an de Aŭgusto

¹⁾ De post la 14a Universala Kongreso U.E.A. estas *Oficiala Institucio* de Esperanto (vidu 41an Dem.).

1913 ĝi kalkulis 5757 (en 1914 7233) membrojn kaj 384 entreprenojn (societoj, korporacioj, firmoj ktp.) kaj havis 1179 delegitojn en ĉiuj partoj de la mondo. „La nombro de la servoj plenumitaj de 1909 ĝis 1913 atingis 46549, el kiuj 11876 pri komerco, 13556 pri turismo, 2167 pri junuloj kaj studentoj kaj 18950 diversaj; la movado de la korespondaĵoj sumiĝis je 231 158. La monda milito grave malhelpis la agadon de U.E.A., sed malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj funkciis ĝia oficejo.“ Nun ĝi denove vigle progresadas.

Laŭ la nova statuto (1920)¹⁾ U.E.A. *celas*: disvastigi la *uzadon* de la internacia helplingvo Esperanto; plifaciligi la ĉiuspecajn *moralajn* kaj *materiajn* rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri raso, nacieco, religio aŭ lingvo; krei *internaciajn servojn* uzeblajn de ĉiuj homoj, kies intelektaj aŭ materiaj interesoj celas trans la limojn de ilia genta aŭ lingva teritorio; kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvigi ĉe ili la komprenon kaj estimon por fremdaj popoloj. (Ĝi do ne okupas sin pri *senpera* propagando — tio estas la tasko de l' naciaj asocioj —; ĝi rekrutigas siajn anojn inter la esperantistoj, t. e. inter personoj, kiujn konvinkis jam la propagando de naciaj asocioj.)

La *oficiala lingvo* de U.E.A. estas la Zamenhofa Lingvo Esperanto, tia, kia ĝi estas difinita per sia literatura kaj teknika verkaro. La sidejo de U.E.A. troviĝas ĉe ĝia *Centra Oficejo* en Genève (Svislando). La Centra Oficejo estas oficiale nomata: „Internacia Esperanto-Oficejo“. La oficialaj publikigoj de U.E.A. okazas per la Jarlibro, per la gazeto „*Esperanto*“, per bultenoj aŭ cirkuleroj. La asocio rajtas eldoni ĉiuspecajn presaĵojn rilatantajn al ĝiaj celo kaj agado.

¹⁾ Statuto de la Universala Esperanto-Asocio (Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, p. 150).

Ĝiaj membroj estas *Membroj* (M.), kiuj pagas la kutiman jaran kotizon; *Membroj-Abonantoj* (M.A.), kiuj pagas kun la kotizo la abonon al „Esperanto“ laŭ favoraj kondiĉoj; *Membroj-Subtenantoj* (M.S.), kiuj, por helpi al la Asocio, pagas la por ili fiksitajn pli altajn kotizon-abonon; *Dumvivaj Membroj* (D.M.), kiuj akiris almenaŭ unu ateston de la „Garantia Kapitalo“; *Honoraj Membroj* (H.M.). Ĉiuj membroj ricevas membrokarton kaj la jarlibron kaj rajtas uzi la ĝeneralajn servojn.

Fako de U.E.A. nomiĝas organizita grupiĝo de membroj, kiuj volas plivigli la rilatojn inter si por esperantistaj, profesiaj aŭ aliaj ne kontraŭstatutaj celoj.

Entreprenejoj de U.E.A. estas nomataj la societoj, korporacioj, firmaoj ktp., kiuj, pagante ĉiujare fiksitajn sumojn, deziras esprimi sian simpatian al U.E.A. aŭ interrilati kun la esperantistoj.

La *organoj* de la Asocio estas: Kunvenoj kaj skribaj voĉdonoj, la Delegitoj, la Komitato, la Komisiono, la Prezidanto, la Centra Oficejo kun Direktoro; Vicdirektoro kaj oficistoj, la Redakcio kun la Redaktoro de „Esperanto“.

En ĉiuj lokoj, gravaj pro sia grandeco, siaj komercaj aŭ turismaj rilatoj, la Asocio klopodas elekti *Delegitojn* kaj *Vicdelegitojn*. Ili reprezentas en sia loko la Asocion kaj rilate al la estraro de U.E.A. siajn membrojn; propagandas, varbas membrojn, enkasigas kotizojn kaj prizorgas la administrajn aferojn; *respondas la informpetojn de la membroj kaj helpas ilin okaze de vojaĝo*; klopodas starigi en sia loko la aliajn oficialajn servojn kaj kontrolas ilian funkciadon. La Delegiteco estas honora ofico. Por grandega urbo, landparto aŭ tuta lando povas esti elektata *Ĉefdelegito* kaj anstataŭanto.

La ĝenerala gvidado de la Asocio estas komisiita al *Komitato*, konsistanta el 15—25 membroj diversnaciaj. Ĝi elektas inter siaj membroj: la Prezidanton, la Vicprezid-

anton kaj la Komisionon de U.E.A., plie la Direktoron kaj Vicdirektoron, la Redaktoron kaj la honorajn membrojn; fiksas la ĝeneralan agadon de U.E.A. laŭ la voĉdonoj de la Delegitoj kaj la deziresprimoj de la Kongreso; privoĉdonas la jaran raporton kaj kontrolas la administradon de la Asocia kapitalo, decidas pri apelacioj, kaj pri la aliaj aferoj al ĝi rezervitaj.

La *Komisiono* konsistas el la Prezidanto aŭ Vicprezidanto de U.E.A. kaj el 4 aŭ el 6 pliaj Komitatanoj, loĝantaj en landoj ne tro malproksimaj de la oficiala sidejo. Ĝi decidas konforme al la instrukcioj de la Komitato pri ĉiuj aferoj superantaj la kompetentecon de la Direktoro, Redaktoro kaj Ĉefdelegitoj; starigas novajn servojn aŭ aranĝojn, voĉdonas pri la fakoj; kontrolas la Centran Oficejon kaj la Redakcion; administras la kapitalon de la Asocio; prizorgas la aliajn aferojn al ĝi komisiitajn de la Komitato aŭ per tiu statuto.

Honoraj Reprezentantoj de U.E.A. estas personoj, elektitaj por tri jaroj de la Komisiono, kiuj pro sia sperto, aŭtoritateco aŭ socia pozicio povas utili al la Asocio.

Okazas ĉiujare *Kongreso* de U.E.A. (kutime samtempe kaj samloke kun la Universalaj Kongresoj de Esperanto). Ĝi aŭdas la oficialajn raportojn, ekzamenas la moralan kaj financon situacion de la Asocio; esploras la proponojn de la Komitato kaj de la membroj kaj fiksas laŭ tio la ĝeneralan agadon por la venonta jaro. Ĝi aprobas aŭ malaprobas la raportojn kaj decidas pri la proponoj en formo de deziresprimoj al la Komitato.

La *Centra Oficejo* de la Asocio konsistas el Direktoro, Vicdirektoro, oficistoj kaj helpantoj. Direktoro kaj Vicdirektoro estas elektataj de la Komitato. La Komisiono povas elekti profesionan oficejestrin kun la titolo: Ĝenerala Sekretario de U.E.A. La Direktoro gvidas la administradon konforme al la agadplano de la Komitato kaj klo-

podas por la disvastigo de la Asocio. Li reprezentas ĝin en ĉiuj kutimaj administraj aferoj kaj subskribas en ĝia nomo. La Centra Oficejo konservas la bibliotekon kaj arĥivon de la Asocio. Post novjaro la Direktoro raportas al la Komitato pri la stato de la Asocio. Li redaktas la „Oficialan Jarlibron“, la „Oficialan Informilon“ en la gazeto, kaj eblan bultenon.

La Asocio eldonas je sia risiko kaj profito la gazeton „*Esperanto*“.

Pri la *Administrado* de U.E.A. estu prezentataj jenaj sciigoj: La Asocio kalkulas laŭ svisaj frankoj. La Direktoro fiksas la oficialan prezon de la *kotizoj* por ĉiu lando en nacia mono, konforme al la kurzo kaj la praktikaj bezonoj. La *monhavaĵo* de U.E.A. konsistas el: la Centra Kaso, la kasoj de la Teritorioj (t. e. la agadkampo de Ĉefdelegito) kaj de la Fakoj, la kapitalo de la Garantiantoj kaj la Asocia kapitalo. La Centra Kaso estas administrata de la Direktoro aŭ Vicdirektoro kun la helpo de Centra Kasisto. La kapitalo de la Garantiantoj konsistas el la pagoj de la Dumvivaj Membroj kaj el donacoj al ĝi destinitaj, kaj ĝi estas administrata, sub la kontrolo de la Komisiono, de la Garantiantoj mem. Ĝi celas plifortigi la financon kaj disvastigi la laborkampon de U.E.A. La Asocia kapitalo konsistas el la havaĵo ricevita per donacoj, heredaĵoj ktp. Ĝi estas konservata kaj administrata ekster la Centra Oficejo. Tiu kapitalo formas la ĝeneralan rezervon de la Asocio, el kiu ĝi kreas novajn aranĝojn aŭ pagas jarajn deficitojn.

Ĝenerala Voĉdonado de ĉiuj membroj okazas: se la Komitato ĝin decidas; se la kvinono de ĉiuj membroj ĝin skribe postulis. Tiu voĉdonado povas laŭleĝe nuligi ĉiujn elektojn kaj decidojn, ŝanĝi la statuton kaj dissolvi la Asocion. La Centra Oficejo okazigas ĝeneralan voĉdonadon de la *Delegitoj*, por elekti la Komitaton de

U.E.A., ĉiun trian jaron; por fiksi la kotizon aŭ ŝanĝi la statuton; por aliaj aferoj, laŭ decido de la Komitato aŭ Komisiono, aŭ laŭ iniciato de la membroj.

Plendoj de membroj kontraŭ aliaj membroj, Delegitoj kaj la Centra Oficejo estu laŭ la kazo adresataj al la Ĉefdelegito, Fakestro aŭ Direktoro. Aliaj plendoj iru al la Prezidanto. Se la plendo montriĝas prava, oni riproĉas la kulpigiton. Pri la eksigo de membro aŭ Delegito decidas la Prezidanto, aŭdinte la Direktoron; pri aliaj eksigaj aferoj, ne rilatantaj Komitatanojn, decidas la Komisiono.

La *servoj* de la Asocio estas rezervataj al ĝiaj membroj. Aranĝas la servojn la Centra Oficejo, la Fakoj aŭ la societoj kaj firmoj, kun kiuj U.E.A. kontraktis. La servoj de informpetado kaj helpo al la vojaĝantoj estas principe senpagaj kaj prizorgataj de la *Delegitoj*. La membroj rajtas peti de la Delegitoj parolajn aŭ skribajn informojn pri ĉiu ajn temo rilatanta al la agado de U.E.A. Devas esti nepre rifuzataj: Petoj de servoj kontraŭ la celoj de U.E.A. aŭ la bonaj moroj; petoj havantaj konfidencian karakteron (pri morala indeco, pagokapablo aŭ familiaj cirkonstancoj de personoj), kaj ripetitaj petoj de ne-membroj.

40. Kion vi scias pri Esperantistaj Unuiĝoj inter diversnaciaj samfakanoj?

Antaŭ la milito ekzistis proksimume 35 — 40 internaciaj fakaj unuiĝoj: Abstinenculoj, bankistoj, Instituto de Esperanto (por kreo de normalaj lernejoj kaj internaciaj diplomoj; aprobita dum la 4a Kongreso), farmaciistoj, fervojistoj, filatelistoj, framasonoj, oficejo de instruantoj de Esperanto, instruistoj, juristoj, katolikoj, korektanta klubo, kristanaj junuloj, Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio, Libera Penso, maristoj, pacifistoj, policistoj, preslabor-

istoj, psiĥistaro, publikoficistoj, Internacia Scienca Asocio, ŝakludistoj, socialistoj, stenografiistoj, studentoj, teozofiistoj, vagabonda klubo, varietea ligo, vegetaranoj, virinoj k. c. Dum la milito multaj el tiuj unuiĝoj malaperis. El la nuntempe ekzistantaj estu citataj: Esperantista Literatura Asocio (vidu 34an Dem.); Eklezia Esperantista Ligo; Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (I. K. U. E.); Teozofia Esperanta Ligo; Universala Framasona Ligo Esperantista; Internacia Unuiĝo de Instruistoj Esperantistaj; Internacia Scienca Asocio (kun sekcioj, ekz. Teknika, Pedagogia, Jurista Sekcio de I. S. A., Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio [T. E. K. A.]); Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝtoficistoj (Ilepo); Internacia Asocio de Fervojistoj Esperantistaj; Internacia Federacio por komuna komerca lingvo; Vegetara Ligo Esperantista; Skolta Esperantista Ligo; Universala Esperanto-Asocio Junularo; Sennacieca Asocio Tutmonda; Blinduloj (sen centra organizo; naciaj konsuloj); Kvakera Esperantista Societo. Ĉiujare reviviĝas aŭ fondiĝas aliaj.

41. Kion vi scias pri la nuna kunordigo de la esperantistaro (de post la XIVa Universala Kongreso)?

Inter la esperantistaro ekzistas, kiel jam priskribite, centroj de ĝenerala internacia laboro. Jam dum la la Universala Kongreso estis fondataj la Lingva Komitato kaj la Konstanta (Organiza) Komitato de la Kongresoj. Ili havis kiel sidejon kaj sekretariejon la Esperantistan Centran Oficejon, kiu estis ankaŭ redakto de la Oficiala Gazeto Esperantista kaj sidejo de la Unuiĝo de Esperantistaj Societoj kaj de la Societo de Amikoj de Esperanto. La Centra Oficejo do estis institucio tre grava por la esperantistaro; en ĝi koncentriĝis ĝiaj laboroj. Sed ĝi ne nur estis fondata kaj organizata, sed ankaŭ finance subtenata de kelkaj amikoj de Esperanto, do *private* kaj *ne oficiale*.

Dum la Va Universala Kongreso en 1909 (Barcelona) ja estis kreata la Internacia Financa Konsilantaro, kaj dum la VIa en 1910 (Washington) la Centra Oficejo estis metata sub la kontrolon de la Administra Komitato anstataŭanta la Internacian Konsilantaron, kiu, same kiel tiu, estis elektata de la esperantistaj naciaj societoj. Per tio la Esperanto-societoj prenis sur sin la devon, prizorgi la financajn rimedojn de la Centra Oficejo kaj de la Oficialaj Institucioj. Ankaŭ la Internacia Unuiĝo de Esperantistaj Societoj (I. U. E. S.) kaj la Societo de Amikoj de Esperanto (S. A. E.) konsideris sia tasko, helpadi la materian funkciadon de tiuj institucioj. En 1912 la Centra Oficejo estis sensŭlde transdonata al la esperantistaro de sia iniciatinto generalo Sebert. Malgraŭ ĉi ĉio, ankoraŭ hodiaŭ kiel antaŭe, la samaj privataj personoj prizorgas preskaŭ la tutan subtenon de Centra Oficejo kaj de la en ĝi koncentritaj institucioj. *Do, la por la vivo de Esperanto necesaj institucioj dependas ankoraŭ nuntempe de la bonvolemo kaj situacio de sindonaj bonfarantoj.*

Lingva Komitato, Kongresoj, Centra Oficejo, Administra Komitato, I. U. E. S. kaj S. A. E. havis *apartajn* regularojn, kiuj, kvankam interplektitaj, tamen estis sendependaj unu de la alia. Tio estis malbonaĵo. Ili ankaŭ nek trafis efike la individuajn esperantistojn kaj la Esperantajn societojn, nek sufiĉe instigis ilin, prizorgi la vivrimedojn de tiuj institucioj, kies bezono estis konata kaj rekonata de ĉiuj.

La ĝis nun cititaj organizaĵoj servis al *lingvaj* kaj *propagandaj* celoj. Ilia centro estis *Paris*. Sed krom ili, kiel tute memstara organizaĵo, ekzistas la Universala Esperanto-Asocio, kiu servas *praktikajn* celojn. Ĝi sidas en *Genève*. Dum la milito U. E. A., pro sia favora sidejo en neŭtrala lando kaj pro la ebleco, regule aperigi sian gazeton „*Esperanto*“ kaj plenumi multspecajn servojn, estis

la ĉefa signo de internacia vivado de Esperanto. Tial, kvankam ĝia celo estas praktika uzado de Esperanto por internaciaj interrilatoj, ĝi ekokupis en la okuloj de multaj esperantistoj, precipe de la novaj, la lokon, kiu estis difinita al Centra Oficejo. Plue, ne nur la Centra Oficejo kun la ĝin subtenantaj organizaĵoj, sed ankaŭ U.E.A. devis, por ke ili povu ekzisti materie, serĉi tra la tuta mondo la apogon de individuaj esperantistoj, Esperanto-societoj, komercaj firmoj, esperantistaj entreprenoj ktp. Tial multaj ne sciis, „en kiu templo adori, ĉu en Paris, ĉu en Genève“, kaj ne komprenis, kial, se ĉiuj estis necesaj, ili restis apartaj. Ĉio ĉi konfuzis kaj malutilis nian movadon.

Estis do dezirinde, ke ĉiuj organizoj, kiujn Esperanto bezonas por vivi, estu kunigataj sub *unu* estraro kaj sub *unu sola* statuto kun apartaj internaj regularoj por ĉiu fako, kaj ke la tuta esperantistaro estu efike invitata, havigi la necesajn monrimedojn por subteni la necesajn instituciojn. Tiel la Esperanta movado ricevus pli vastan bazon, kaj la tuta esperantistaro havus pli bonan moralan rajton, kontroli tiujn instituciojn de pli proksime kaj influ la Esperantajn aferojn pli efike. La delonge diskutita problemo pri plej taŭga kunordigo de la esperantistaro iom post iom alproksimiĝis al sukcesa solviĝo. La XIIIa Universala Kongreso (1921 en Praha) aprobis la starigon de Internacia Ligo de Esperanto, kiu efektive kunigu en unu ĝenerala organizaĵo la individuajn esperantistojn kaj la lokajn, naciajn kaj fakajn societojn, Centran Oficejon kaj Universalan Esperanto-Asocion, kaj plej efike organizu la subtenon de la necesaj centraj institucioj de Esperanto. La Komisiono pri ĝenerala organizaĵo estis verkanta kaj publikigonta statuton kaj fincan planon de tiu Ligo kaj prezentonta ilin al la XIVa Universala Kongreso (en Helsinko 1922). Post interkonsento inter la du flankoj de

nia movado, la oficiala Centra Oficejo kaj la neoficiala U.E.A., ĉi tiu kongreso akceptis jenan rezolucion:

La Kongreso rekomendas, ke, por koncentrigi la fortojn de la Esperantistaro kaj trovi monrimedojn por subteni la ĝeneralan movadon, la OFICIALA ESPERANTISTA ORGANIZO estas jena:

I.

1. La *Naciaj Societoj* elektu *Konstantan Re prezentantaron* de la Naciaj Societoj (K.R.), konsistantan el unu reprezentanto de ĉiu nacia societo, kun nombro da voĉoj proporcia je la nombro de anoj, por kiu ĝi pagis kotizon al la kaso de la K.R. Tiu Re prezentantaro starigos sian internan regularon. Ĝi povos havi Prezidanton kaj Ĝeneralan Sekretarion, elektitajn ekstere de la Re prezentantaro. Ĝi zorgos pri la reciproka informado kaj kunlaborado de la naciaj societoj por komunaj celoj kaj pri ilia monsubteno al la komunaj Institucioj de la Esperantistaro.

2. La individuaj Esperantistoj grupiĝu internacie per aliĝo al *Universala Esperanto-Asocio*, kiu disvastigas la ĝeneralan uzadon de la lingvo.

3. La *Fakaj* (teknikaj kaj profesiaj) *Societoj* grupigu la Esperantistojn por propagando kaj uzado en specialaj rondoj.

II.

La Konstanta Re prezentantaro de la Naciaj Societoj kaj U.E.A. interkonsentos pri elekto de *Centra Esperanto-Komitato*, kiu konsistos el ses anoj, oficantaj dum tri jaroj kaj reelektotaj po du ĉiujare.

Tiu Centra Esperanto-Komitato zorgos pri la ĝeneralaj interesoj de la movado. Ĝi starigas Centran Kason kaj por tio enspezas donacojn, kotizojn de kongresoj, kotizojn de Naciaj Societoj pere de la Re prezentantaro kaj subvencion de U.E.A.

III.

La *Lingva Komitato* estas sendependa, sed la Naciaj Societoj, U. E. A. kaj la Fakaj Societoj povas prezenti kandidatojn al ĝi.

IV.

La Centra Esperanto-Komitato decidas pri la okazigo de la Universalaj Kongresoj kaj komisias ilian organizon al *Konstanta Kongresa Komisiono*, kiu enhavos du reprezentantojn de la Centra Komitato, du anojn de la loka komitato de la estinta kongreso, du anojn de la loka komitato de la estonta kongreso, kaj du kuratorojn de la kongresa kaso.

La Universalaj Kongresoj konsistas el solena malferma kunsido, laboraj kunsidoj, en kiuj la oficialaj institucioj prezentas raportojn kaj aŭdas la rimarkojn kaj dezirospri-mojn de la kongresanoj, fakaj kunsidoj, kunsidoj de la diversaj oficialaj komitatoj aparte aŭ kune.

La Institucioj nomataj „*oficialaj*“ estas: La Lingva Komitato (L. K.) kaj ĝia Akademio, la Konstanta Reprezentantaro de la Naciaj Societoj (K. R.), la Universala Esperanto-Asocio (U. E. A.) kun sia Komitato, la Centro Esperanto-Komitato (C. K.) kun sia Konstanta Kongresa Komisiono.

V.

Krom la Universalaj Kongresoj povos okazi periode oficialaj teknikaj konferencoj, laŭ decido de la Centra Komitato, kiu tamen ne zorgos pri konferencoj politikaj kaj religiaj.

VI.

La oficialaj komunikoj de la oficialaj Institucioj estas publikigataj pere de Esperantistaj gazetoj. La oficialaj dokumentoj kaj raportoj estas publikigataj per zorgo de la Centra Komitato en *Oficiala Dokumentaro* laŭ siaj nunaj formatoj.

Aldone estis akceptataj jenaj resolucioj:

1. La Kongreso, por faciligi la tujan formadon de la K. R. de la Naciaj Societoj, petas s-ron generalon Sebert kaj s-ron Chavet, ke ili bonvolu tuj funkcii kiel provizoraj Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario de la Reprezentantaro ĝis la momento, kiam ĝi mem estos fiksinta sian estraron.

2. La nuna Komisiono pri ĝenerala organizo bonvolu plenumi la oficon de la Centra Esperanto-Komitato ĝis la momento, kiam tiu Komitato estos elektita.

3. La Kongreso petas la Centran Komitaton, ke ĝi zorge reviziu kiel eble plej baldaŭ la antaŭajn regularojn pri organizaj aferoj, por ke ili akordiĝu kun la akceptita interkonsento.



IV. Gazetaro

42. Ĉu ekzistas multaj esperantistaj gazetoj?

Antaŭ la milito ekzistis proksimume 100 gazetoj aŭ revuoj esperantistaj (ne enkalkulataj neregule aperintaj Esperantaj bultenoj k. c.). Dum la milito kelkaj el ili ĉesis aperi, kelkaj estis kunigataj. Sed jam granda parto de la mortintaj gazetoj reviviĝis, novaj fondiĝis.

43. Kiamaniere oni povas dividi la gazetaron?

Oni povas ĝin dividi en *propagandan*, *literaturan* kaj *fakan*.

La *propagandaj* gazetoj estas redaktataj en la landlingvo, aŭ en ĝi kaj en Esperanto; ili celas diskonigi kaj akceli la movadon en nur unu lando; ekz. por Germanujo: „Germana Esperantisto“.

La *literaturaj* gazetoj ne direktas sin al iu nacio, popolo, lingvanaro, sed al la tuta mondo, pere de komuna lingvo, kaj havas kiel taskon, ebligi al ĉiuj samideanoj, diri sian opinion pri iu komuninteresa temo kaj konigi la diverslandajn literaturojn, ekz. „Literaturo“, „Esperanto-Praktiko“, „Literatura Mondo“.

La *fakaj* gazetoj direktas sin ne al la tuta esperantistaro, sed al la speciala aro da esperantistoj, kiuj klopodas atingi saman celon kaj povas pere de tiu internacia lingvo interŝanĝi ideojn, kunigi siajn fortojn kaj tiamaniere akceli la atingon al sia idealo, ekz. „Esperanta Ligilo“ por blinduloj.

Tiu divido tamen ne estas tute preciza kaj konstanta, ĉar multaj naciaj propagandaj gazetoj okupas sin ankaŭ pri ĝenerala propagando kaj publikigas literaturaĵojn, ekz. en Germanujo: „Germana Esperantisto“. Aliflanke propagandaj gazetoj iĝas organo de fakaj unuiĝoj tiel, ke oni malfacile povas severe apartigi la gazetaron en kategoriojn, escepte konsiderante nur ilian ĉefan celon kaj tendencon.

Estu citataj:

1. *Internaciaj*: Esperanto. Oficiala organo de U. E. A. Monata. Fondita 1904. Aldonoj: Bulteno de la Internacia Labor-Oficejo, La Informilo — Oficiala Gazeto Esperantista. Aperas laŭ bezono. Fondita 1908 — Esperanto Triumfonta. Aperas semajne, kun monataj aldonoj „Revuo“ kaj „Internacia Komercio“. Fondita 1920 — Sennacieca Revuo (antaŭe Esperantista Laboristo) — Esperanto-Praktiko. Instrua kaj literatura gazeto monata por perfektigo en la Lingvo Internacia. Fondita 1919 — Literaturo. Trimonata gazeto Esperanta — Literatura Mondo — Nova Epoko. Internacia literatur-socia revuo (Moskvo) — Esperanta Ligilo. Universala gazeto por la blinduloj. Monata — La Eklezia Revuo. Organo de la Eklezia Esperantista Ligo — Espero Katolika. Oficiala organo de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. Fondita 1903 — Katolika Mondo. Dusemajna — Kristana Espero. Trimonata Revuo — Espero Teozofia. Organo de Teozofia Esperanta Ligo. Dumonata — Nova Eŭropo. Internacia Tribuno de malgrandaj nacioj. Monata, kiel aldono de Ĉeĥoslovaka Gazeto — la Policisto (Budapest) — Fervoja Esperantisto (Praha) — Esperantista Junularo. Organo de U. E. Asocio Junulara — Vegetarano. Organo de Vegetara Ligo Esperantista. Kvaronjara — Internacia Socia Revuo (reaperinta de Januaro

1920) — Scienca Revuo. Organo de Internacia Scienca Asocio — Internacia Pedagogia Revuo. Organo de la Internacia Unuiĝo de Instruistoj Esperantistaj — Novaj Tempoj. Revuo de Popoledukado.

Dum la milito aperis: Internacia Bulteno (germana informilo pri la milito).

2. *Naciaj*: Aŭstria Esperanto-Raporto — Belga Esperantisto — Bizantio (Konstantinopolo) — The British Esperantist — Bulgara Esperantisto — La Progreso. Ĉeĥoslovaka Organo Esperantista — Marto. Organo de Germanaj Esperanto-Societoj en Ĉeĥoslovakujo — Esperantský zpravodaj (Praha) — Esperanta Finnlando — France-Esperanto (anstataŭanta „Franca Esperantisto“) — La France Postale Esperantiste — Bulletin de la Société Française pour la Propagation de l'Esperanto — Le Monde Espérantiste — Germana Esperantisto — La Laborista Esperantisto (Germanujo) — Hispana Esperantisto — La Semisto — Hungara Esperantisto — Konkordo (Jugoslavujo) — Itala Esperanto Revuo (L'Esperanto) — Holanda Esperantisto — Litova Stelo — Pola Esperantisto — Laboro (Portugalujo) — Ondo de Esperanto (Rusujo) — Sveda Laborista Esperantisto — La Espero (Svedujo) — Skandinava Esperantisto — Ukraina Stelo — Egipta Esperantisto — Amerika Esperantisto — Argentina Esperantisto — Esperanto (Organo de l' Centro Esperantista „Nova Sento“. Argentino) — Brazila Esperantisto — La Revuo Orienta, Verda Utopio (Japanujo) — Libereco, La Voĉo de la Popolo (Ĥinujo) — La Suda Kruco (Aŭstralio).

Ne plu aperas la iam gravaj gazetoj: Esperantisto (1889 ĝis 1895; vidu 12an Dem.); Lingvo Internacia (1895 ĝis 1920; vidu 12an Dem.); La Revuo (Internacia monata literatura gazeto, honorita per konstanta kunlaboro de Dro Zamenhof; 1904–1914); Universo; Ĉirkaŭ la Mondo.

44. Ĉu Esperantaj redaktoroj ne havas *moralajn* devojn koncerne la lingvon kaj la esperantistaron?

La redaktoroj de Esperantaj gazetoj (kaj revuoj) havas la moralan devon, zorgi pri tio, ke la stilo de la kunlaborantoj estu konforma al la principoj de l' „Fundamento de Esperanto“ kaj samtempe laŭeble bona, por ke ĝi povu servi kiel modelo por la legantoj (vidu 33an Dem.). La plej multaj gazetoj, se ne ĉiuj, aliĝis al la Bulonja Deklaracio (1905).

Ekster tiuj devoj, ĉiu redaktoro devus en intereso de la afero, kiun li servas, kaj de ĝiaj adeptoj, devigi sin al tio, ke li publikigas nur bonajn tekstojn. Tio ne signifas, ke la artikoloj devas esti ĉiam aŭ sciencaj aŭ tre seriozaj, ne, ankaŭ ridi estas vivfunkcio eĉ tre utila, sed tial ke la redaktoroj deziras konigi al alilandaj samideanoj la belaĵojn de sia literaturo, ili publikigu nur tion, kio liveros bonan impreson, nur tion, kio plialtigas la homon, kio enhavas homamajn pensojn kaj sentojn kaj ne tiajn sensencaĵojn, kiuj ne valoras la paperon, sur kiu ili estas presitaj, kaj kiuj liveras malbonan impreson pri la aŭtoro, la lando, la tradukinto kaj la gazeto.

Certe normo en tiu rilato estas preskaŭ neebla, pro la opinidiverseco de malsamaj popoloj; malgraŭ tio, ĉar niaj sentoj pri moralo, etiko pli kaj pli ĝeneraliĝas, plej ofte kritiko al si mem sufiĉas, por ne tro grave deflankiĝi. Nia rido estu sana; ni klopodu, ni esperantistoj, kiuj havas la eblon ekkoni la diversnaciajn literaturojn, senti nin iel Eŭropanoj, mondanoj eĉ, kiuj povas interrilati spirite kaj ofte buŝe kun iu alia *kunhomo*, kies horizonto estas barata ne de landlimoj, sed nur de l' *mondlimoj*, stari sur iom pli alta ŝtupo ol la ceteraj homoj kaj kunlabori al tiu granda tasko, akceli la progreson de l' homaro. Ni memoru la parolojn de nia Majstro en „La Vojo“: „ni semas kaj semas, neniam ĉesante, pri l' tempoj estontaj pensante.“



V. Literaturo

45. Ĉu Esperanto posedas originalan literaturon?

Esperanto, malgraŭ tio ke ĝi estas artefarita, iĝis nun tiom vivanta, kiom iu alia lingvo, kaj sufiĉas por la vivezonoj plej diversspecaj; ĝi sekve devas sufiĉi ankaŭ por literaturo, prozo aŭ poezio. Ĝia originala literaturo konsistas el granda, konstante pliiĝanta nombro da romanoj, rakontoj, teatraĵoj, poeziaĵoj ktp., kaj el pli-malpli longaj traktaĵoj pri sciencaj kaj praktikaj aferoj. Rimarkindaj estas la originalaj poeziaĵoj de Dro Zamenhof: Al la Fratoj, La Espero, La Vojo, La Preĝo sub la Verda Standardo, kaj liaj paroladoj en la malfermaj kunsidoj de la Universalaj Kongresoj. El la aliaj originalaĵoj estu citataj nur: Argus, Pro kio?; Bujvid, Pri Bakterioj; Corde Catchpool, La Kvakerismo; Devjatnin, Bela Manto; Dietterle (kolektis), La Vendreda Klubo; Hankel, Sableroj; Kalocsay, Mondo kaj Koro; Khun, Majstro Jan Hus; Kotzin, Historio kaj teorio de Ido; Lemaire, Tra Mez-Afriko; Luyken, Paŭlo Debenham, Mirinda amo, Stranga heredaĵo; Merchant, Tri Angloj Alilande; E. Privat, Ginevra, Historio de la lingvo Esperanto, Vivo de Zamenhof; Roksano, Geedzigo-peto; Sharpe, Travivaĵoj de Ro. Ŝo.; Symote, Lilio; Schmidt, Gustaf Vasa (dramo); de Saussure, La Geometrio de Folietoj; Vallienne, Kastelo de Prelongo, Ĉu li?; Vörös, Analitika geometrio absoluta, Elementoj de la geometrio absoluta; A. Zakrzewski, Historio de Esperanto 1887—1912. Ekzistas multaj gvidfolioj kaj gvidlibroj (vidu 50an Dem.).

46. Ĉu estas multaj nacilingvaj verkoj Esperanten tradukitaj?

La nombro de tradukoj de kaj el naciaj verkoj estas tiom granda kaj tiom rapide pliiĝas, ke neeble estas, doni kompletan liston.

Citataj estu nur:

Angla literaturo: Byron, Ĉielo kaj tero, Kain, Mistero; Dickens, Bardell kontraŭ Pickwik, Kristnaska sonorado, La batalo de l' vivo (tradukita de Dro Zamenhof); Defoe, Robinson Kruso; Goldsmith, Ĝi kliniĝas por venki; Hawthorne, La serĉado al la ora ŝaflano, La granda vizaĝo el ŝtono; Macaulay, Horacio; Mitchell, La lasta Usonano; Poe, La puto kaj la pendolo; Ruskin, La Reĝo de la Ora Rivero; Swift, Gulliver en Liliputlando; Shakespeare, Hamleto (tradukita de Dro Zamenhof), Makbeto, Julio Cezaro, La Ventego, Venecia komercisto, Sonĝo de somermeza nokto, Kiel plaĉas al Vi; Tennyson, Gvinvero kaj aliaj poemoj; Thurston, La urbo de la belega sensencaĵo; Wilde, Salome; Wisemann, Fabiola.

Araba lit.: Ŝeherazade, Ali Baba kaj la kvardek rabistoj, Aladin, Aventuroj de la Kalifo Harun Alraŝid.

Armena lit.: Agaronjan, Guteton da lakto; Papazjan, Morituri vos salutant, Rondaj dioj, Saĝaj kokoj.

Bulgara lit.: Vazov, Ĉu li venas? Bulgaraj rakontoj; Stamatov, Nuntempaj Rakontoj.

Ĉeĥa lit.: Arbes, Rakontoj; Mahen, La koboldo Ondra; Nemcova, Avineto; Sherlock Holmes en servo de la hispana trono.

Ĉerkesa lit.: Ĉerkesaj rakontoj.

Dana lit.: Fabeloj de Andersen, Bildolibro sen bildoj, La Virineto de Maro (tradukita de Dro Zamenhof);

Hertz, Jolanto, la filino de l' reĝo René; Trine, En harmonio kun la Eterneco.

Finna lit.: Kivi, La Botistoj, La fianĉiĝo, Lea; Levertin, Shylock; Linnankoski, Batalo pri la domo Haikkilä; Tegengren, J. Regina; Topelius, Akselo kaj Stinjo; Inhani, Por aliaj, Tranĉaĵeto.

Flandra lit.: Conscience, Blinda rozo; Spaake, Kaatje; Vermandere, Formortinta Delsuno; Paĝoj el la flandra literaturo.

Franca lit.: About, La reĝo de la montoj; Balzac, Eugenie Grandet, La Vendetto, Scenoj de la vivo; Beaumarchais, Edziĝo de Figaro, La barbiro de Sevilla; Chateaubriand, Aventuroj de l' lasta abenceraĵo; A. Dumas, La kolomba premio; La Fontaine, Elektitaj fabloj; Maistre, Vojaĝo interne de mia ĉambro; Maeterlink, Monna Vanna; Mérimée, Karmen; Maupassant, Gastejo; Mirabeau, Ili estas frenezaj; Mistral, Mireille, Mirejo; Molière, Don Juan, Edziĝo kontraŭvola, La Avarulo, Amfitriono, Georgo Dandin (tradukita de Dro Zamenhof), Malsanulo pro imago; Musset, S-ro Vento kaj S-ino Pluvo; Perrault, Rakontoj pri feinoj; Porchat, Sub la neĝo, taglibro de juna loĝanto de la Jura montaro; St. Pierre, Paŭlo kaj Virginio; Prevost, Manon Lescaut; Racine, Esther, Athalie; Renan, Vivo de Jesuo; Rolland, Al la forbuĉataj popoloj; Tristan, Angla lingvo sen profesoro; Rolandkanto; Vigny, La intervidiĝo kaj Nekonita dialogo.

Germana lit.: Bölsche, Unu ĉapitro el La ama vivo en la naturo; Carmen Sylva, Sufero; Chamisso, La mirinda Historio de Petro Schlemihl; Eckstein, La vizito en la karcero; Elzasaj legendoj; Goethe, La gefratoj, Ifigenio en Taŭrido (tradukita de Dro Zamenhof), Hermano kaj Doroteo; Grillparzer, La malriĉa muzikisto, La monaĥejo

ĉe Sendomir; Grimm, Elektitaj fabeloj; Hauff, La karavano, La kantistino; Hebbel, Gyges kaj lia ringo; Heine, Pentraĵoj el vojaĝo, Sklavoŝipo, Elektitaj poemoj, Libro de kantoj (Dro Zamenhof); Hoffmann, La Struvelpetro; Heyse, Edziĝa festo en Capri; Keller, Ferioj de l' mio; Lessing, Minna de Barnhelm, Fabloj, Natan la Saĝulo; Leibniz, Monadologio; Nüchter, Albrecht Dürer; Pil-lath, Germanaj kantoj esperantigitaj; Raabe, La nigra galero; Reuter, Kio povas okazi, se oni donacas surprize; Saŭren, Migrukunmi (poŝpreĝareto); Schiller, La nevo kiel onklo, Wilhelm Tell, La rabistoj (tradukita de Dro Zamenhof), Poeziaĵoj; Seidel, Vintro-fabeloj; Storm, Imenlago; B. von Suttner, For la batalilojn; Tieck, La blonda Ekberto; Winsch, Pri la kredo al mirakloj, Pri varmokulturo; Zahn, La patrino, Svisaj rakontoj; La plej bonaj spritaĵoj el Munĥenaj Flugantaj Folioj.

Greka lit.: Aristophanes, Plutos; Ezopo, 50 elektitaj fabloj; Homero, Parto de Iliado; Sophokles, Edipo reĝo; Ranratbatalo; La Nova Testamento.

Hebrea lit.: El la Biblio, Genezo, Eliro, Levidoj, Nombroj, Readmonoj (Dro Zamenhof), Psalmaro; La Predikanto (Z.); La Sentencoj (Z.); La libro Ruth (Z.); La Biblia profeto Cefanjaho; Rakontoj el la Biblio (Z.); Ŝalom-Aleĥem kaj Perec, Hebreaj rakontoj.

Hispana lit.: Benavente, La nesia hejmo, Hispanaj dramoj; Cervantes, Don Kiĥoto, La licentiato Vittraro; Inglada, Prozo kaj versoj. Kolekto da rakontoj, legendoj, versaĵoj verkitaj aŭ esperantigitaj; Moratin, Kuracisto per batoj, La jeso de knabinoj.

Hungara lit.: Abonyi, Mallumaĵoj; Herczeg, Hungaraj Rakontoj; Jokai, Du noveloj; Petöfi, Elektitaj poemoj; Cindrulino; Trezoro de la Rajaho; Hungara Poemaro;

Bonhumoraj rakontoj de nuntempaj verkistoj; Ses noveloj el la hungara literaturo de Jokai k. a.

Japana lit.: Japanaj rakontoj; Perloj el la oriento (el japanaj kaj Ĥinaj klasikaj verkoj).

Itala lit.: Amicis, Kverko kaj floro, La floro de l' pasinto; Italaj Rakontoj; Mazzini, Devoj de la homo; Penso kaj agado; Dio kaj Popolo; Rajberti, La kato; Grasa lignaĵisto; Firenza novelo.

Kataluna lit.: Adria, Mistero de doloro; Rusinol, La patrino; Folioj de la vivo.

Latina lit.: Apulejus, Amoro kaj Psiĥe; Cicero, Sonĝo de Scipio; Plautus, Rudens, Virgilius, Eneido.

Latva lit.: Porkus, La Vakciniuja Krono.

Norvega lit.: Ibsen, Reaperantoj.

Pola lit.: Balucki, Ama bileto; Belmont, Sonoj Esperantaj; Dygasinski, Lupo, hundoj kaj homoj; Fredro, Consilium Facultatis; Mickiewicz, Sinjoro Tadeo; Niemojewski, Legendoj; Orzeszko, La interrompita kanto, A . . . B . . . C Noveleto, Marta (Dro Zamenhof), Bona Sinjorino; Prus, La nova jaro, La Faraono; Sienkiewicz, Janko-Muzikanto, Kio okazis foje en Sidono, La juĝo de Oziris, Ne sekvu lin; Sieroŝevski, La fundo de l' mizero; Stowacki, Mazepa; Svjentoĥovski, Aspazio (Dro Leono Zamenhof); Wyspianski, Protesilas kaj Laodamio; Pola Antologio (Kabe).

Portugala lit.: Ama Stelaro de La Forgesito.

Provenca lit.: Mistral, Mirejo.

Rusa lit.: Andrejew, Ruĝa rido; Avsejenko, Fraŭlino Suzano; Devjatnin, Verkaro; Garŝin, La ruĝa floro; Gogol, La revizoro (Dro Zamenhof), Maja nokto; Gorkij, Bolesĉjo; Korolenko, La senlingvulo; Lermontov, La diablo, Princino Mario, Demonio; Puŝkin, La neĝa


blovado, La ŝtona gasto, La palo, Mocart kaj Saljeri, Boris Godunov; Sibirjak, Rusaj rakontoj; Tolstoj, Dio ĉiam veron vidas, Unua brandfaristo, Tri mortoj; Turgenjev, Kanto de triumfanta amo, Versaĵoj en prozo, Patroj kaj filoj, Anjo.

Sveda lit.: Runeberg, Tri legendoj; Strindberg, Fraŭlino Julie, Pario.

Ekzistas granda nombro da legolibroj, antologioj, anekdotaroj ktp. Estu citataj nur: Dro Zamenhof, Fundamenta Krestomatio de la Lingvo Esperanto; El Parnaso de popoloj (Grabowski).

47. Ĉu Esperanto konigas ĝis nun neatentitajn aŭ neatingeblajn literaturajn produktojn?

Esperanto, ebligante al la nacioj, fari mem la Esperantan tradukon, konigas al ni la literaturojn de malgrandaj popoloj aŭ de landoj, kies lingvon nur malmultaj homoj konas, kiel la polan, balkanlandajn, armenian, grekan, japanan literaturojn k. a.



VI. Stato de la movado

48. Kion vi scias pri la jam faritaj aplikoj de Esperanto?

Esperanto estas aplikita al ĉiuj branĉoj de l' homa scio kaj povo, al tekniko kaj ĉiuj sciencoj, al arto, al komerco, industrio, pacifismo, politiko, ruĝa kruco, aviadismo, turismo, sporto, blindulaj aferoj k. a.; ĝi ankaŭ estas alfarita al diversaj sistemoj de stenografio.

Dum la milito Esperanto plenumis valorajn servojn al angloj, germanoj, francoj, italoj, helpante plimalpezigi la sorton de la militviktimoj kaj prilabori la publikan opiniaron en la neŭtralaj landoj.

49. Kion vi scias pri „Esperanto kaj komerco“?

Jam de 1906 la Londona Komerca Ĉambro kiel unua el ĉiuj okazigis regulajn Esperantajn ekzamenojn kun diplomoj. Post detala esplorado ĝi oficiale rekomendis Esperanton en 1918. Ankaŭ la New-Yorka Komerca Ĉambro aranĝas Esperantajn ekzamenojn. La Common Commercial Language Committee (komitato por komuna komerca lingvo, London) klopodas, helpata de komerco kaj industrio, enkonduki en la tuta mondo Esperanton kiel internacian, precipe komercan interkomunikiĝan lingvon. La Paris-a Komerca Ĉambro, en 1921, decidis enkonduki Esperanton en siajn komercajn lernejojn kaj esprimi la deziron, ke la Esperanta instruo estu ĝeneraligata

en Francujo kaj fremdlande, kaj ke la Komercaj Ĉambroj de ĉiuj landoj favoru la disvastigon de Esperanto. Ankaŭ multaj aliaj Komercaj Ĉambroj kaj reprezentantaroj, i. a. tiuj de Dresden, Königsberg, Reichenberg, Budapeŝto, Kraków, Plymouth, Calais, Torino, Lausanne (Svisujo), Huesca (Hispanujo), Sofia, Lisboa, Cluj (Rumanujo), New-York, Rio de Janeiro, Melbourne, Tokio, la portugala Komerca kaj Industria Ĉambro, la franca Komerca Ĉambro en London, ĝin akcelas, unuj pli intense ol aliaj, aranĝante klarigajn paroladojn kaj kursojn, helpante per monrimedoj, rekomdante ĝian lernadon al siaj oficistoj kaj anoj, akceptante ĝin inter la instrufakojn de siaj lernejoj, deklarante sin pretaj, akcepti korespondadojn kaj respondi en Esperanto, ktp. Antaŭ kaj post la milito komercaj firmoj sukcesplene reklamadis per Esperanto, ekz. Seidel & Naumann en Dresden, la Meißen-a Porcelanmanufakturo, Stephen's Inks en London; „Svisa Espero“, en 1920, citas 22 svisajn firmojn, kiuj uzas Esperanton. Estas pruvite, ke anoncoj en „Esperanto“, en „Esperanto Triumfonta“, en „Germana Esperantisto“ kaj aliaj Esperantaj gazetoj efektivigas multnombrajn mendojn. La foiroj de Basel, Breslau, Budapeŝto, Barcelona, Frankfurt a. M., Helsinko (Finnlando), Leipzig, Lisboa, Lyon, Paris, Milano, Preßburg, Praha, Reichenberg, Stockholm, Wien k. a. uzas, parte tre intense, Esperanton por propagandaj celoj kaj korespondado kun plej bona sukceso. La Frankfurt-a kaj Leipzig-a foiroj eldonis vortarojn de komercaĵoj. Multaj el tiuj foiroj (ekz. Leipzig) starigis specialajn fakojn Esperantajn. Okazis jam tri Internaciaj Konferencoj de Foiroj helpe de Esperanto.

La Musée Commercial Universel en Paris, entrepreno de l' Union du Commerce International, kun filioj en la tuta mondo, kiu sukcesis estigi tre valorajn komercinterrilatojn precipe kun transmaraj landoj, kreis Internacian

Komercan Esperanto-Oficejon kun speciala Esperanto-interpretisto. La Komercista Esperanto-Grupo en Dresden, Ruslanda Esperanto-Komerc-Oficejo (Moskvo), la Nederlanda Esperanto-Komerc-Oficejo, la Japana Esperanta Komerc-Oficejo kaj multaj aliaj peras per Esperanto eksporton kaj importon de komercaĵoj inter sia landoj kaj la eksterlando. La peresperanta reklamo en tramvojoj kaj vagonoj, en stacidomoj ktp. plivastiĝas. Resume: Esperanto ekfariĝas moderna helpilo kaj efikplena reklamilo de la mondkomerco.

Je Pasko 1923 en Venezia (Italujo) okazis Internacia Komerc-Oficejo (kaj Turisma) Konferenco, kunvenigita de la Itala Komerc-Oficejo en Svislando (Genève). Ĝi certe helpas disvastigi la uzadon de Esperanto kaj tiel plifaciligi komercajn (kaj turismajn) interrilatojn.

50. Kion vi scias pri „Esperanto kaj interkomunikiĝo“?

Per la milito la uzado de Esperanto por la celoj de internacia interkomunikiĝo kompreneble estis malhelpata; kun la reviviĝo de la tutmonda interkomunikiĝo revenis ankaŭ la apliko de Esperanto sur tiu agadkampoj. Tre multaj esperantlingvaj gvidlibroj, broŝuroj kaj folioj pri regionoj kaj specialaj lokoj estas eldonitaj. El multaj aliaj estu citataj nur tiuj pri Wiesbaden, Praha, Berner Oberland, Kjøbenhavn, Stockholm, Rotterdam, Paris, Marseille, Firenze (Florenz), Barcelona, Odessa, Vladivostok, tra Trentino, Vogtlando. La ministerio por fervojaj aferoj en Wien publikigis: Pejzaĝoj en Aŭstrio, La novaj fervojoj tra aŭstria Alpoj (en 1912). North Eastern Railway disvastigis prospektojn ankaŭ en Esperanto. Jam antaŭ la milito gvidlibro kun bildoj kaj karto informis pri la pejzaĝa beleco de Finnlando; nuntempe la monata revuo „Esperanta Finnlando“ instruas la eksterlandon pri

popoleco, spirita vivo, ekonomiaj aferoj kaj beleco de Finnlando. La direkto de la fervojoj de tiu lando alprenis Esperanton en la veturplanojn. Helpate de la bulgara registaro, Krestanov eldonis la libron: La bulgara lando kaj popolo. Li ankaŭ publikigis: El la proksima Oriento (de Ukrainio ĝis Georgio). Longtempe antaŭ la milito la fako por Turismo kaj Higieno de la registaro de Nov-Zelando aperigis Esperantan broŝuron pri la lando; la oficistoj de tiu fako estis devigataj, lerni Esperanton. La aŭstralia Intelligence and Tourist's Bureau uzis Esperanton kun konsento de la registaro. Gravega povus fariĝi la rezolucio, kiun en 1913 decidis Les Etats Généraux du Tourisme sub la prezido de la prezidanto de la franca respubliko: „Ĉiuj turistaj, interkomunikiĝaj societoj ktp. akcelu la disvastigon de Esperanto kaj atentigu la registaron pri tiu grava demando; la registaro favoru la Esperantan instruon, kaj la interkomunikiĝaj societoj klopodu eldoni siajn broŝurojn en tiu mondlingvo.“ La porvojaĝa firmo Cook uzas Esperanton; oficistoj de la plej granda vojaĝoficejo de la ŝtato Michigan (C. Leidisch) estas instruataj pri Esperanto. Pli kaj pli da interkomunikiĝaj societoj atentiĝas pri Esperanto; iliaj oficistoj multloke pledas por ĝi. En tre multaj urboj de la tuta mondo policianoj kaj aliaj urbaj oficistoj, ekz. plejnovtempe en Praha, Dresden, Braunschweig, Leipzig, Lisboa, lernis kaj lernas Esperanton. La ĉeĥoslovaka ministerio por fervojoj, la germana kaj nederlanda poŝtministerioj, pluraj ministerioj en Brazilio k. a. favoras Esperanton. La Polica Estraro de Dresden (Polica Esperanto-Informejo) oficiale korespondas per Esperanto. En multaj landoj ekzistas Esperanto-Servoj, ekz. Germana Esperanto-Servo en Berlin, Bohema, Hungara, Pola Esperanto-Servoj, New-Yorka Esperanto-Service Corporation, kiuj progresigas Esperanton, praktike uzante ĝin por plenumado de ĉiu-

specaj servoj precipe en komerco kaj industrio, por informado pri la lando kaj ties loĝantoj, ktp.

Internaciaj kaj aliaj grandaj ekspozicioj, ekz. la Internacia Higiena Ekspozicio en Dresden (1911), la Tutrusuja Ekspozicio por arto, industrio, terkulturo kaj scienco en Kiew (1913), la Internacia Ekspozicio por libroindustrio kaj grafiko en Leipzig (1914), la Ekspozicio por kolonioj kaj marhigieno en Genova (1914) uzis Esperanton por invit- kaj reklamceloj kaj por markado de elmetitaj objektoj. Okaze de la Nacia Ekspozicio kaj de la Centjara Jubileo de la Brazila Sendependenco (1922) estis elsendataj prospektoj diverslingvaj kaj en Esperanto. Parish, kiel reprezentanto de la Komerca Ĉambro de Los Angeles, Dro Privat el Genève, Pitlik el Praha kaj aliaj faris Esperanto-projekciprezentadojn en multaj eŭropaj urboj. En multaj landoj de la mondo okazas Esperantaj diservoj, ekz. en Wien, en Isokyrö (Finnlando) k. a. Estu ankaŭ dirate, ke multaj germanaj kaj aŭstriaĵoj ne sufiĉe nutritaj infanoj, kiuj scipovas paroli Esperante, dum unu somero estis akceptataj en danaj, hispanaj, holandaj kaj svedaj familioj esperantistaj.

51. Kion vi scias pri „Esperanto kaj Internaciaj Kongresoj kaj Organizaĵoj“?

La sekvantaj internaciaj fakaj kongresoj akceptis Esperanton kiel kunoficialan lingvon, rekomendante ĝian studon: Kongreso de Keramistoj, Fotografistoj (1910), Liberpensuloj (1910), Nov-Maltusanoj (1910), Vegetaranoj (1909), Unua Tutamerika Scienca Kongreso (1909). Dum la Internacia Kuracista Kongreso en Budapeŝto (1909) okazis kunsidoj de la esperantistaj kuracistoj, dum kiuj diversaj paroladoj estis farataj pri sciencaj kaj teknikaj temoj. Ĉe la Internacia Universitato de Bruxelles oni faras konferencojn en Esperanto. La angla Packongreso en Leeds

(1913) faris jenan rezolucion: „La kongreso salutas Esperanton kiel fortan rimedon al internacia amikeco kaj ĝin rekomendas kiel unu el la lingvoj por internaciaj kongresoj kaj kunvenoj.“ La 12a Internacia Stenografia Kunveno en Straßburg (1920) decidis allasi Esperanton kiel kongreslingvon egalrajtan al la naciaj lingvoj. Konfesante la ĉiam pliiĝantan necesecon de adopto de internacia help-lingvo, la 3a Internacia Kongreso de la Tutmonda Unuiĝo de Internaciaj Asocioj en Bruxelles (1920), en kiu estas reprezentitaj 112 internaciaj asocioj, decidis la rezolucion, ke ĉiuj amikoj de la helplingva ideo aniĝu al la grava movado, celanta la disvastigon de Esperanto, kaj ke ĉiuspeca reformo de la lingvo montriĝonta necesa estu prokrastata, ĝis kiam la registaroj oficiale akceptos la lingvon. La Internacia Ligo por la Defendo de la Rajtoj de la Popoloj elektis en 1921 Esperanton kiel duan oficialan lingvon krom la franca lingvo. La Mondligo de Militpartoprenintoj sub la prezido de la franca verkisto Barbusse, la Internacia Unuiĝo de Socialistaj Instruistoj, la Internacia Oficejo de la Paco, la Internacia Ligo de la Blanka Kruco por la Paco, la Internacio Katolika (Ika), la Mondjunularo Katolika (Moka), la Internacia Bibliografia Instituto en Bruxelles, la Internacia Fervojista kaj la Internacia Policista Societoj kaj multaj aliaj rekomendas kaj uzas Esperanton kiel interkomunikiĝan lingvon. La ĝenerala kunveno de la Kristana Internacio en Bilthoven apud Utrecht (1920), pro la malkomforto de tradukado en la allasitajn lingvojn, decidis tradukigi ĉe venonta kunveno ĉiujn paroladojn nur en Esperanton. La Internacia Laboroficejo Genève publikigis statutajn dokumentojn en Esperanto kaj respondas en Esperanto al esperantlingvaj leteroj. En debato inter la Sciencaj Akademioj de Hungarujo kaj Ĉeĥoslovakujo oni uzis Esperanton por la oficiala korespondo. La Franca Instruista Unuiĝo en Bor-

deaux, la kunligitaj laboristaroj de Transilvanio kaj de Banato (1920), la League to enforce Peace (Usono) k. a. uzas Esperanton por eksterlanda interkomunikiĝo. En 1921 21 el 40 membroj de la Franca Akademio de Sciencoj esprimis en manifesto i. a. la deziron, ke, en internaciaj kongresoj, Esperanto estu akceptata kiel oficiala lingvo, egalrajte al naciaj lingvoj, ĝis la momento, kiam la sperto pruvos, ke ĝi kapablas fariĝi ilia sola oficiala lingvo; ili ankaŭ deziras, ke de nun la sciencistoj kaj teknikistoj pretiĝu uzi Esperanton en siaj rilatoj kun siaj eksterlandaj kolegoj. Ankaŭ la brita, franca kaj itala Ligoj por akcelado de la sciencoj pledis en 1921 por Esperanto. La fondo de Esperantaj sekcioj interne de la naciaj sekcioj por la Ligo de Nacioj estas akcelata. En sia ĝenerala kunsido, 15an de Septembro 1921, la Ligo de Nacioj decidis, laŭ propono de delegitoj el 13 ŝtatoj, enskribi en la tagordon de la plej proksima kunsido en 1922 la temon pri instruado de Esperanto en publikaj lernejoj kaj komisi la ĝeneralan sekretarion, prepari ĝis tiam plenan kaj dokumentan raporton pri la tuta afero kaj speciale pri la faktaj spertoj kaj rezultatoj jam akiritaj. Internacia pedagogie-teknika Konferenco pri Esperanto en lernejoj, kunvenigita por Pasko 1922 de la neŭtrala kaj pedagogie kompetenta instituto J. J. Rousseau ĉe la Ĝeneva universitato, partoprenita de 96 delegitoj el 28 landoj, liveris al la sekretariejo por ĝia raporto ne-disputeblan materialon pri spertoj jam faritaj en diversgradaj kaj -fakaj lernejoj, pri la valoro de Esperanto kiel logika preparo al studo de ceteraj lingvoj, pri valoro rilate al socia kaj homara vidpunktoj kaj pri organizado de la instruado, kaj petis la Ligon de Nacioj pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn de ĝiaj ŝtatoj. Ĝi sendis ankaŭ manifeston al la instruistaro tutmonda. La 21an de Septembro 1922 la Ligo de Nacioj decidis,

1. *alpreni la raporton* de la ĝenerala sekretario pri Esperanto kiel helplingvo, 2. peti la Komitaton de scienculoj por Intelektala Kunlaborado („Intelektala Komisiono“), doni sian opinion.

La 10a internacia konferenco de l' Ruĝa Kruco 1921 en Genève, en kiu jam antaŭ la milito fondiĝis Esperanta Ruĝa Kruco, instigis la lernadon de Esperanto precipe interne de ruĝkrucaj junulaj organizaĵoj.

52. Kion vi scias pri „Esperanto kaj lernejo kaj aliaj aranĝoj por instrui Esperanton“?

Jam en 1909 la ŝtato Maryland (en Usono) decidis la enkondukon de Esperanto en la lernejojn kiel nedeviga instrufako. En 1910 Esperanto estis enkondukata kiel deviga fako en ĉiujn unuagradajn lernejojn de la insulo Samos. En Hispanujo ministra dekreto de 1911 rekonas Esperanton kiel branĉon laŭvolan en la instruado supera kaj duagrada. En Finnlando ministra dekreto de 1911 permesas laŭvolan instruadon de Esperanto en la lernejoj, kie la direkcio tion petos. En Brazilio Esperanto estas enkondukita en diversspecaj lernejoj de kelkaj ŝtatoj per leĝo aŭ dekreto. En 1920 la hesa landoficejo por instruaj aferoj kaj la brunsviga ministerio por instruado en dekretoj sin montris favoraj al Esperanto kaj per enketoj preparis ĝeneralan enkondukon de Esperanto kiel nedeviga instrufako. Ankaŭ la saksa ministerio por kulto kaj publika instruado en 1920 faris enketon pri Esperanta instruado en la superaj kaj popolaj lernejoj de la lando. Per loka lerneja regularo en Saksujo Esperanto povas esti enkondukata en la popolajn lernejojn kiel nedeviga, eĉ deviga instrufako; per dekreto, en 1921, estis ordonate al la direkcioj de ĉiuj publikaj lernejoj, disponigi ĉambrojn por instruado pri Esperanto. Speciala raportanto pri Esperanto estas instalita ĉe la germana regna ministerio por

internaj aferoj. La ĉeĥoslovaka ministerio por instruado en 1921 permesis nedevigan instruadon pri Esperanto en la lernejoj, kiuj disponas pri taŭgaj instruistoj. Por la lernjaro 1921/22 ĝi principe permesis nedevigan Esperantan instruadon en la ŝtataj gimnaziaj kaj realaj lernejoj. En 1920 dekreto de la hungara ministro por kulto kaj instruado permesis nedevigan instruon pri Esperanto en mezaj kaj superaj lernejoj. La aŭstria ŝtatoŝefo por instruado permesas privatan instruon pri Esperanto en mezaj kaj komercaj lernejoj kaj en la superaj klasoj de la popol-lernejoj.

En Bulgarujo Esperanto estas instruata en la pedagogiaj kursoj por la preparado de duagrada instruistoj kaj en la soldata lernejo de Sofia. Laŭ nova leĝo, aplikota de post la lernjaro 1922/23, Esperanto estos nedeviga fako en la realgimnazioj de Bulgarujo; jam nun ŝtatinstruistoj de Esperanto estas oficialigitaj en pli ol 30 ŝtataj lernejoj.

Jam antaŭ la milito en la *universitato* Oxford Esperanto estis ekzamena fako. Oni instruas pri Esperanto en la universitatoj Bologna, Budapeŝto, Moskvo, Rotterdamo, Lisboa, Valencio, Kowno, Iowa (Usono), Minneapolo (Usono), Pekino, en la internacia universitato en Bruselo, en la akademiaj kursoj en Essen k. a. *Pastraj seminarioj*, ekz. en Mainz, *superaj lernejoj* en Germanujo kaj en aliaj landoj, *pedagogiaj seminarioj* en diversaj landoj havigas al siaj lernantoj la eblecon, lerni Esperanton, ekz. el *tre multaj aliaj*: realgimnazio en Radebeul, reallernejo en Auerbach, Matthias-gimnazio en Breslavo (dekretoj de la rilataj lernejaj aŭtoritatoj permesas Esperantan instruadon en la superaj kaj en ĉiuj aliaj lernejoj de Breslavo), gimnazio, reallernejo kaj pedagogia seminario en Leitmeritz, kelkaj superaj lernejoj en Saazo, gimnazio Borromäo en Salcburgo, liceo en Roveredo (Italujo), liceo en St. Omer (Francujo), 2 liceoj en Valencio, gimnazio en

Zakopane (Polujo), gimnazio kaj knabingimnazio en Sofia, gimnazio en Uĉmerge (Litovujo), ĉiuj lernejoj en Helsinko (Finnlando) preparantaj por la universitato; duagrada lernejo en Anglujo; normala lernejo (pedag. seminario) de Madrido, Zug, Hiroŝima (Japanujo); supera lernejo de Jokosuka (Japanujo). Esperanto estas instruata en multaj *fakaj* kaj *teknikaj* lernejoj, ekz. en Chemnitz (profesia akademio), Hamburgo-Altona (teknikaj ŝtataj lernejoj), Cöthen (politekniko), Dresdeno (teknika altlernejo), Plauen (urba profesia lernejo), Praha (teknika altlernejo), Vieno (teknika altlernejo), en Londono, Dublino (la angla registaro jam de multaj jaroj allasas Esperanton kiel egalrajtan fakon en la „technical“ kaj en la „evening schools“ (t. e. vesperaj lernejoj), en maristaj lernejoj en Italujo, en Kadizo (Hispanujo; teknika lernejo), en Gefle (Svedujo; teknika vespera lernejo), en Vejle (Danujo; teknika altlernejo), en Pretoria (politeknika lernejo), en Kanton (Ĥinujo; teknika lernejo), en Kioto (Japanujo; supera lernejo por silkfabrikado) k. a. Policanoj estas instruataj pri Esperanto en Dresdeno, Braunschweig, Edinburgo, Madrido, Lisboa. Prelegoj pri Esperanto de post somerduonjaro 1921 estas farataj en la Leipzig-a *komerca* alternejo. Esperanto estas instruata ankaŭ en la komercaj altlernejoj de Nurnbergo kaj de Rotterdamo, en la komercaj akademioj de Reichenbergo kaj Beroun (Ĉeĥoslovakujo), en la supera komerca lernejo ĉe la „Sorbonne“ (Parizo), en tre multaj komercaj lernejoj germanaj kaj alilandaj.

El la granda nombro da *popolaj altlernejoj* germanaj kaj alilandaj, kiuj akceptis Esperanton en sian programon, mi citas nur: Dresdeno, Auerbach, Hannover, Nurnbergo, laborista altlernejo Berlino, Danzig, Budveiso, Genovo, pluraj hispanaj urboj, Amsterdamo. La studplano de la perfektigaj kursoj por popolaltlernejaj instruistoj ĉe la universitato Helsinko (Finnlando) enhavas Esperanton.

En tre multaj *popolaj lernejoj* germanaj kaj alilandaj la lernantoj povas lerni Esperanton nedevige, eĉ devige. El tre multaj aliaj estu citataj nur: Niederhermsdorf-Wurgwitz proksime de Dresden, kantono Genève (*devige*); Dresden, Chemnitz, Leipzig, Öderan, Weinböhla, Worms, Potsdam, Nürnberg, Eßlingen, Breslau, Budapeŝt, Bologna, Milano, Cremona, Schwytz, La Chaux-de-Fonds, Verviers (Belgujo), Haarlem (Nederlando), Ferreira-Borges (Portugalujo), 15 lernejoj en Ĉeĥoslovakujo, Eccles, Liverpool (1917—1920 en 76 anglaj lernejoj), Terrassa (Hispanujo), multaj finnlandaj urboj, Rio de Janeiro, Siberio (*nedevige*). La Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko en Leipzig kun siaj 5 Esperanto-lernejoj okazigas multajn kursojn ne nur por plenaĝuloj, sed ankaŭ por infanoj; simile la Saaz-a (Ĉeĥoslovakujo) urba Esperanto-lernejo. Okazas multege da kursoj por instruistoj, ekz. en Dresden (1921 kuris 6 Esperanto-kursoj de la distrikta instruista Unuiĝo), Plauen, Genève, Bologna, Antwerpen, en diversaj urboj de Litovujo (la ministro por instruado respondis al la peto pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn ne rifuzante, sed almontrante, ke nuntempe mankas ankoraŭ taŭgaj instruantoj), k. a.

La Laborista Esperanto-Grupo en Chemnitz instruigis pri Esperanto centojn da infanoj.

Entute Esperanto nuntempe estas instruata en iuj unuagrada aŭ duagrada lernejoj de ĉirkaŭ 320 urboj en 17 landoj.

En multaj *blindulejoj*, ekz. en Halle a. S., Frankfurt a. M., London, Purkersdorf (Aŭstrio), Praha, Budapeŝt, Grave (Nederlando), Edinburgh, Genova, Woluwe (Belgujo), k. a. okazas kursoj pri Esperanto. La 7a aŭstria porblindula prizorga kunveno („Blindenfürsorgetag“, 1920) akceptis la proponon de deviga enkonduko de Esperanto en la aŭstriajn blindullernejojn. La Braille-aj bibliotekoj de

Leipzig kaj Breslau publikigas Esperantajn verkojn en Braille-a skribo.

Tre multnombraj estas la kursoj organizataj en ĉiuj civilizitaj landoj de la mondo en rondoj ĝeneralaj, laboristaj kaj laboristjunularaj, fakaj (poŝtoficistaj, fervojistaj, tramvojistaj, policanaj, asekur-, bankoficistaj, studentaj, komercistaj, skoltaj, sportaj, komunumoficistaj, ruĝkrucaj, framasonaj k. a.). Dum la vintro 1921/22 en Germanujo okazis ĉirkaŭ 1600 kursoj kun ĉirkaŭ 40000 komencantoj, el kiuj ĉirkaŭ 20000 laboristoj.

53. Donu nombrojn pri la disvastiĝo de Esperanto.

En 1912 la statistiko montris: Gazetoj ĉirkaŭ 100; societoj kaj grupoj 1575 en 24 landoj. Inter la diversaj landoj Germanujo posedis 273, Francujo 225, Aŭstrio-Hungarujo 176, Granda Britujo 152, Rusujo 89, Nederlando 55 societojn kaj grupojn. La Franca Societo por Propagando de Esperanto kunigis ĉirkaŭ 10000, la Germana Esperanto-Asocio ĉirkaŭ 5000 pagantajn membrojn. En 1922 en Germanujo ekzistis 158 grupoj de G. E. A., 14 de la Ligo de Katolikaj Esperantistoj, 90 de la Laborista Esperantista-Asocio, 28 izolitaj, entute 285 grupoj; en pli ol 200 urboj kaj vilaĝoj oni instruis Esperanton. Oni taksas je 12000 la nombron de la personoj, plenaĝaj kaj infanaj, kiuj en 1922 lernis Esperanton. Krom tiuj societoj ekzistis en ĉiuj landoj grandaj aroj da esperantistoj, kiuj ankoraŭ ne aliĝis al la naciaj asocioj. Por citi la aperintajn lernilojn diversspecajn, la katalogo de la Esperanto-biblioteko de Davidov (1911) bezonas 23 paĝojn. Nuntempe ekzistas lernolibroj kaj vortaroj en 38 lingvoj. Teknikaj vortaroj estas publikigitaj por 9 specialaj fakoj, same kiel enciklopedio kaj ĝenerala teknika kaj teknologia vortaro. Entute Esperanto posedas

bibliotekon de pli ol kvar mil verkoj presitaj, aŭ tradukitaj aŭ originalaj. Resume oni povas diri: Multaj gravaj organizaĵoj, ŝtataj, urbaj kaj aliaj estraroj kaj aŭtoritatuloj, parlamentoj, influriĉaj komercistoj kaj industriistoj, famkonataj scienculoj, diplomatoj protektas Esperanton. Helpado per monrimedoj (ekz. en Finnlando, Brazilio), rekonado de Esperantista Ligo kiel „publikutila“ (Brazilio), disponigado de lernejoj ĉambroj ktp. fariĝas pli kaj pli oftaj. La nombro de la gazetoj, prezentantaj nacilingvajn artikolojn pri Esperanto kaj regulajn Esperanto-angulojn aŭ artikolojn en Esperanta lingvo, daŭre pliiĝas en la tuta mondo. La nombro de la principaj kontraŭuloj malpliiĝas. La ĝenerala opiniaro pli kaj pli favoras Esperanton. Esperanto marŝadas! Ankaŭ malfavoraj juĝoj kiel tiu de la landkomitato de la prusaj komercaj ĉambroj (1921) kaj de la franca ministro por instruado (1922) certe ne malhelpos ĝian progresadon.

54. Kion vi scias pri lerniloj kaj informiloj pri Esperanto?

La nombro de la verkoj por instruado, vortaroj, verkoj por ekzercado kaj perfektigo (frazlibroj, legolibroj, komerca korespondado, Esperantaj Bibliotekoj, apartaj eldonoj de beletristika, faka kaj speciala literaturo, de kantaroj kaj muzikaĵoj), informiloj kaj propagandiloj estas tre granda. Mi nek povas nek volas citi ĉiujn; oni facile povas informi sin pri ili per la Esperanto-katalogoj de la Esperanto-Eldonejoj. Mi rezignas ankaŭ pri juĝado al la diversaj metodoj uzataj por elementaj kursoj, nur dirante, ke preferinda ŝajnas al mi metodo, kiu tuj de komenco ekzercadas la paroladon, ne malatentante la gramatikon, kaj nek troŝargas per enmemorigo de tro multe da vortmaterialo la akiradon de la gramatiko, nek per samtempa ampleksa ekzercado de gramatiko la akiradon

de sufiĉe granda provizaĵo da vort- kaj esprimmaterialo el la praktika vivo kaj ties fluan uzadon.

Estu citataj nur: 1. Lernolibroj verkitaj aŭ redaktitaj de Dro Zamenhof: Fundamento de Esperanto (Antaŭparolo, Gramatiko, Ekzercaro, Universala Vortaro)¹⁾, Lingvaj Respondoj, Taschenwörterbuch Deutsch-Esperanto und Esperanto-Deutsch, Vortaro Rusa-Esperanto, Frazologio, Fundamenta Krestomatio; Jürgensen und Pagnier, Wörterbuch Deutsch-Esperanto unter Redaktion von Dr. Zamenhof. — 2. Detalaj Gramatikoj: Velten, Ausführliche Grammatik der Esperanto-Sprachlehre; Christaller, Esperanto; Lippmann, Dr. Zamenhofs sprachliche Gutachten in deutscher Bearbeitung mit Ergänzungen und Erläuterungen; Göhl, Ausführliche Esperanto-Sprachlehre (preta por presado); R. de Saussure, La vort-teorio en Esperanto; Devjatnin, Afiksaro; Aymonier, Grammaire complète d'Esperanto; Cox, A Grammar and Commentary on Esperanto; Kellermann, A complete Grammar of Esperanto; Ghez, Grammatica e Sintassi de Esperanto; Fruictier, Esperanta Sintakso. — 3. Kelkaj grandaj Vortaroj: Boirac, Plena Vortaro Esperanto-Esperanta kaj Esperanto-Franca; Kabe, Vortaro de Esperanto; Wüster, Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana (preta por presado); Christaller, Deutsch-Esperanto Wörterbuch; Presa Esperantista Societo (Paris), Grand Dictionnaire Français-Esperanto; Grosjean-Maupin, Dictionnaire complet Esperanto-Français; Rhodes-Keighley, The English-Esperanto Dictionary; Millidge, The Esperanto-English Dictionary; Grabowski, Vortaro Pola-Esperanto; Korzlinsky, Rusa-Esperanta Vortaro; Svensk Esperantisk Ordbok. — 4. Teknikaj Vortaroj: Bricard, Matematika Terminaro kaj Kres-

¹⁾ La Sekcio de la Lingva Komitato por la Komuna Vortaro faris korektojn de la eraraj tradukoj en la Universala Vortaro. Ili aperis presitaj por ĉiuj kvin lingvoj de l' U. V.

tomatio; Rollet de l' Isle, Provo de marista Terminaro; F. de Menil, Muzika Terminaro; Verax, Vocabulaire Technique et Technologique Français-Esperanto, Enciklopedia vortareto Esperanta. La Lingva Komitato preparas la eldonon de teknikaj vortaroj. — 5. Informiloj: Deutscher Esperanto-Bund, Das Esperanto ein Kulturfaktor; Dr. Göhl, Esperanto. Eine Kulturforderung und ihre Erfüllung; Dr. Möbusz, Dokumentoj de Esperanto; Dr. Steche, Entwicklungsgang der Weltsprache.

55. Kion vi scias pri la laste aperintaj sistemoj de L. I. kaj precipe pri la reforma movado?¹⁾

Post la apero de Esperanto (1887) publikiĝis ofte sistemoj de L. I. La ĉefa el ili estas „Ido“. Jen ĝia deveno²⁾:

„En la jaro 1900a s-roj Leau kaj Couturat († 1914) fondis delegitaron por la alpreno de helpa lingvo internacia. Laŭ la regularo de tiu fondaĵo, la elekto de la helpa lingvo estis farota de la Internacia Asocio de la Akademioj, aŭ, se tiu Asocio ne volas, de speciala Komitato elektita de la Delegitaro.“³⁾

¹⁾ Pro la amplekso de l' temo mi donos nur kelkajn detalojn kaj rekomendas al ĉiu, kiu deziras studi tiun tre interesan demandon, jenajn verkojn:

Cirkulera letero al ĉiuj Esperantistoj (18an de Januaro 1908), de Dro L. L. Zamenhof (Lingvo Internacia XIII, 1908, p. 73—77);

Bedarf Esperanto der Verbesserung, de Prof-ro P. Christaller (Stuttgart)

Esperanto und seine Feinde, de Berlina Esp. Grupo;

Faut-il réformer l'Espéranto, de s-ro G. Kolowrat (Paris)

Pri la derivado en Ido kaj en Esperanto, de s-ro G. Kolowrat (Paris);

Germanlingva raporto de s-ro Prof-ro P. Christaller en „Germana Esperantisto“ de Aprilo 1911;

Historio kaj teorio de Ido, de Kotzin (Moskvo 1913);

Dro Haller, La 10 superĉeoj de Ido kontraŭ Esperanto kaj 10 respondoj al ili (Informa Bulteno 1, p. 15—22, kaj Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, p. 188).

²⁾ Laŭ „Raporto de s-ro E. Boirac pri la agado de la L. K. de la IIIa ĝis la IVa Kongresoj“ en Oficiala Gazeto p. 80—88.

³⁾ Ĉi-poste mi iom detale priparolos tiun faman Delegitaron, ĉar la Idistoj ĉiam klopodas dissemi neverajn rakontojn pri ĝi. (Vidu ankaŭ: Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, p. 179.)

Ĉar tiu Asocio decidis, ke ĝi estas nekompetenta por esplori kaj solvi tiun demandon, la Delegitaro elektis specialan komitaton plenumontan la celon de la entrepreno . . . La komitato kunestis de la 15a—24a de Oktobro 1907a kaj esploris multajn projektojn de L. I. (Spokil, Bolak, Dilbok, Apolema, k. c.); Esperanto estis prezentata al ĝi de s-ro de Beaufront. Subite, iam, aperis sur la tabloj de la kunsido nova projekto, subskribita „Ido“; fine la rezultato estis jena:

La komitato decidis, ke neniue el la lingvoj submetitaj al ĝia ekzameno povas esti alprenata en sia tuteco kaj sen ŝanĝoj. Ĝi decidis alpreni principe Esperanton, pro ĝia rilatiga perfekteco kaj pro la multaj kaj diversaj aplikoj, kiujn ĝi jam okazigis, sub la kondiĉo de kelkaj ŝanĝoj efektiviĝotaj de la Konstanta Komitato, laŭ la senco difinita en la konkludoj de la raporto de la sekretarioj de la komitato kaj de la projekto „Ido“, provante interkonsenti kun la Esperantista Lingva Komitato.

La nomita Konstanta Komitato konsistis el s-roj Ostwald, prezidanto, Baudouin de Courtenay, de Beaufront, Jespersen, membroj, Couturat kaj Leau, sekretarioj. La taktiko de s-ro Couturat konsistis el tio, ke li dividis la komitaton en du partojn: la neesperantistoj, kiuj preskaŭ ĉiutage interkonsiliĝis aparte en antaŭaj fermitaj kunsidoj, kaj la esperantistoj, kiujn oni akceptis kvazaŭ per favoro en ĝenerala kunsido, nur kiam la ceteraj estis antaŭe starigintaj iun decidon . . . Cetere s-ro Couturat kredigis, ke la decidoj de la Delegitara Komitato estis oficiale akceptitaj de la prezidanto de la L. K. (s-ro Boirac) pere de lia reprezentanto (s-ro Moch), kaj li neniam forgesis rimarkigi tion en siaj gazeto¹⁾ kaj leteroj . . . La projekto Ido estis jam de longe preparita kaj difinita por esti elektata de la komitato. La aŭtoro de ĉi tiu

¹⁾ La gazeto „Progreso“, kiun li poste eldonis, senrajte, kiel oficialan organon de la delegitaro. (Rim. de s-ro E. Boirac.)

projekto, unu el la ĉefkonspirantoj, estis *tiu homo, kiun Dro Zamenhof mem elektis por reprezenti lin kaj defendi lian kreaĵon*, homo ĝis tiam rigardita de ĉiuj esperantistoj kiel unu el la plej severaj konservemuloj, neniam uzinta sian influon al la Majstro kaj sian aŭtoritaton al la samideanoj, dum la daŭro de pli ol 20 jaroj, por elparoli la plej malgrandan vorton pri eblaj reformoj.

La nomo de l' aŭtoro de Ido, kvankam konata de s-ro Couturat, ne estis dirata al s-ro Boirac, kiu protestis, „memorigante, ke la regularo de la Delegitaro malpermesas, ke aŭtoro de lingva projekto estu membro de la Komitato“. — „Prezidanto Ostwald respondis al mi, ke li ricevis de la sekretarioj la certigon, ke ili konas la nomitan Idon, kaj ke tiu ĉi ne estas unu el ili ambaŭ, nek unu el la ceteraj komitatanoj, kaj ke cetere li havas plenan rajton prezenti sian verkon sub falsa nomo, same kiel faris Dro Zamenhof por Esperanto.“ — „Tre verŝajne la primitiva intenco de la konspirantoj estis trafi, ke la Delegitara Komitato alprenu rekte Idon — ne parolante pri Esperanto aŭ ĝin forĵetante kun la ceteraj konkurantaj lingvoj; sed oni timis, ke tiamaniere oni surprizos la publikon per prezento de projekto tute freŝe bakita kaj de ĉiuj nekonata; plie, ke oni ne povos tiel akiri por si la moralan forton kaj materiajn rimedojn jam posedatajn de Esperanto. Tial oni decidis alpreni *principe* aŭ, por pli ĝuste diri, *ŝajne* Esperanton, konservante tamen la intencon altrudi efektive Idon tia, kia ĝi eliris el la kapo de sia forĝinto. Oni do ŝajnigis la deziron, interkonsenti kun la Lingva Komitato, sed en la efektiveco oni faris ĉion eblan, por ke la interkonsento ne povu okazi, se ne kiel tuja kaj entuta obeo de la Lingva Komitato al la postuloj de la Idistaro.“

Pri la ekzisto de tia plano ni havas, kiel pruvojn, la dirojn de s-ro Couturat mem. Tuj post la lastaj kunsidoj

de la komitato (28an de Oktobro), Dro Zamenhof ricevis de li leteron, en kiu la plano tute nude kaj senhonte montriĝas.

„Pri la nomo de la alprenita lingvo, nenio estas ankoraŭ decidita. Se la esperantistoj ĝin akceptos, ĝi nomiĝos ‚*Esperanto* sen sursignoj‘ aŭ ‚*Esperanto*‘ tute simple, kaj la komitato estos feliĉa rekoni tiamaniere, ke vi estas ĝia unua kaj ĉefa aŭtoro kaj fari justecon al via bela verko, kiun ĝi admiras. En kontraŭa okazo, ĝi estos devigata doni al la lingvo alian nomon, ‚*Auxiliaro*‘ ekzemple, kaj lasi al la senpartia historio la taskon, difini la parton, kiu estas la via en ĝia kreado. Sed ĉio esperigas al mi, ke interkonsento fariĝos inter la du organizaĵoj, sur la bazo difinita kune per la konkludoj de nia raporto kaj per la projekto de Ido (kiu estas nek de s-ro Leau nek de mi).“

Tiu letero montras tre klare, ke, kiam la Delegitara Komitato decidis provi interkonsenton kun la Lingva Komitato, tio signifis simple, ke ĝi povus trudi al la Lingva Komitato la projekton Ido, minacante, se la Lingva Komitato ne akceptos ĝin, krei skismon kaj fari, el tiu projekto, novan lingvon konkurantan por ruinigi la verkon de Zamenhof. Cetere, en tiu momento, oni devas pensi, ke la lernolibroj, ekzercaroj kaj vortaroj de tiu nova lingvo estis jam tute pretaj, ĉar ili eliris el la presejoj nur malmulte da monatoj poste, kaj tiu intertempo ne estus sufiĉa por ilin tute verki kaj presigi.

Post la decido de la komitato estis proponate al la esperantista L. K., interkonsenti kun la delegitaro, sed la konsentita tempolimo de unu monato estis multe tro mallonga por ebligi efikan konsultadon al la L. K.-anoj. Tamen tuj post tiu tempolimo kaj malgraŭ protesto de l' prezidanto de la L. K., s-ro Ostwald skribis, ke la komitato nun sentas sin libera agi kaj zorgos mem pri la disvastigado al sia faraĵo.

„Por konkludi tiun longan raporton“, skribas s-ro Boirac, „mi diros, ke, laŭ mia opinio, la Delegitaro estus pli bele aginta

kaj eble sukcesinta, se, anstataŭ favori, pro troa cedemo al la sekretarioj, komploton sekrete organizitan, por faligi doktoron Zamenhof kaj la L. K. en ian kaptilon, ĝi estus nur petinta ĝentile, ke la L. K. atente konsideru la de ĝi proponitajn plibonigojn. Tiam ne estus dubeble, ke la L. K. estus esplorinta la proponojn de la Delegitara Komitato kun la tuta ŝatemeco ŝuldata al tiaj eminentuloj kiel s-roj Förster, Ostwald, Baudouin de Courtenay, Jespersen ktp.; sed tute kontraŭe oni volis trudi perforte ian sistemon, akceligi la aferojn, forpreni konsenton surprize. Pro tio ankaŭ, sendube la pli multaj el tiuj eminentuloj sin fortiris, iom hontante aŭ kolerante pri la rolo, kiun oni provis igi ilin ludi. Tiamaniere ke nun restas solaj nur la du konspirantoj, s-roj de Beaufront kaj Couturat — kun la honorinda profesoro s-ro Jespersen, kiu pro sia eco de simpla sciencisto, atentis nur la lingvan flankon de la demando, forgesante, ke en la praktiko la aferoj estas alie malsimplaj ol en la teorio, kaj ke la moralaj konsideraĵoj havas ofte gravecon multe pli grandan ol la sciencaj.“

Multaj gravaj societoj, aliĝintaj al la delegitaro, ekŝiĝis el ĝi post ĝia arbitra decido. Plie, s-ro Baudouin de Courtenay diris: „Kiu decidas detrui la unuecon de la esperantistoj, entreprenas tre riskan paŝon, kiu posttrenos gravajn sekvojn. Pro tio, ĉar mi ne volas preni sur min tiom grandan respondecon, mi vidas min devigata ekŝiĝi el la Komitato de la Delegitaro.“

Prof-ro Dro Förster, honora prezidinto de la delegitaro mem, ekŝiĝis, dirante, ke „tia agadmaniero instigis min, ne nur fordoni la honoran prezidantecon, sed ankaŭ ekŝiĝi el la komitato, ĉar en tiuj procedoj mankas, laŭ mi, ĉiu sociala saĝeco, kaj mi opinias ilin taŭgaj nur por krei konfuzon kaj meti en danĝeron la progresojn atingitajn post jardekoj da longaj laboroj“.

Sekve de multnombraj postuloj la *L. K.* ekzamenis la diversajn ŝanĝojn, kiujn la *Idistoj* opinias necesaj en *Esperanto*, kaj unu fojon por ĉiam malakceptis ilin. La afero estas do finita, kaj la esperantistoj trankvile iras sian vojon.

KIO ESTAS IDO?

Ido estas kopiaĵo de Esperanto, speciale karakterizita de alfabeto sen supersignoj. Ĝi forlasas la Esperantan principon: al ĉiu sono unu signo kaj al ĉiu signo unu sono (ŝ = sh, ĉ = ch, k kaj q por sono k, v kaj w por sono v; la *Ido* j, ludante duoblan rolon, naskas nenaturajn vortbildojn, ekz. inĵeniero, jenante, jirafo). En *Ido* la akcento ne estas ĉiam egala; ĝenerale, kiel en Esperanto, la antaŭlasta silabo estas akcentata, sed: drinkár = drinki (infinitivo), fílio, indústriio (pli ol dusilabaj vortoj kun la finaĵo io).

Esperanto kaj *Ido* havas akuzativon. En Esperanto ĝi estas deviga; tiu devigo havigas al la lingvo pli grandan liberecon pri la vortordo kaj pli grandan logikan klarecon. *Ido* ĝin uzas nur ĉe la vortinversiĝo (komplemento antaŭ la subjekto). Tiu inversiĝo ofte estas dezirinda, ĉar oni inklinas meti la komplementon je la komenco, se ĝi estas la ĉefaĵo en la frazo. Se *Ido* volas nepre eviti la akuzativon, ĝi interŝanĝas *devigan* vortordon laŭ la skemo: subjekto, predikato, komplemento. Tio certe ne estas plibonaĵo.

En Esperanto ankaŭ la konformeco de adjektivo laŭ nombro kaj kazo kun la substantivo estas deviga. Per tio la logika aparteneco de la adjektivo estas montrata pli klare; la facila kaj rapida komprenebleco de la frazo fariĝas pli granda, la vortordo pli libera. *Ido* havas la neflekseblan adjektivon. Ĝi evitas per tio malgrandar malfacilaĵon, sed forlasas la ĵus cititan superecon. Cetere en kelkaj okazoj ĝi ne povas rezigni pri la plurala kaj akuzativa signoj de la adjektivo.

Ido havas ĉirkaŭ dek afiksojn pli ol Esperanto, pli da verboformoj, pli da pronomoj. Tiamaniere ĝi akiras tiom grandan subtilecon, ke eĉ la direktantoj de la *Ido*-movado faras erarojn pri ilia uzo.

Ido plenumas la principojn de la maksimuma internacieco pli konsekvence, sed ankaŭ pli pedante kaj pli formale ol Esperanto. Dum Esperanto laŭprincipe elektas tiujn radikojn, kiuj el ĉiuj ekzistantaj havas la plej grandan disvastiĝon kaj estas komprenataj de plej multe da *homoj*, Ido oftege alprenas tiujn, kiujn prezentas plej multe da *lingvoj*, kvankam la nombro de la homoj, kiuj parolas ilin, estas pli malgranda. Esperanto ankaŭ pli multe konsideras la kulturvaloron de la nacioj, en kies lingvoj la radikoj sin trovas. Ekz. itala kune kun hispana lingvoj ĉi-tiurilate ne egalvaloras al germana kune kun angla lingvoj. El tia procedo rezultas, ke Ido legitime enhavas, kiel Esperanto, la internaciajn vortojn komunajn preskaŭ al ĉiuj kultur-nacioj, kiuj plejparte devenas, krom el la greka lingvo, el la latina lingvo kaj ties idoj, la romanaj lingvoj, sed ankaŭ nelegitime grandan nombron da *romanaj* radikoj, kiujn Esperanto ne havas. Ido ankaŭ anstataŭigas multajn kunmetitaĵojn kaj facile lerneblajn derivaĵojn per novaj radikoj plejparte devenantaj el romanaj lingvoj, ekz. *faro* = lumturo, *blamar* = mallaŭdi. Sekve Ido estas multe pli romana ol Esperanto kaj per tio pli malfacila al neromanoj ol Esperanto.

Tiamaniere Ido estas eble interesa provobjekto por teoriuloj kaj scienculoj, sed ne taŭga por ludi la rolon de internacia helpa lingvo, simpla kaj facile lernebla por ĉiu meze instruita homo.

La Ida Akademio proksimume ĉiutrimonate decidis ŝanĝojn, malebligante tiamaniere floradon de literaturo, vivon de la lingvo.

De post la jaro 1912a en Ido ja estas enkondukita *la periodo de stabileco*. Sed konsiderante, ke Ido ne havas firman „Fundamenton“ kiel Esperanto, oni povas dubi, ĉu la „kompetentuloj“ de Ido ĝin konservos sufiĉe longtempe.

La Idistoj riproĉas al Esperanto senmovecon, fermante la okulojn al la konstanta pliriĉiĝo de nia lingvo kaj forgesante, ke en afero tiom grava kiom internacia lingvo, ĉiu tro rapide farita paŝo povas havi tre profundajn konsekvencojn, precipe kiam mankas iu fundamento, kaj ke pro rapidemo oni riskas ruinigi la grandegan laboron de pli ol tri jardekoj da penado.

R. de Ladevèze diras en la 1a eldono de ĉi tiu libro:

Konata germana Idisto (s-ro Peus) diris en propaganda parolado al laboristoj — kiun mi ĉeestis — post kiam li estis montrinta, kiajn subtilajn nuancojn de senco Ido povas traduki, dank' al siaj multnombraj afiksoj — ekz. *reĝala ĝardeno* (*ĝardeno apartenanta al reĝo*); *reĝa ĝardeno* signifas: *ĝardeno*, kiu estas *reĝo*, ho! admirinda logiko! — ke sekve de tia riĉeco Ido ne estas tre facila, kaj li mem, kvankam li lernis diversajn mortintajn kaj modernajn lingvojn, ne povas verki unu numeron de sia gazeto, ne farante erarojn. Malgraŭ ĉio li havis la kuraĝon, proponi Idon al la laboristoj kiel lingvon pli bonan, pli simplan, pli facile lerneblan ol Esperanto, kiel la sole eblan solvon de l' problemo de internacia lingvo. Oni pripensu kaj juĝu! Alfabeto, gramatiko, elparolado havas esceptojn; dum la lasta tempo la afikso *mal* estas forlasita ĉar netaŭga; nun oni diras mikra (malgranda), rara (malofte), olda (maljuna). Anstataŭ „sed“ oni diras „ma“. Feliĉaj estas la esperantistoj dank' al sia Fundamento! Sen ĝi, kie ni jam estus!

Koncerne la ŝatatan argumenton de la Idistoj, ke Dro Zamenhof mem en 1914 proponis ŝanĝojn en Esperanto, vidu lian kongresparoladon en Washington, 1910, kiu enhavas la frazon: „Tiel ekzemple la forigo de la supersignoj kaj de la akuzativo, kion mi antaŭ dek ses jaroj proponis, por *liberiĝi de la turmentantoj kaj faciligi la propagandon* ...“

Dro Zamenhof (kongresparolado, Washington, 1910), ekzameninte, kiamaniere agus registare elektita komitato, komisiita elekti la internacian helplingvon, konkludas post logika esploro jenmaniere:

1. Lingvo Internacia ne povas esti alia ol Esperanto.

2. La evoluado de la lingvo fariĝos plej kredeble nur per tiu sama natura vojo, per kiu ĝi fariĝis en ĉiu alia lingvo, t. e. per la senrompa vojo de neologismoj kaj arĥaismoj.

3. Se iam aperos la neceseco fari en Esperanto ian ŝanĝon, tion povas fari nur la esperantistoj mem, per komuna interkonsento, aŭ ia grandega forto, sed nepre en plena interkonsento kun la tuta esperantistaro.

4. Se iam la esperantistoj mem aŭ ia granda ekstera forto decidus fari en Esperanto iajn ŝanĝojn, tiuj ŝanĝoj povos esti nur ekstreme malgrandaj, neniam rompos la kontinuecon kun tio, kion ni ĝis nun havis, kaj neniam senvalorigos tion, kion ni ĝis nun faris, faras aŭ poste faros.

Tio estas la sole ebla natura irado de la aferoj. Ĉiu, kiu volas kontraŭbatali tiun naturan iradon, nur perdos senbezzone siajn fortojn. La Esperantaj radikoj de la arbo internacilingva jam tiel profunde penetris en la teron de la vivo, ke ne povas jam ĉiu deziranto ŝanĝi la radikojn aŭ ŝovi la arbon laŭ sia bontrovo. ... Ni povas sekve labori trankvile; ni ne devas malĝoji, se nia laborado estas iafoje tre malfacila kaj sendanka; sur nia flanko estas ne sole la fajro de niaj sentoj, sur nia flanko estas ankaŭ la nerefuteblaj leĝoj de la logiko kaj prudento.

Ankaŭ *Esperantido* (de R. de Saussure), nova formo de Esperanto, certe ne sukcesos.

56. Kio estas la interna ideo de l' Esperantismo?

Dro Zamenhof detale parolis pri la „interna ideo“ en sia parolado ĉe la malfermo de la IIa Kongreso en Genève, 1906¹⁾:

„El la deklaro, unuanime akceptita en la Bulonja kongreso ni ĉiuj scias, kio estas la Esperantismo en rilato *praktika*; el tiu ĉi deklaro ni ankaŭ scias, ke „esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas.“ Esperantisto sekve estas ne sole tiu persono, kiu

¹⁾ Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, p. 62.

revas unuigi per Esperanto la homaron, esperantisto estas ankaŭ tiu persono, kiu uzas Esperanton ekskluzive por celoj praktikaj, esperantisto ankaŭ estas persono, kiu uzas Esperanton por gajni per ĝi monon, esperantisto estas persono, kiu uzas Esperanton nur por amuziĝadi, esperantisto fine estas eĉ tiu persono, kiu uzas Esperanton por celoj plej malnoblaj kaj hom-malamaj. Sed krom la flanko *praktika*, deviga por ĉiuj kaj montrita en la Deklaracio, la Esperantismo havas ankoraŭ alian flankon, ne devigan, sed multe pli gravan, flankon *idean*. Tiun ĉi flankon diversaj esperantistoj povas klarigi al si en la plej diversa maniero kaj en la plej diversaj gradoj. Tial, por eviti ĉiun malpacon, la esperantistoj decidis lasi al ĉiu plenan liberecon akcepti la internan ideon de la Esperantismo en tiu formo kaj grado, en kiu li mem deziras, aŭ — se li volas — eĉ tute ne akcepti por la Esperantismo ian ideon. Por demeti de unuj esperantistoj ĉiun respondecon por la agoj kaj idealoj de aliaj esperantistoj, la Bulonja deklaro precizigis la oficialan, de ĉiu akceptitan, esencon de la Esperantismo kaj aldonis la sekvantajn vortojn: „Ĉiu alia espero aŭ revo, kiun tiu aŭ alia esperantisto ligas kun la Esperantismo, estas lia afero pure *privata*, por kiu la Esperantismo ne respondas.“ Sed bedaŭrinde la vorton „privata“ kelkaj amikoj-esperantistoj klarigas al si en la senco de „malpermesata“, kaj tiamaniere anstataŭ konservi al la interna ideo de la Esperantismo la eblon tute libere disvolviĝi, ili volas tiun ĉi ideon tute mortigi. Se ni, batalantoj por Esperanto, propravole donis al la vasta mondo plenan rajton rigardadi Esperanton nur de ĝia flanko praktika kaj uzadi ĝin nur por sia utilo, tio ĉi kompreneble al neniu donas la rajton postuli, ke ni *ĉiuj* vidu en Esperanto *nur* aferon praktikan? Bedaŭrinde en la lasta tempo inter la esperantistoj aperis tiaj voĉoj, kiuj diras; „Esperanto estas *nur* lingvo; evitu ligi eĉ tute private la Esperantismon kun ia *ideo*, ĉar alie oni pensos, ke ni ĉiuj havas tiun ideon, kaj ni malplaĉos al diversaj personoj kiuj ne amas tiun ideon!“ Ho, kiaj vortoj! El la timo, ke ni eble ne plaĉos al tiuj personoj, kiuj mem volas uzi Esperanton nur por aferoj utilaj por ili, ni devas *ĉiuj* elŝiri el nia koro tiun parton de la Esperantismo, kiu estas la plej grava, la plej sankta, tiun ideon, kiu estis la ĉefa celo de la afero de Esperanto, kiu

estis la stelo, kiu ĉiam gvidadis ĉiujn batalantojn por Esperanto! Ho, ne, ne, neniam! Kun energia protesto ni forĵetas tiun ĉi postulon. Se nin, la unuajn batalantojn por Esperanto, oni devigos, ke ni evitu en nia agado ĉion idean, ni indigne disŝiros kaj bruligos ĉion, kion ni skribis por Esperanto, ni nenigos kun doloro la laborojn kaj oferojn de nia tuta vivo, ni forĵetos malproksimen la verdan stelon, kiu sidas sur nia brusto, kaj ni ekkrios kun abomeno: „Kun *tia* Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan!“

Venos iam la tempo, kiam Esperanto, fariĝinte posedaĵo de la tuta homaro, perdos sian karakteron idean; tiam ĝi fariĝos jam nur lingvo, oni jam ne batalados por ĝi, oni nur tirados el ĝi profiton. Sed nun, kiam preskaŭ ĉiuj esperantistoj estas ankoraŭ ne profitantoj, sed nur batalantoj, ni ĉiuj konscias tre bone, ke al laborado por Esperanto instigas nin ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava *ideo*, kiun lingvo internacia en si enhavas. Tiu ĉi ideo — vi ĉiuj sentas ĝin tre bone — estas *frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj*. Tiu ĉi ideo akompanadis Esperanton de la unua momento de ĝia naskiĝo ĝis la nuna tempo. Ĝi instigis la aŭtoron de Esperanto, kiam li estis ankoraŭ malgranda infano; kiam antaŭ dudek-ok jaroj rondeto da junaj diversgentaj gimnazianoj festis la unuan signon de vivo de la estonta Esperanto, ili kantis kanton, en kiu post ĉiu strofo estis ripetataj la vortoj: „Malamikeco de la nacioj falu, falu, jam estas tempo.“ Nia himno kantas pri la „nova sento, kiu venis en la mondon“; ĉiuj verkoj, vortoj kaj agoj de la iniciatoro kaj de la unuaj esperantistoj ĉiam spiras tute klare tiun saman ideon. Neniam ni kaŝis nian ideon, neniam povis esti eĉ la plej malgranda dubo pri ĝi, ĉar ĉio parolis pri ĝi. Kial do aliĝis al ni kaj sindone kaj senprofite laboris kun ni la personoj, kiuj vidas en Esperanto „nur lingvon“? Kial ili ne timis, ke la mondo kulpigos ilin pri granda krimo, nome pri la ĉeziro helpi al iom-post-ioma unuiĝo de la homaro? Ĉu ili ne vidas, ke iliaj paroloj estas kontraŭaj al iliaj propraj sentoj, kaj ke ili senkonscie revas pri tio sama, pri kio ni revas, kvankam pro neĝusta timo antaŭ sensencaj atakantoj ili penas tion ĉi nei? ...“

Ankaŭ en sia parolado ĉe la IIIa Kongreso en Cambridge, 1907, li parolis pri la sama temo.¹⁾ Ĉi tie estu citataj nur la lastaj frazoj de tiu parolado:

„Multaj personoj aliĝas al la Esperantismo pro simpla scivoleco, pro sporto, aŭ eble eĉ pro atendata profito; sed de la momento, kiam ili faras la unuan viziton en Esperantujo, ili malgraŭ sia propra volo ĉiam pli kaj pli entiriĝas kaj submetiĝas al la leĝo de tiu lando. Iom post iom Esperantujo fariĝos edukejo de la estonta interfratigita homaro, kaj en tio ĉi konsistas la plej gravaj meritoj de niaj kongresoj.

Vivu Esperanto, sed antaŭ ĉio vivu la celo kaj la **interna ideo** de la Esperantismo, **vivu la frateco de la popoloj, vivu ĉio, kio rompas la murojn inter la gentoj**, vivu, kresku kaj floru la verda standardo!“

*

Glora la celo, sankta l' afero,
La venko — baldaŭ ĝi venos;
Levos la kapon ni kun fiero,
La mondo ĝoje nin benos.

Tiam atendos nin rekompenco
La plej majesta kaj riĉa:
Nia laboro kaj pacienco
La mondon faros feliĉa.

(Al la fratoj.)

Dro Zamenhof

¹⁾ Möbusz, Dokumentoj de Esperanto, p. 69.





Tabelo de enhavo

	paĝo
Antaŭparoloj	3

I. Historio de l' ideo pri internacia lingvo

Demandoj A. DEVENO

1. De kie devenas la ideo pri internacia lingvo?	5
2. Kial oni ne elektis ian mortintan aŭ vivantan lingvon?	5
3. Kion vi scias pri la diversaj projektoj de lingvo internacia	6

B. VOLAPÜK

4. Kio estas Volapük?	7
5. Laŭ kiuj principoj Volapük estas konstruita?	8
6. Ĉu Volapük sukcesis?	9

II. Historio de Esperanto

I. (KREA) PERIODO

7. Kiu estas la aŭtoro de Esperanto?	10
8. Kion vi scias pri la vivo de Dro Zamenhof?	10
9. Kio donis al li la ideon pri internacia lingvo?	11
10. Kion vi scias pri liaj unuaj laboroj? Ilia rezultato?	11

II. (KELK- KAJ MULTENACIA) PERIODO

11. Kiam Dro Zamenhof publikigis sian lingvon?	14
12. Donu kelkajn detalojn pri la unuaj jaroj!	14
13. Sur kiuj principoj Esperanto estas bazita? (Principo de internacieco)	15

Demandoj	paĝo
14. Kio estas la Fundamento? — Laŭ kiuj principoj Esperanto devas evoluadi?	16
15. Ĉu povas esti ĉefuloj en Esperanto?	18
16. Kie Esperanto estis unue diskonigata? Pere de kiu?	18

III. (INTERNACIA) PERIODO

17. Kion vi scias pri la I-a Universala Kongreso de Esperanto?	20
18. " " " " " IIa " " " " "	24
19. " " " " " IIIa " " " " "	25
20. " " " " " IVa " " " " "	29
21. " " " " " Va " " " " "	30
22. " " " " " VIa " " " " "	31
23. " " " " " VIIa " " " " "	34
24. " " " " " VIIIa " " " " "	35
25. " " " " " IXa " " " " "	36
26. " " " " " Xa " " " " "	38
27. Kion vi scias pri la dumviva vivo de Esperanto?	39
28. Kion vi scias pri la XII-a Univers. Kongreso de Esperanto?	39
29. " " " " " XIIIa " " " " "	42
30. " " " " " XIVa " " " " "	44
31. Kio estas kongreso?	45

III. Organizaĵoj de Esperanto

A. ANTAŬAJ OFICIALAJ ORGANIZAĴOJ DE ESPERANTO

32. Kiujn Oficialajn Instituciojn Esperanto havis ĝis la 14-a Universala Kongreso 1922?	49
---	----

I. La Lingva Komitato kaj ĝia Akademio (ekzistas ankoraŭ nuntempe)

33. Kio estas la Lingva Komitato kaj ĝia Akademio? Iliaj roloj?	49
34. Kiamaniere egala internacia parol- kaj esprimmaniero estas celata kaj atingata?	52

Demandoj	<i>II. La Esperantista Centra Oficejo</i>	paĝo
35.	Kion vi scias pri la antaŭa Centra Oficejo?	54

III. La Konstanta Komitato de la Kongresoj

36.	Kion vi scias pri la antaŭa Konstanta Komitato de la Kongresoj?	57
-----	---	----

B. NEOFICIALAJ ORGANIZAĴOJ DE ESPERANTO

I. Lokaj kaj naciaj organizaĵoj

37.	Kion vi scias pri lokaj organizaĵoj?	58
38.	Kion vi scias pri naciaj organizaĵoj?	58

II. Internaciaj organizaĵoj

39.	Kion vi scias pri la Universala Esperanto-Asocio? . . .	60
40.	Kion vi scias pri Esperantistaj Unuiĝoj inter divers- naciaj samfakanoj?	65
41.	Kion vi scias pri la nuna kunordigo de la esperantistaro (depost la 14a Universala Kongreso)?	66

IV. Gazetaro

42.	Ĉu ekzistas multaj Esperantaj gazetoj?	72
43.	Kiamaniere oni povas dividi la gazetaron?	72
44.	Ĉu Esperantaj redaktoroj ne havas moralajn devojn koncerne la lingvon kaj la esperantistaron?	75

V. Literaturo

45.	Ĉu Esperanto posedas originalan literaturon?	76
46.	Ĉu estas multaj nacilingvaj verkoj Esperanten tra- dukitaj?	77
47.	Ĉu Esperanto konigas ĝis nun neatentitajn aŭ neating- eblajn literaturajn produktojn?	81

Demandoj	VI. Stato de la movado	paĝo
48.	Kion vi scias pri la jam faritaj aplikoj de Esperanto? . . .	82
49.	Kion vi scias pri „Esperanto kaj komerco“?	82
50.	Kion vi scias pri „Esperanto kaj interkomunikiĝo“? . . .	84
51.	Kion vi scias pri „Esperanto kaj Internaciaj Kongresoj kaj Organizaĵoj“?	86
52.	Kion vi scias pri „Esperanto kaj lernejo kaj aliaj aranĝoj por instrui Esperanton“?	89
53.	Donu nombrojn pri la disvastiĝo de Esperanto?	93
54.	Kion vi scias pri lerniloj kaj informiloj pri Esperanto? . .	94
55.	Kion vi scias pri la laste aperintaj sistemoj de L. I. kaj precipe pri la reforma movado? Kio estas Ido?	96
56.	Kio estas la interna ideo de l' Esperantismo?	104



Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel

G. m. b. H.

Berlin kaj Dresden

Necesa komplemento por „Demandaro“ estas

Dokumentoj de Esperanto

Informilo pri la historio kaj organizo
de la Esperanta movado

Kunmetita de

Dro A. MÖBUSZ

Lübeck

Fundamenta prezo: 2.50 M.

(× ŝlosilnombro laŭ prezolisto)

por bonvalutaj landoj 2.50 Fr. svis.



Ĉiu Esperantano, kiu volas detale informi sin pri la historio kaj scienca bazo de la Lingvo Internacia, pri la Esperanto-movado kaj pri la organizo de la Esperantistaro, nepre devas posedi ĉi tiun fundamentan verkon. La libro enhavas i. a. ĉiujn kongresparoladojn de Dro Zamenhof kaj multajn aliajn gravajn dokumentojn. Ĉi tiu verko kaj „Demandaro“ kune estas la plej bonaj prepariloj por Esperantaj ekzamenoj ĉiuspecaj.

Druckerei Wilhelm Limpert, Dresden-A. 1.

FILIA Nr 14

w Białymstoku

104-15
-20

Książnica Podlaska
im. Ł. Górnickiego w Białymstoku



KP-F14-0002634

